

# REGO



**RUSIA ESPERANTO-GAZETO**



*komuna eldono de REU kaj REJM*

*№ 2 (9) marto 2002*

**NUBOJ, NUBOJ  
MODLOPLASTAJ...**



*en la numero:*

*EoLA-14: ĉu paŝo antaŭen aŭ du malantaŭen?  
laŭreatoj de EoLA kaj rezultoj de "Saliko"  
la plej bonaj kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa – por Rusio  
"Signoj kaj simboloj" – nova traduko el Vladimir Nabokov  
REJM en 2001-2002  
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"  
"Libra revuo", literaturaj paĝoj kaj multo alia*

***Moskvo, 2002***

# EoLA-14: Renesanco?



*komuna foto – ĉiuj kune*



*la novosibirskaninoj invitas al sekva EoLA*

*De la 28-a de februaro ĝis la 03-a de marto apud la urbo Ĉeboksari okazis tradicia arta festivalo EoLA-14, kiu ĉi-foje (maltradicie) havis la temon – “Renesanco”. Laŭ informo de la organizantoj en la festivalo partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el 18 urboj de Rusio (el tiuj pli ol 60 estis el Ĉeboksari kaj Novoĉeboksarsk) kaj 4 eksterlandaj gastoj (po 2 el Francio kaj Norvegio). Ĉefa enhavo de la nuna EoLA estis teatra arto, funkciis tri tetraj studioj sub gvido de profesiuloj, en ĉiu el ili estis preparita spektaklo al la lasta vespero; bedaŭrinde el tiuj unu estis plene, kaj ankoraŭ unu – plejparte ruslingva (la afero neimagebla por antaŭaj EoLA-j). Sed estis ankaŭ interesaj E-lingvaj spektakloj, preparitaj de la partoprenantoj hejme kaj surloke. El la eroj, vere prezentantaj E-arton, indas menciigi ankaŭ du koncertojn – de krasnojarska grupo “Sakura” (kiun gvidis Sergej Bozin kaj Evelina Sokolova) kaj de Jelena Katajeva kaj Grigorij Arosev kun partopreno de Jurij Karcev. Sendube neforgesebla estis prezento de ĉeboksara ĥoro, precipe kortuŝis ĉiujn la ĉarma kanto “Nuboj modloplastaj”. Interesa estis la ekspozicio de renesanc-stilaj fotoj. La kanta kaj poezia konkursoj ĉi-foje estis tre magraj, eble pro tio ke la organizantoj preskaŭ neglektis tiujn diferencoj de la teatra. Sube vi povas legi la impresojn pri EoLA-14. Ili estas relative multaj, ĉar la festivalo estas unu el ĉefaj E-arangoj en nia lando, ĉi-foje ĝi kaŭzis tre diversajn opiniojn. Baldaŭ eblas legi la impresojn kaj rigardi la fotojn ĉe hejmapaĝo de EoLA-14 <[www.eola-14.by.ru](http://www.eola-14.by.ru)>.*

**Garik Kokolija (Moskvo)**

## KANTEMAS ĜIRAFOJ TEATRUMANTE EN LA NEĜO

De la 28-a de februaro ĝis la 3-a de marto 2002 okazis en Ĉeboksari la Esperanta Arta Festivalo EoLA. Jam de pluraj jaroj mi intencis partopreni en ĝi, kaj ĉi-jare mi sukcesis ĝin ĉeesti.

Kial mi intencis partopreni en EoLA? Pro pluraj kialoj :

- Unue, estis bona okazo por samtempe viziti unufoje Rusion.

- Due, mi jam dum mia unua E-jaro aŭdis pri tiu festivalo, kaj do revis ĉeesti ĝin.

- Trie, la festivalo-nomo tre plaĉas al mi, rememorante pri la nomo de la greka vento-dio! Por tiu ĉi festivalo li devus esti ankaŭ neĝo-dio!

- Kvare, laŭ mi, sekretoj de sukcesa E-renkontiĝo estas: riĉa kaj bunta programo, varma etoso, afablaj gepartoprenantoj kaj, fine sed ne laste, ĉeesto de pluraj junaj rusinoj. Tiu Festivalo kunigis ĉion, kiel vi ja povas antaŭsupozi!

Sed ege malfacilis veturi tien. La vizon kaj flugbileton mi ricevis lastmomente, nur kelkajn horojn antaŭ la forflugo. Kiam mi venis, en la moskva flughaveno Ŝeremetjevo, pro diversaj kialoj, neniun moskvano povis min bonvenigi kaj gvidi al la urbo, kiu estas unu horon for. Feliĉe moskva amiko ne-esperantisto min bonvenigis, kondukis al la urbo kaj multege helpis min. Poste mi ankoraŭ devis aĉeti la trajnbileton al Ĉeboksari. Feliĉe denove mi ricevis helpon de tiu ruso, ĉar ne utilis esperi ke la stacidomaj oficistoj parolas alian lingvon ol la rusa. Provu klarigi al ili ke vi volas veturi al Ĉebo per la trajno n-ro 54, je la 18:25, en la vagono 7, en dua-klasa kupeo, kaj reen veturi en samaj kondiĉoj ... sen regi la rusan! La trajn-veturo estis bonorda, eĉ se ne tiom agrabla. Mi renkontis la alian francon, partoprenon-



*la francoj salutas la festivalon*

tan en EoLA kadre de sia unumonata vojaĝo tra Rusio, nome Christian Isidore. Sed poste mi estis tute sola, sola, soola.

Vendrede la 28-an, je la 8:18, la trajno 54 venis al la Ĉeba stacidomo, kaj ĉiuj ni E-veturantoj estis bonvenigataj de bonvenig-komitato, portanta EoLA-afiŝeton. De tiu mo-

mento ĉio pli bonis, ĉio agrablis. Ni busis al la bazejo. Tie ni malkovris niajn ĉambrojn, ankoraŭ sen akvo! Sed kelkajn horojn poste alvenis akvo, eĉ varma, trankviliĝu.

Entute pluraj momentoj de la 14-a EoLA multe plaĉis al mi. Jen aro da ili:

- la enkonduka vespero, dum kiu la festivalanoj sin prezentis laŭurbe: unue Ĉebo, nia ĉi-



*marioneta danco de la ĉeboksaranoj*

jara gastiganto kaj kunorganizanto, kiu faris belegan koreografiaĵon, poste la aliaj urboj: Moskvo, Sankt-Peterburg, Kazanĵ, Ivanovo, Novosibirsk, Uljanovsk, Epinal kaj Parizo kune, Volgograd, la genorvegoj el Trondheim ktp.

- Aparte mi ŝategis la kantojn, kantitaj de la Ĉeba ĥoro: “Nuboĵ”, “Neĝeniko”... Ĉu jam aĉetebblas ili k-diske?

- Flank-programe ĉiam eblis sportumi: mi multe ludis tablotenison, kaj ankaŭ korbo-pilkon, retpilkon.

- La opera vespero bonegis: pluraj partoprenantoj ludis de ili kreitajn aŭ klasikajn operojn, enhavantajn muzikon, koreografion, de ili faritajn kostumojn, rekvizitojn: “Keltaj Bardoĵ”, “Hamleto”, “Romeo kaj Julieta” ktp.

- La teatran vesperon mi maltrafis pro ludado de tabloteniso, do mi ne komentos.

- Vespere, ĉirkaŭ noktomezo, kelkaj viroj kaj mi iris saŭnon! Estis agrablege. Mi profitis la okazon por havi mian unuan varman duŝon en Rusio! Plie, ni trinkis, mi drinkis, ĝuante ĝinon kaj vodkon, kaj fine oni iris en la neĝon. Bedaŭrinde mi mem ne naĝis en la neĝo kun la aliaj, pro tio mi nepre reiru al EoLA! Dume mi naĝis en la malvarma naĝejo. Vere ĉio eblis post drinko de iom da vodko!

- Mi malkovris al kelkaj gerusoj francajn muzik-sukcesojn de 2001, kaj aŭskultigis la kanton “Nathalie”! Ĉar fakte temas pri am-historio inter franco kaj rusino. Pli plaĉis la muzikaĵoj el la filmo “8 virinoj”.

- La fina vespero, la karnavalo! Originala bonega programero. Antaŭe ĉiuj devis krei proprajn maskojn. Sen ĝi neniu rajtis eniri la karnavalejon. Do ĉiuj festivalanoj senescepte



*la organiza teamo*

portis maskon kaj partoprenis diversajn ludojn: kavaliran turniron, rondon, dancon, ni spektis fajraĵon en la neĝo ktp.

– Krome, diversaj eroj ankaŭ plaĉis al mi: la poeziaĵo kun la titolo “Ĝiraf”, bele deklamita de rusino, la multego da neĝo, imponega por franco. Ekzemple la verdaj benkoj estis sub dika neĝ-mantelo! Ankaŭ la teon mi ŝatis, la devigajn ekskursojn al Ĉebo (la bazejo estis 45 minutojn for buse de la urbo) por registriĝi, la veteron, ne tiom malvarman kiom mi



*la tabloteniso logis multajn ne malpli forte ol la teatraĵ studioj*

atendis, ĉirkaŭ de  $-1\text{ }^{\circ}\text{C}$  ĝis  $+4\text{ }^{\circ}\text{C}$ . Kaj ne forgesi la multajn rusinojn, kiuj ĉeestis! Bedaŭrindas ke multaj ne parolis Esperante, do plia allogo al lernado de la rusa.

Konklude mi aldonas ke bedaŭrindis por pluraj homoj, kaj por mi kelkfoje, ke tro ofte oni parolis la rusan anstataŭ Esperanton. Sed tio certe estis pro tio, ke la organizantoj volis favori la Artan flankon de la Festivalo. Eble en iu venontajaro, ĝi ja estos pli Lingva ol Arta, aŭ eĉ

*Aleks Kadar (Francio)*

## **MASKO, MASKO, KIU VI ESTAS?**

Ĉi-jare EoLA havis la sloganon “Arto – lingvo internacia” kaj la temon “Renasanco”.

...En unu el la ĉambroj ĉiam estis homoj. Se vi enirus ĝin, vi ekvidus, ke ĉie kuŝas diverskoloraj paperetoj, pecetoj da ŝtofo, buntaj farboj, kaj vian kapon nepre tuŝus iu ruĝa teksaĵo, pendants de la plafono... Kaj se vi provus ion demandi de iu, li aŭ ŝi respondus nur “Ugu...” kaj plu farbus sian maskon. Jes, ĝuste tion oni faris ĉi tie... Post kelkaj minutoj ankaŭ mi profundigis en la procedon. Tio estis paradizo!

Neniu venas kaj diras: “Metu la aĵojn ĝustaloken! Observu purecon!”. Ne, ĉi tie regis vera “krea ordo”! Kaj poste mi ekaŭdis, kiel Majstro de la Maska metiejo diras: “Tiu homoj estas tiom kreemaj! Rigardu – kia fantazio!” – kaj li montris multnombrajn misterajn kaj gajajn maskojn, kiuj estis sekiĝantaj ĉirkaŭe...

Kaj mi komprenis unu aferon. Kiam ni estas hejme, ni laboras, studas... Kaj plejparte ni ne povas trovi sufiĉe da tempo por fari tion, pri kio ni tiom ŝatis okupiĝi en infaneco: pentri, desegni, glui, danci kaj, certe, ludi. Sed tio estas agrablaj kaj – mi eĉ diru – necesaj okupoj por ĉiuj aĝoj. Eble, ĝuste pro manko de ili la vivo foje ŝajnas al plenkreskuloj monotona? Kaj dum EoLA – 3 tagojn por okupiĝi pri kreado!



Por multaj programeroj de la festivalo la partoprenintoj prepariĝis surloke. Mi konsideras atentindaj la karnavalon kaj teatraĵojn por Vespero en Teatro. Tio estas, laŭ mi, bona ideo. Ĉar kutime pleja parto de la homoj ne plenumas tiel nomitajn “hejmajn taskojn”. Ne pro sia netalenteco, sed simple pro manko de tempo kaj fortoj, pri kio mi jam menciis. Kaj surloke aperas ambaŭ – kaj tio, kaj alio. Des pli ke la surlokan preparadon gvidis speciale



la krasnojarska muzikgrupo “Sakura”

invititaj profesiuloj. Kaj tio vidigis bone konatajn geamikojn en alia stato – en reala spektaklo, montranta kiom kapablaj ili estas. Ĉar kutime dumarangaj teatraĵoj estas amatoraj kaj ne ebligas al la homoj plene riveli siajn aktorajn talentojn. Certe, plej vigle la publiko reagis al la teatraĵo “Dekamerono”. Kaj kiam mi ekvidis nian francan gaston en rolo de maldeca pastro, mi komprenis, ke arto vere estas lingvo internacia...

Unu el la plej mirindaj partoj de EoLA estis koncerto de krasnojarska grupo “Sakura”. “Ni kantas tiel, kiel laŭ nia imago oni kantis kaj ludis dum Japana Renesanco” – diris Sergej Bozin kaj Ko. Kiel kutime, inter kantoj troviĝis “improvizo – meditado”, nomita “Dezerto”. Ĉiuj en la halo povis imagi sin varmega dezerta vento aŭ sablo susuranta sub piedoj de kamelo, kaj tiel soni...

Sed... komence mi rakontis al vi pri maskoj kaj tute ne menciis pri Venecia Karnavalo! Oni rajtis eniri la karnavalejon nur en masko. Kaj kiam kavaliroj kaj damoj dancis, flugigante buntajn paperserpentojn, al mi venis homo en nigra vestaĵo kaj bela blanknigra masko. La homo demandis ion de mi, rigardante tra nigraj okultruoj...

- Kiu vi estas? – mi flustris.
- Divenu! – sekvis la respondo.
- Ha! Mi komprenis! Vi estas viro, ĉu?
- Se vi scias, kial do vi demandas? – ofendiĝis Masko.
- Garik, vi estas Garik!

La Masko ekrapidis intrigi aliajn homojn... (*Tamen por eviti miskomprenon mi klarigu, ke mi ne propramane faris la maskon, sed iam aĉetis ĝin en Venecio – G.K.*)

Poste la Majstro de Masko metiejo diris al mi: “Oni demandis min: por kio fari maskojn? Por kio kaŝi sian vizaĝon? Mi opinias tiel, – daŭrigis la Majstro, – Kiam iu mem faras maskon, li esprimas sian individuecon. La masko sur via vizaĝo MALKOVRAS kaŝitan flankon de via naturo...”. Sed ankaŭ, ŝajne, masko estas io magia. Ĉar fine de la balo ĝia reĝino Maŝa Terjoĥina diris: “Venis tempo por demeti la maskojn kaj diri al via paro la deziron – li aŭ ŝi plenumos ĝin dum la tuta hodiaŭa vespero...”. Kaj ĝuste tiam venis kompreno, kion signifas esti “sen masko”... Poste la homoj venis rigardi realan fajraĵon!



bone maskita Garik

Kaj ... estis starigita nova rekordo!. Ĉar dum nokta kantado en la ĉambreton eniris (kaj eksidis/ekkuŝis!) 50 personoj, kompare kun 40-homa rekordo de la antaŭa EoLA...

Bedaŭrindas nur, ke dum EoLA-14 la homoj plejparte “krokodilis”; ke kelkaj konkursaĵoj okazis en la rusa; kaj ke la tradician kantan konkurson partoprenis tiom malmulte da homoj...

*Sonjo Ŝejnina (Ivanovo)*

## **ESTIS TIOM BONEGE DENOVE SPERTI EoLA-n!**

Mia unua EoLA estis en 1993 en Ĉeboksari, en la infana ripozejo “Ĉajka”. Ĉi-jare EoLA denove revenis al la sama loko! Sed mi ŝatus diri, ke la festivalo ne plu estas sama: estas alia programo, alia etoso, alia art-nivelo, aliaj partoprenantoj...

Tiom da nekonataj vizaĝoj, tiom da brilaj talentoj, tiom bunta programo...! Mi ĝuis ĉion senlime. Ĝuis konatiĝi kun tiom da novaj homoj de la tuta Rusio!

Sed plej kara por mi tamen estis renkontiĝo kun malnovaj amikoj: Garik, Aljaskin, Griŝa, Jura Karcev, geĥrustaljovoj, Geĉjo Basov, Vitalik Malenko kaj Katja Burmisova, Irina Gončarova, Etulinka, Beznoskoj, Formikoj, ĉiuj geĉeboksaranoj kaj kazananoj...

Kaj koro ploris pro manko de tiuj kiuj ne sukcesis veni kaj kiujn mi tre esperis revidi post multaj jaroj, precipe Maŝeto, Sveta Eist, P.Fiŝo, Ivan Naumov kaj multaj aliaj!

Emocioj plenigas min tiel ke malfacilas ordigi la pensojn en la kapo. Alia malfacila afero estas ke mi jam tralegis multajn impresojn pri EoLA de aliaj partoprenantoj kaj ne volas ripetiti la samon...

Por mi ĉi-foje estis iom strange esti prezentita kiel eksterlandanino-norvegino, sed tamen ne rajti partoprenon en la konkurso pri Ĉuvaŝio, estante ĉuvaŝino.

Multon mi eble vidis iomete alie ol la ceteraj – tra okulario de la fotilo, do la plej “viglaj” momentoj por mi estas ĝuste nemoveblaj bildoj, kiujn mi kaptis per kamerao: jen Arlekino dancanta sur scenejo, jen brilega kelta balado, jen aktoroj de Hamleta teatro, jen fruktoplena laboro en maskofarejo, jen inspiritaj mienoj de kantantaj Griŝa kaj Jura, jen parado de pretaj maskoj dum la karnavalo, jen lacaj sed kontentaj vizaĝoj de multnombraj noktaj kantistoj... Neforgeseblaj, valoraj momentoj! Kaj Ulf kaj mi tre ĝuis dividi ilin tuj kun la aliaj festivalanoj per komputila fotomontrodo en Taverno.



*sinprezento de la kazananoj*



*sen masko neniu rajtis partopreni en la karnavalo*



Bonega etoso eĉ pliboniĝis dank' al belega vetero kaj ebleco ekskursi al Volga perpiede kaj kune kun bonaj amikoj. Ni ĉiuj (ekskursantoj) fieris montri al Ulf kiom larĝega estas Volga kaj kiom grandajn ezokojn (7 kg) eblas kapti en ĝi.



*bela momento de unu el la ĉeboksaraj spektakloj*

kaj ĝui la etoson aŭskultante jam famajn kantojn de ĉeboksaranoj (Nuboj, nuboj...) kaj gitarludadon de niaj karaj majstroj, starante en amika rondo kaj kantante “Ni renkontiĝos...”.

Ni renkontiĝos!

Ĉiutage post nia reveno hejmen ni aŭskultas E-muzikon, pro kio ni ŝatus danki tiujn, kiuj kreis (kaj tiujn, kiuj vendis) la “Orajn kantojn”! Brilega ideo! Ni esperas ke aperos baldaŭ pliaj tiaj. Same multe ĝuas ni aliajn niajn aĉetaĵojn: diskojn kun la kantoj de Griŝa (“Mensogo kurba de spegul”), de Ĵomart kaj Nataŝa (“Frua mateno” kaj “Nia trajno”), kaj de Maŝeto kaj aliaj (“Esperanto XXI”).


Tiuj diskoj kaj fotoj helpis al ni emocie rakonti pri EoLA al niaj samklubanoj dum la kunveno tuj post reveno al Trondheim. La interesa programo kaj ardo de partoprenantoj imponis ĉiujn, kaj ili sendas al EoLA-organizantoj en verdaj T-ĉemizoj siajn gratulojn pri la sukceso.

Mi esperas ke ni sufiĉe baldaŭ havos eblecon denove partopreni la festivalon

*Jelena Lunde (Norvegio)*

## IMPRESOJ VERSAJ

Jam aŭguste ekplanis buĝeton  
por vojaĝo Jelena kaj mi,  
al Rusio aĉetis bileton;  
Al EoLA-etos' sopiris ni.



*ĉiam ridetanta Ulf*

En decembro ni trovis retpaĝon,  
kaj aliĝis ni pere de ĝi.

Nun atendis ni nur la vojaĝon;  
Antaŭĝojis ni dume pli kaj pli.

Kiuj konas min, jam bone sciis,  
ke l' edzin' estas el Ĉuvaŝi'.  
Ĉeboksare, do, dum ni feriiis  
faris novan pasporton ŝi al si.

Do mi devis ŝin tie forlasi  
kaj al “Ĉajka” veturi mem, ĉar  
mi ja nepre ne volis maltrafi  
komenciĝon de EoLA-14.

Tra malseka neĝfalo kaj vento  
mi finfine plenumis alven'n.  
Tie tuj mi pleniĝis per sento,  
ke “Jen taŭga esperantist-aren'!”

Inter esperantistoj rusiaj  
estis eksterlandanoj nur tri:  
Pli kuraĝaj (?) ol iuj aliaj,  
Aleksandro kaj Kristian kaj mi.

Renkontiĝoj kun karaj amikoj



nun amase atendis min, ĉar  
kiel pluve el tero lumbrikoj  
ja aperis ili tra Ĉeboksar’.

Pli ol dek aktivuloj de Ĉebo  
jam dum jaroj tre karaj al mi  
kaj Formiko ne plu nur kun bebo  
ĉar jam dujaran knabon havas ŝi.

Venis Garik, Alaskin kaj Oĉjo,  
venis Griŝa kun Lena kaj, nu,  
dek kvin knaboj kun em’ al diboĉo  
min al Баян invitis nur por ĝu’.

Se dumnoktan neĝviran baletan  
kun nudeco vi taksas ne tro,  
vi vizitu je propra risketo  
mian fotokolekt’n en TTT!

La etoso jam bonis, kaj certe  
Lena venis post horoj dek ses.  
Tiam ĉio ordiĝis perfekte  
kaj ni kune ĝuegis la kongres’n.

En “Taverno” stariĝis gufujo,  
kaj pri ĝi respondecis team’:  
Gufdeĵoris sen ajna fridujo  
ja Vitalik kaj Katja kun gastam’.

La laboro de ĉeboksaranajo  
donis fruktojn kaj indas je fam’,  
ĉar precize laŭ iliaj planoj  
altkvalitan plenumis ni program’n.

Dum prezentoj ravita mi sidis,  
foti preskaŭ forgesis, ĉar, ho,  
multon belan ni aŭdis kaj vidis  
dum operoj, koncertoj ktp.!

En vendredo laŭ mi plej impona  
estis kelta spektaklo pri bard’,  
kaj Otelo kiam Desdemona  
igis lin sin mortigi per ponard’.

Multis ludoj kaj memkompreneble  
sur scenej’ Esperanto-kultur’;  
Tie pompe kaj neforgeseble  
staris Garik kun kismarkoj sur krur’!

La premioj al ni promesitaj  
libroserve por “Алчность”-konkur’  
tre efike estis protektitaj  
de l’gvidistoj, sed lerte, kun humur’!

La teatraj teamoj kun ardo  
sin senĉese trejnadis por ke

la publiko per propra rigardo  
amuziĝu dum la variete’.

En sabato mi spektis kun miro  
rezultatojn de tiu labor’.

Poste maskoj de blukavaliro  
kaj aliaj impresis al memor’.



*la plej lacaj estis, certe, la ĉeboksaraninoj*

Karnaval’ en la granda sporthalo  
Estis ege sukcesa ĝis fin’.  
Kaj eĉ kat’ povas esti ĉevalo  
en konkurso por gajni la prinĉin’n.

Kvankam lertis ni pri renesanco  
mankis spertoj pri Esperanti’,  
ĉar fiaskis la provoj je danco  
interkisa: “La Bamba” estus ĝi.

Dum l’ arang’ estis eĉ sportumado.  
Porekzemple okazis kun stil’  
Garry Potter-a Kvidiĉ-ludado,  
kvankam sen la fluganta balail’!

Jes, ni estas sendube kontentaj,  
sed la rusoj en sia arang’  
lingve estis ne tre diligentaj  
(ankaŭ ne tro ekscita ia manĝ’).

Nek gufuge, nek eĉ sursceneje,  
krokodiloj permesis al ni  
iam ajn povi tute forgesi  
ke ni estas ankoraŭ en Rusi’.

Se konsilon vi petos pri ŝanĝoj  
rekomendos mi nur tion ĉi:  
Dum estontaj Esperanto-arang’oj  
eble nur Esperanton uzu ni?

*Ulf Lunde (Norvegio)*

## AŬ ARTO, AŬ LINGVO INTERNACIA

La slogano de EoLA-14 estis “Arto – lingvo internacia”. Jen la kazo, kiam la kutima “lingvo internacia” ne sinonimas al Esperanto. Nu, neniu ja tion eĉ celis...

Tiu ĉi EoLA, konceptita de



*arto – lingvo internacia?*

Dmitrij Oŝĉepkov, nature, similis al ĉiuj “liaj” aranĝoj (la ĉeboksara StRIGo, la rolludaj aranĝoj “Fratoj Slavoĵ” kaj “Ellada”, la ivanova OkSEJT-40, la vladimira “Antikvaj civilizoj: Oriento”...) – kun ĉiuj ties avantaĝoj kaj mankoj. Dima estas konata eksplodiganto de la rusia (pli ĝuste, eŭrop-rusia) esperantista movado. Al li evidente plaĉas realigi siajn organizajn kaj kreajn kapablojn, agante kun, per kaj por la junaj esperantistoj (aŭ neesperantistoj, ne tiom gravas – gravas enŝaltigemo en la Etoson). Mi ne kuraĝas aserti, ke Dima indiferas al Esperanto. Pli ĝuste, li – samkiel NI ĈIUJ – ne kapablas organizi amasajn malkrokodilajn aranĝojn, ne scias fari ilin plen-interesaj por la junularo. Antaŭ li (=NI) estas dilemo: fari aranĝon amasan, kreas, scidonan, gajan – sed krokodilan, aŭ fari ĝin por kelkdek lingvaj spertuloj kaj progresemuloj, kies ebloj iĝas draste limigitaj de la lingvaj baroj – kiujn la organizantoj metas kaj kiujn ili instruas superi. Dima elektas la unuan, pli facilan vojon. Kaj li realigas siajn aranĝojn tiom lerte kaj alloge, ke ankaŭ aliaj organizantoj (ah, homoj, ĉi tie temas pri mi!!!) – elektas tiun ŝajne senmalgajnan vojon. Kaj ni eĉ ellernis nin pravigi: ni ne plu estas fermita societo; per similaj aranĝoj ni reklamas Esperanton; finfine – ni donacas al la ĝejnuloj tion, kion ili apenaŭ trovas

aliloke (ĉu ne pli nobla celo, ol perfektigi Esperanton?)... Kaj iom post iom, preskaŭ nerimarkeble, ni atingis la staton, kiam ĉiuj niaj amasaj aranĝoj iĝis popularigaj kaj ... krokodilaj. Restis, ŝajne, nur sola REK...

Do... Mi multe ĝuis la partoprenon en EoLA. Mi akiris ĉi tie novan sperton roli en serioza spektaklo, scenigata de profesia (speciale dungita!) reĝisoro, onidire, renoma. Eĉ pli – mi havis ŝancon mem esti reĝisoro dum unu el la provludoj, kaj la laboro ege plaĉis al mi. Mi sukcesis ĉeesti ankaŭ provludojn de du aliaj spektakloj kaj ĝui laboron de la du aliaj scenigistoj. Min tre plezurigis la ŝatata krea etoso de amasaj provludoj, kostumfaradoj, koncertoj ks. Mi tre ĝojis renenkonti miajn geamikojn kaj resenti ilian amon al mi. Min denove ravis la glora ĉeboksara teamo – tiom multnombra, tiom konkorda, tiom agema, tiom talenta... Mi denove admiris kelkajn personecojn. Mi ĝojis vidi, ke mia filino ĝuegas la etoson, la roladon en la spektaklo, la kostumojn, la karnavalon ...

Nu, kion diri? Dankon pro la belega festo al Dima kaj lia teamo, al ĉiuj partoprenintoj! Mi bele kaj fruktodone ripozis. Tamen... ĉu ne venis tempo revizii la celojn de niaj amasaj aranĝoj? Kaj retrovi la verdan padon, kiu postulas malfacilan grimpadon (intelektan kaj psikan streĉon) kaj kondukas al pliaj altaĵoj de E-parolado? Aliokaze jam tre baldaŭ la literoj E en titoloj de niaj aranĝoj iĝos por la ĝuantaj amasoj nekomprenebla rudimento.

*Irina Gonĉarova (Odincovo)*

Se iu el EoLA-partoprenintoj interesiĝas, Andrej Grigorjevskij pretas kopii kontraŭ la memkosto la komputilan kompaktdiskon kun la fotoj kaj filmetoj, faritaj dum EoLA-14 de Ulf kaj Jelena Lunde. Tie estas proksimume 900 fotoj kaj 10 filmetoj. La novan adreson de Andrej vidu en la kvara kovrilpaĝo.

## KIEL NI PREPARIĜIS AL EoLA

La kvar miraklaj tagoj jam estas, bedaŭrinde, en pasinto. Ili preterflugis fulmrapide, lasinte en la memoro nur amason da gravaj eventoj kaj en la animo – varman senton de interna lumo kaj kosma kvieteco. Grandegan dankon pro tio al la organizantoj, al nia malforgesinda verdĉemiza teamo: Olesja kaj Saša, Oĉjo kaj Andreo, Sergeo kaj Sonjo, Ljuba, kaj precipe al la ĉefa ilia inspiranto – al Dima Oŝĉepkov. Kunuloj, vi ja faris grandegan kaj ege gravan aferon!

Sed nun mi tre volus rakonti ne pri miaj helaj impresoj de la pasinta EoLA-14, sed pri ne malpli helaj rememoroj de nia antaŭa preparado. Verŝajne por la organiza teamo tiu ĉi tempo ne estis ege feliĉa kaj serena, sed aliaj membroj de JEACR, inkluzive min, ĝuis pro niaj senfinaj provludoj, dum kiuj regis tiela belega etoso de io altspirita, ekstertera, gravega kaj deviginta rigardi longe konatajn homojn novmaniere, malkovri ilin denove kaj iusence proksimiĝi al ili...

Mi certas, ke en la animo de ĉiu el ni ĝis nun vivas tiuj neforgeseblaj momentoj, kiam la sono de niaj malagorditaj voĉoj, vere estante la voĉo de la koro, altiris plu kaj plu, ĉiam al alteco, kaj perdiĝis ie en stela surfaco ... kiam pupoj el pupmagazeno surprize ekviviĝis kaj kun miro rigardante al ĉefverkoj de mondpentrado (ĉar ili ekviviĝis en la ekspozicia centro “Ĉielarko”) peneme faris siajn danĉpaŝojn... kiam keltaj knabinoj vere ploris, adiaŭante novnaskiĝintan bardon... kaj kiam gajis kaj malpeziĝis la animo pro “Nuboj modloplastaj” – gajhumora unuaranga ŝlagro de ĉiuj ĉeboksaraj esperantistoj, kiun prenis en la korojn ankaŭ niaj geamikoj – aliurbanoj kaj alilandanoj...

Pro tio mi ege volus, en la nomo de du Esperantaj asocioj de nia urbo, profunde riverenci kaj esprimi **GRANDEGAN DANKON** al la plej bona kaj plej amata artgvidanto en la mondo – al **IRINA ROMANOVA**, nia dua panjo, kiu bruligis niajn korojn, lernigis nin aprezi altan arton kaj unu la alian, eviti vulgarecon, kaj kiu simple donacis al ni tiom multe da fabelaj momentoj...

Sen viaj provludoj, Irina, niaj sabatoj malpleniĝas kaj niaj animoj jam komencas perdi la inspiron.

BONVOLU, BONVOLU, DAŬRIGU NI...

*en la nomo de JEACR kaj “Ĉielarko”, Olja Ivannikova (Ĉeboksari)*




*pli bela duono de la komuna ĉeboksara ĥoro*



*ankaŭ ne malbona maniero prepariĝi*

## PRI INDIVIDUECO EN LA ARTO

EoLA-14 okazis en la sama bazejo, kie en 1993 pasis EoLA-5. Sekve, la partoprenintoj de ambaŭ aranĝoj vole-nevole komparis tiaman EoLA-n kaj la nunan. Ankaŭ mi.



*Griŝa kaj Lena observas la arton*

Sendube, el teknika vidpunkto la dekkvara EoLA estis neimageble pli altkvalita, ol la kvina – abundaj libroservo kaj bufedo, *bona* aparataro, pere de portebla komputilo montrataj ĵus faritaj fotoj, – por ne paroli jam pri la arta fajraĵo. Sed ĉi-foje tre frapis preskaŭ plena manko de partoprenintoj en poezia kaj kanta konkursoj, kontraste kun EoLA-5, kiu memorfiksiĝis ĝuste pro vera “konstelacio” de brilaj kantistoj kaj poetoj, prezentiĝintaj tie (pluraj el ili – la unuan fojon). Sed la teatra branĉo, ĝis nun ne tro bone fartinta, dum EoLA-14 tre populariĝis. Estis prezentitaj minimume 3 teatraĵoj en Esperanto, 3 pliaj en la rusa (hontinde, sed nun ne gravas), kaj krome – korusa kantado, maskobalo... Ĉu vi ne sentas tendencon? Mi jes: nunaj komencantoj ne emas agi individue, ĉar tio, certe, forprenas pli da tempo kaj forto. Ja en koruso eĉ se oni malbone scias la tekston, aŭ subite falsetis – la ĉirkaŭa amaso ŝirmos, sed se oni same fiaskus prezentiĝante sole – jam estus tute alia afero. Eĉ se la rolo en scenaĵo estas la ĉefa, kaj oni ion forgesis dumspektakle – ne gravas, ĉar la spektantoj baldaŭ forgesos tion, ja ankaŭ aliaj rolantoj prenas atenton de la halo.

Ĉu tio estas sekvo de malkapablo? Apenaŭ. Ĉu de pigremo? Ankaŭ ne verŝajne. Sed kio? Eblas argumentite supozi, ke nunaj novicoj en E-mondo opinias, ke por ili loko ne sufiĉos – ja (laŭ ili!) ĉiujn liberajn lokojn en kanta niĉo, en poezio, en traduka arto okupis diversaj “famaj” homoj... Ne indas doni ekzemplojn, ja t.n. “famulojn” konas ĉiu novico. Sed ĉu la novico konscias, ke la famuloj diferencas de ili nur per pli longa restado en E-medio, kio donis al ili pli da ebloj (= tempo) sin esprimi? Kaj sekve, la “famuloj” tute NE estas netuŝeblaj kaj nerenverseblaj, por tio simple necesas kompreni, ke ĉiuj ni en E-mondo estas same egalaj, kiel en la ekster-Esperanta. Kial do ajna novico ne timas diri al spertega esperantisto-poeto: “En via aŭto misfunkcias la startilo”, sed timas ekkonkuri kun li en poezia sfero (kompreneble, se la novico mem verkas versaĵojn)? Eble la poeto estas konata nur pro tio, ke neniuj nova, pli bona, poeto aperis? Kaj kiel povus aperi nova poeto, se ĉiuj novicoj ne kuraĝas montri sian individuecon? Se vi estas ĝuste tia ne tro kuraĝa komencanto, ne timu do!

Sed povas esti alia kialo. Eble la novaj esperantistoj ĝenerale ne bezonas esti individuo en E-arto... Kaj tio tre malĝojigus.



*Evelina Sokolova – talenton kaŝi ne eblas*

*Grigorij Arosev (Moskvo)*

## *Poezia konkurso de Vagantoj “Krono de Sonetoj”:*

**Christian Angelliaume** (Francio).

## *Konkurso de Menestreloj:*

debuto: **Tatjana Volodina** (Volgograd)

laŭreato: **Eljvira Nizamijeva** (Novosibirsk) – pro la belsona plenumado

## *Galerio de Renesanc-stilaj fotoj:*

1. **Esperanto-klubo “Rideto”** (Kazanj) – pro la nova rigardo al la Renecanca arto kaj pro la teama laboro;
2. **Ulf Lunde** (Norvegio) – pro la donacita tempvojaĝo al Renesanco enkadre de la konkurso de Renesanc-stilaj fotoj;
3. **Tatjana Volodina** (Volgograd) – pro la kreo de lirika imago pri Renesanca virino.



*unu el multaj prezentoj de la ĉeboksaranoj*

## *Konkurso de manfaritaj aĵoj “Urbo de Majstroj”:*

1. **Jelena Katajeva** (Tomsk-Moskvo) – pro la kolekto de betul-ŝeloj;
  2. **Jelena Serova** (Kostroma) – pro la pupo de Kostroma;
  3. **Aljibna Ŝamsutdinova** (Kazanj) – pro la brodaĵo;
- Ivan Ŝabalkin** (Ĉeboksari) – diplomo por la plej juna konkursanto.

## *Teatra konkurso:*

1. **JEACR** kaj **“Ĉielarko”** (Ĉeboksari) – pro “Naskiĝo de Bardo”;
  2. **JEACR** (Ĉeboksari) – pro “Pastoralo”;
  3. **JETI** (Ivanovo) – pro “Otello”;
- la plej bona vira rolo – **Azat Aĥmadullin** (Kazanj) – la reĝo Klaŭdio en “Hamleto”;
- la plej bona virina rolo – **Marija Terjoĥina** (Moskvo) – reĝino-aktorino en “Hamleto”;
- la plej bona duagrada rolo – **Janna Potapova** (Lipeck) en “Hamleto” kaj **Guljfiĵa Aĥmadullina** (Kazanj) en “Pinokĵo”;
- la plej pikanta sceno dum Teatra Vespero – **Ok-sana Krotova** (Roslavlĵ) kaj **Mihail Kolo-menskij** (Sankt-Peterburg).

En EoLA-14 por partopreni BeLegon venis nur 4 homoj. Laŭ la Regularo de la konkurso ĝi ne povas okazi, se aliĝas malpli ol 5 deklamemuloj. Do, poentajn rezultojn de tiu ĉi BeLegon ni ne konsideru. Tamen la Bela Legado okazis: ĉiuj aliĝintoj plene prezentis siajn programojn. Speciale ĝuide estis aŭskulti deklamadon de Olĵa Ivannikova (Ĉeboksari), kiu poste brile elpaŝis dum la konkluda EoLA-koncerto, prezentinte la poemon de Nikolaj Gumiljov “Ĝirafo” en traduko de Tatjana Auderskaja, ĉe melodias akompano de Bozin-gitaro. Apartaĵo de tiu ĉi BeLegon estis malĉeesta partopreno de la 5-homa Kostroma-teamo, kiu prezentigis per sonkasedo. Ni plezure notas viglajn kaj esence ĝustajn deklamadojn de Olĵa Greĉuĥina kaj Jelena Serova. Kaj aplaŭdas al la aktiveco de la kostromanoj!

*Irina Gonĉarova (Odincovo)*

## *Maskoj:*

1. **Aljona Kuzjmina** (Volgograd) – “Verda masko”;
2. **Danil Kapitonov** (Ĉeboksari) – “Blua kavaliro”.

*Por ke la legantoj de REGO havu imagon pri la nivelo de ekz. poezia konkurso dum EoLA-14, ni publikigas la gajnintan en la konkurso soneton. La soneto aperas ĉi tie sen ajnaj ŝanĝoj, ĝuste tiel, kiel prezentis ĝin la aŭtoro kaj sendis al REGO la organizantoj.*

**Christian Isidore Angelliaume (Francio)**

### **Mi bedaŭrindos se vi formemorus**

Tre bedaŭrindus mi per miaj am-sonoj  
Ĝeni vin ke vi ne plu dezir' koras  
Aŭdi ilin kaj min, ke via mens' foras  
Etajn vortojn miajn iĝutaj am-ŝtonoj.

Bedaŭrindus mi ĉar alimaniere mi  
Poviĝas elĉerpi ilin kiuj fluas,  
Troas el mia kor', kiuj tro malbluas  
Kiam ili svene ne povas malpremi?

Vi vekigis vivon, malnovan deziron  
Kiujn mi pensis for, kiujn ne plu veris,  
Precioze kaŝitajn. Kaj vi, nov-ciceron'

Mam-en-mane ilin vi gaje malkovris,  
Vekis ilin kise, priskribis malmuron.  
Tion, bel-amikin', mi ne formemoris!

*Februaro 2002*



*Katja Jevlampijeva, la ĉeforganizantino de ATS (vidu sube)*

## **SES HOROJ POR LA ESTONTO DE JEAĈR**

La 17-an de marto en Ĉeboksari okazis Aktivul-Trejna Seminario (ATS), dediĉita al “Problemoj kaj perspektivoj de evoluo de JEAĈR”.

En la seminario partoprenis pli ol 25 personoj, inter kiuj estis kaj novuloj kaj sufiĉe spertaj membroj de nia asocio. Dum preskaŭ 6 horoj ni klarigis la celojn de JEAĈR kiel junulara asocio, difinis ĝian lokon inter alaj junularaj organizaĵoj, determinis similecon kaj diversecon de JEAĈR kompare kun aliaj E-asocioj kaj kluboj, analizis atingojn kaj mankojn de nia laboro. La analizado de la lastaj okupis la plej grandan parton de ATS.

Rezulte de ardaĵoj debatoj kaj priparoloj, kaj ankaŭ de nervoza trinkado de N litroj da teo kun tradiciaj dolĉaĵoj de “Akkond” (*la kafejo en Ĉeboksari, kie ofte kunvenas la esperantistoj – G.K.*), formiĝis 5 iniciataj grupoj, laborantaj laŭ ĉefaj direktoj, provizore nomitaj: (1) kolektivo, (2) planado, (3) informado, (4) propagando de E-to, (5) mastrumado kaj organizado. Tiuj ĉi grupoj detale analizis mankojn en la laboro de JEAĈR kaj proponis siajn vojojn por forigado de kialoj de tiuj mankoj, kaj ankaŭ formis la programon de proksima kaj longtempa evoluo de JEAĈR laŭ la ĉi-supraj direktoj.

Ni esperas, ke tiu ĉi granda farita laboro jam en proksima estonto donos senteblajn rezultojn kaj venigos JEAĈR al nova ŝtupo de la evoluo.

***Olĝa Ivannikova (Ĉeboksari)***

*P.S. Apartan dankon al Jekaterina Jevlampijeva, kiu preparis kaj profeciece okazigis ĉi seminaron. Ni pretas dividi la sperton pri okazigo de similaj ATS-oj kun aliaj E-klubo, se ili tion bezonas.*



Ivanova Esperanta Renkontiĝo  
**IvERo-3** okazos 06-14.07.2002

en Ĉernci (Ivanova regiono). Al la aranĝo vin bonvenigas Ivanova Esperanto-klubo, unu el la plej malnovaj E-kluboj de la mondo. IvERo-3 invitas mezaĝajn geesperantistojn, kiuj delonge aktivas en la movado kaj dezirus daŭre praktiki bonnivele la lingvon, ripozi en la naturo en amika rondo, ĝui E-etoson. Ne estos forgesataj junularo kaj infanoj. Ili ĝuos specialan programon.

La renkontiĝo okazos en la internulejo de Ĉernci, situanta je 25 km de Ivanovo direkte al Moskvo. La loko estas fama pro sia pitoreska naturo kaj longa interesa historio. Nia regiono, situanta en koro de Rusio, konservis multajn, vizitindajn antikvaĵojn. Suzdalj kaj Pljos ĉe Volga, lignaj preĝejoj kaj orumitaj kupoloj de la katedraloj lasos neforgeseblajn rememorojn... La varia programo de la renkontiĝo enhavos perfektigajn kursojn, diversstemiajn rakontojn. Muzikaj prelegoj kaj koncertoj alternos kun gajaj sportaj konkuroj, sunbruniĝo kun kolektado de beroj en tute proksima arbaro. Krome estas planata la tutperioda konkurso inter esperantistaj familioj “Jen estas ni – Esperanta familio”.



*unua IvERo en 2000*

La aliĝilojn (kun indiko de la nomoj, poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝta adreso, programkontribuo(j), lingvonivelo, partoprenperiodo, promeso obei la lingvan disciplinon kaj tagordon, dato kaj subskribo) bonvolu sendi al T.Loskutova aŭ I.Galicina (vidu la adresojn sube). Aliĝkoto, agenda surloke, varias de 0 (por la aĝo malpli ol 7 jaroj) ĝis 200 rubloj (por la familio kun infanoj). Manĝado estos trifoja tage kun sufiĉe varia menuo. Loĝado – en la 2-, 3- aŭ 10-litaj ĉambroj depende de via monujo. Eblas veni kun la dormosakoj kaj ĝui specialan prezon. En la dispono de la partoprenontoj – varma akvo kaj duŝejo. Laŭ financaj ebloj la organizantoj penos doni rabatojn al partoprenontoj el foraj regionoj de Rusio kaj aktivaj kontribuantoj al la programo. Vi ankaŭ povas trovi aliĝilon por IvERo-3 kaj informon pri ĝi en la paĝo ‘IvERo’ de la TTT ejo <[www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran](http://www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran)>.

Por pliaj informoj kontaktu la organizantojn: **Andreo Obrezkov** (153020 Ivanovo, str.8-ja Sosnevskaĵa 84; tel. (0932) 410909 por ab. 4406; rete <[obran@rambler.ru](mailto:obran@rambler.ru)>); **Irina Galicina** (153009 Ivanovo, str.Kudrjaŝova 82A – 37; tel. (0932) 230116; rete <[irga67@yahoo.com](mailto:irga67@yahoo.com)>); **Tatjana Loskutova** (153013, Ivanovo, pr.Stroitelej 112 – 5; tel. (0932) 265418; rete <[lota@i1.ru](mailto:lota@i1.ru)>). **BONVENON al IvERo-3!**

\*\*\*

Nova **Renkontiĝo de Amikoj** (RA-2) okazos apud Novosibirsko dum lasta semajno de junio 2002. La organizantoj skribas: “Ni volas, ke lernado de Esperanto donacu al vi plezuron kaj plibonigu vian humoron. Por ni Esperanto estas pli ol lingvo. Ĝi estas provoko de kreado, inspiro, io neordinara...”. Unu tagnokto kun trifoja manĝo dum RA kostos proksimume 150 rublojn. Pliajn detalojn eblas ekscii en la retpaĝo <[www.NEKmovado.narod.ru](http://www.NEKmovado.narod.ru)>. Kontaktadreso: 630078 Novosibirsk-78, p/k 107; rete <[ra2@pochtamt.ru](mailto:ra2@pochtamt.ru)>.

La tradicia ĉiujara tendaro **OkSEJT-42** okazos apud Niĵnij Novgorod de la 28-a de julio ĝis la 07-a de aŭgusto 2002. La organizantoj memorigas, ke ĉi-jare ni festos 115-jariĝon de la lingvo Esperanto kaj Rusia E-movado. La ĉefa ideo de la programo estos “Ĉiuj estas diversaj, ĉiu estas unika”. En la programo estas antaŭviditaj multaj konkursoj, kiel ekz. konkursoj de kostumoj “Kristala Sandaleto”, de instruistoj “ABC”, de fotistoj “Postsigno”, de fotoj “Pli ol 5”, de kluba agado “Ronda Tablo”. La bazejo situas en ekologie pura kaj pitoreska loko surborde de la rivero Serjoĝa, je dudekminuta distanco troviĝas la lago Svetloje. Okazos la ekskursoj al Niĵnij Novgorod, Arzamas, Divejevo. Nuntempe la organizantoj dissendas la unuan Informleteron pri OkSEJT-42. Kontakti ilin eblas rete <estro@nifti.unn.ru> aŭ <etulinka@mail.ru>.



\*\*\*

Rusia Esperantista Unio invitas ĉiujn al **Rusiaj Esperanto-Tagoj** (RET-02). La aranĝo okazos 15-25-an de aŭgusto 2002 apud la urbo Kovrov (Vladimira reg.). La ĉefa temo de ĉi-jara RET estos “LA BONA LINGVO”. RET-02 estos destinita por la esperantistoj de ĉiuj aĝoj, la programeroj estos variaj, por ĉies gustoj. Por la prelegoj kaj diskutoj estos invitataj konataj aktivuloj el Rusio kaj aliaj landoj. Jam estas farita interkonsento kun Ĵomart kaj Nataŝa pri ilia partopreno en RET-02. La detalan informilon pri la aranĝo kaj la aliĝilon vi trovos en la sama kovreto kun tiu ĉi REGO.

\*\*\*

Al la tradicia Esperanto-festivalo **“Aroma Jalto-2002”** invitas vin Ukrainia Esperanto-Asocio. Ĝi okazos 01-09.05.2002 en la fama kuraĉloko de Krimeo. Vin atendas plialtigo de lingvonivelo en amika rondo sub kronoj de palmoj, magnolioj, cedroj. Apudas blua Nigra maro, en kiun foj-foje eblos eĉ mergiĝi. Por turistoj okazos ekskursoj kaj piedmarŝoj, unu el kiuj – kun tranokto en montaro. Por saĝuloj estos E-Universitato, intelektaj ludoj, ŝakturniro. En vesperaj distraj aranĝoj vi partoprenos se eltenos mensan kaj fizikan streĉon de la taga programo. Sed por nokta diboĉo restos fajngustuloj, kiuj alte aprezas guston de famaj krimeaj vinoj. Eventualaj prezoj: loĝado en 2-4 litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo – kontraŭ 2 dolaroj diurne; nutrado – memzorge aŭ laŭdezire 3-foja en la sama ripozejo, kontraŭ 3,5 dolaroj tage. La lingva ordo estos tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estos akceptataj. Aliĝkotizo por la rusianoj estas 8 dolaroj. Kontribuantoj al la programo havos rabaton laŭ interkonsento. Kontaktadreso: **Volodimir Viktoroviĉ Hordijenko**, UA-01133, Kijiv-133, p/k 35; tel. (380-44) 2951701; rete <volodimir\_h@hotmail.com>. **BON-VENON!**

\*\*\*

**19-a Internacia Festivalo** okazos 27.12.2002 – 03.01.2003 en Borken-Gemen (Germanio). Internacia Festivalo ofertas specifan programon por mezaĝuloj (dua generacio) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare ĉ. 200 personojn. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas necesaj, sed laŭdezire ni ofertas paroligajn kursojn, ekzemple por via partner(in)o. Ni proponas varian programon, t.e. matene kaj posttagmeze altnivelaj prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj, kursoj, urbaj vizitoj kaj promenoj, vespere folkloro, muziko, koncerto kaj dancoj. Estas apartaj dumtagaj programeroj por infanoj (aĝo-grupoj – 3-7 kaj 8-14 jaroj) sub gvido de fakaj kunlaborantoj, la gepatroj povas do senĝene ĉeesti la prelegojn. Laŭeble infanoj havu lingvajn konojn en Esperanto. Subtrijaruloj estas senkotizaj, sed la gepatroj mem okupiĝas pri ili (manĝo kaj prizorgo). Nia kadra temo: “DIO KAJ LA

MONDO – religioj kaj politiko”. Religiaj tradicioj kaj konvinkoj multmaniere influas politikajn evoluojn kaj decidojn. Aliflanke religioj pligraviĝas en situacio de politika necerteco aŭ politika premo. Kiel funkcias la interrilatoj? Kiun signifon havas religioj en nia moderna mondo? Ĉu religioj taŭgas por solvi politikajn konfliktojn?

Poŝtadreso – **Hans-Dieter PLATZ**; Postfach 1148; D-34303 NIEDENSTEIN. Retpoŝto: <HDP@internacia-festivalo.de>. TTT-paĝo (kie vi povas ankaŭ aliĝi): <<http://www.internacia-festivalo.de>>.

Lasta informo – al 17-a de marto 2002 jam aliĝis 106 personoj el 14 landoj

\*\*\*

**La 75-a Kongreso de SAT** (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos 01-07.07.2002 en Alicante, Hispanio. Dum la kongreso okazos tradiciaj programeroj de SAT-kongresoj kaj vastaj distraĵoj, amuzaj kaj seriozaj programoj. La partoprenantojn atendas ankaŭ interesaj kaj aktualaj prelegoj. Eblos rigardi ankaŭ la ĉirkaŭaĵon partoprenante ekskursojn. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: **Martin Bustin Benito**, Apt. de Correos 4143, ES-03080 Alicante, Hispanio; rete <[marteno@ctv.es](mailto:marteno@ctv.es)>. (*Eventoj*)

\*\*\*

Junulara ekologia ekspedicio **“DNESTRO-2002”** okazos de la 29-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto 2002 en delto de la rivero Dnestro, abunda je birdoj. La bazejo de la Ekspedicio troviĝas en la pitoreska ĉeborda arbaro. Loĝado estos en tendoj po 2 – 4 personoj; eblos ankaŭ loĝado en komforta dometo (ĉambroj po 2 – 3 personoj). Mangaĵoj oni preparos memstare, sur lignofajro. En la ekspedicio partoprenos gvidaj ornitologoj de la Sudo de Ukrainio, profesoroj de biologia fakultato de Odesa Nacia Universitato, Odesa Ekologia Universitato, specialistoj de Odesa Zoologia Ĝardeno. Dum la ekspedicio okazos Ekursoj por komencantoj kaj progresantoj; okazos la seminario “Esperanto kaj ekologia movado en Ukrainio: estinto, estanto, estonto”. La Ekspedicio disponigos ne nur agrablan ripozon en nature, sed ankaŭ observajn kaj esplorajn ekskursojn al netuŝita naturo de Dnestra delto, lecionojn kaj praktikajn studojn pri ornitologio, hidrobiologio, botaniko. Spertaj biologoj-naturalistoj rakontos pri sia natursplora laboro en diversaj kondiĉoj. En libera tempo okazos sportaj kaj ŝercaj konkursoj, vespere – lignofajro, kantado, niaj odesaj intelektaj ludoj. Por aliĝo kaj aldona informo bonvolu turni vin al <[zoo@te.net.ua](mailto:zoo@te.net.ua)>, <[verda99@mail.ru](mailto:verda99@mail.ru)>.

\*\*\*

Vica Rusia Esperantista Kongreso (**REK-22**) okazos en Moskvo 12-16.12.2002.

\*\*\*

Sekva festivalo Esperanto – Lingvo Arta (**EoLA-15**) laŭ decido de REU-Estraro kaj REJM-Komitato okazos en Novosibirsk en 2002.

\*\*\*

Al la unua **BALTA ESPERANTO-FORUMO** invitas “La Ondo de Esperanto”. La aranĝo okazos en Kaliningrad 14-18.07.2002 kiel renkontiĝo kun vasta socia, kultura kaj turisma programo. LA SOCIA PROGRAMO enhavos prelegojn pri la historio, nuntempo kaj estonteco de Kaliningrad kaj ties regiono kaj publikan diskuton al kiu ni invitos diverstendencajn fakulojn. Krome, ni diskutos la rolon de Esperanto en la nuntempa mondo, kun speciala atento al Baltio. LA KULTURA PROGRAMO enhavos interesajn prelegojn, interalie pri Vladimir Varankin kaj ties ĉefverko “Metropoliteno” (Varankin ĉi-jare centjariĝas), pri la kultura gazetaro en Esperanto, pri “Eŭgeno Onegin”... La redakcianoj

de “La Ondo de Esperanto” respondos demandojn de la legantoj. Okazos seminario pri literatura kritiko; funkcios literatura rondo. En BEF estos premiere prezentita la unua volumo de la kvinvoluma verkaro de Fjodor Dostojevskij en Esperanto. LA TURISMA PROGRAMO ebligas konatiĝi kun la urbo kaj ties muzeoj, viziti la banurbojn, kaj simple ripozi ĉe la maro. Funkcios libroservo, foiro de esperantajtoj, fotoekspozicio kaj libera tribunio. Pliaj programeroj estas bonvenaj. Inter la partoprenantoj estos pluraj redakcianoj kaj kunlaborantoj de “La Ondo de Esperanto” kaj “Sezonoj”, interalie: Aleksander Korĵenkov, Halina Gorecka, Alen Kris, Wolfgang Kirschstein, Valentin Melnikov, Vladimir Viĉegjanin, Aleksej Birjulin. Partoprenos ankaŭ litoviaj kaj pollandaj aktivuloj.

La aliĝotizo por rusianoj estas 100 (ĝis la 01.06) aŭ 125 (poste) rubloj; loĝado kostos de 5 ĝis 20 eŭroj tage depende de la hotelo. Pliajn informojn petu ĉe la organizantoj: 236039 Kaliningrad, p/k 1248; tel. (0112) 566033 (ne frumatene); rete <sezonoj@gazinter.net>.

---

## RENKONTIĜOJ KAJ KALENDARO

Tre ofte diversaj E-renkontiĝoj en nia lando estas okazigataj koincide kun la kalendaraj festotagoj, kiam ni havas 3 aŭ eĉ 4 feriojn laŭvice. Tio estas tre oportuna kaj uzebla preskaŭ ĉiam: ja se la festotago(j) koincidas kun sabato-dimanĉo, ni ripozas ankoraŭ lunde kaj iam eĉ marde. Krome, la festperiodo plilongiĝas pro tio, ke antaŭfesta lundo estas kutime interŝanĝata kun sabato, postfesta vendredo – kun dimanĉo. Kaj nur unuopa festotago merkrede restas sola meze de la semajno.

Bedaŭrinde, organizantoj de renkontiĝoj ne ĉiam optimume uzas favoraĵojn de la kalendaro, pro kio la partoprenantoj perdas pli da labortagoj. Ekzemple, la ĉefa pasintjara aranĝo REK-EoLA daŭris 8 tagojn (04-11.03); kompreneble, uzo de iom da laboraj tagoj estis neevitebla. La organizantoj ne antaŭvidis, kvankam tiaĵoj estas regule farataj kelkfoje ĉiujare, transmeton de la ferio 11.03 (dimanĉo) al 09.03 (vendredo); do, laŭ ilia kalkulo en ajna varianto oni havis 4 ripozajn tagojn, oferante 4 laborajn. Sed se ili estus pli sagacaj, la aranĝo povus komenciĝi la 2-an kaj finiĝi la 10-an, tiukaze ni estus produktive uzintaj 5 ripozajn tagojn kaj ŝparus unu laboran.

Ĉar tia neantaŭvidema tempo-planado povas ripetiĝi ankaŭ ĉe aliaj aranĝoj, mi deziras aparte atentigi pri la iom neordinara distribuo de festotagoj ĉi-maje. Ni havos 5 feriojn laŭvice (1-5), poste ankoraŭ 4 (9-12). Vere, la vendredoj 03.05 kaj 10.05 ne estas donacitaj, anstataŭe oni laboros en sabatoj 27.04 kaj 18.05. Kiel ajn, la kalendaro donas neordinarajn eblojn, kaj ankoraŭ estas iom da tempo, por ke renkontiĝemaj E-istoj ne preterlasu la ŝancon!

Laste, mi dezirus preparoli la decidon (pri kiu oni povas legi en la organo de UEA, sed ial ne en tiu de REU) okazigi la 22-an REK de la 12-a ĝis la 16-a de decembro ĉi-jare. Ni havos do 3 ripozajn tagojn (12 – la ŝtata festo, 13 – vendredo anstataŭ dimanĉo, 14 – sabato) kaj poste 2 laborajn. Estas bone, ke la Kongreso finiĝos lunde: ĝis nun kutime la lasta tago de niaj aranĝoj estis dimanĉo, sed ĉar tiutage oni disveturas, la organizantoj ordinare okazigis nur la fermon kaj eventuale ankoraŭ kelkajn hastajn aranĝojn kun degelanta partoprenanto, do la potencialo de dimanĉo estis uzata neplene. Sed rigardu ni la alian flankon: je la festotago la 12-an matene la homoj venos, registriĝos, enloĝiĝos ktp, la seriozaj programeroj ekos nur post tagmanĝo. Do, se ni havas 5-tagan programon por 3-taga feriado, ĉu ne pli bone estus, ke la du neeviteble alprenotaj labortagoj lokiĝu en la periodo simetrie: 1 labortago + 3 ferioj + 1 labortago? Supozeble tamen, tia skemo povus havi ankaŭ minusojn, do dezirindas, ke la legantoj de REGo (estontaj kongresanoj) esprimu siajn opiniojn.

*Viktor Aroloviĉ (Moskvo)*

# Bulteno de REU

## DECIDOJ DE REU-ESTRARO

*faritaj dum la Estrara kunsido en EoLA-14 (Ĉeboksari, 02.03.2002)*

1. Proponi Andrej Liskov kiel ĉefdelegito de UEA en Rusio por la nova trijara periodo (2002-2004).
2. Pro la aktivega partopreno en la organizado de EoLA-14 premii ĉeboksarajn E-kolektivojn JEACR kaj "Ĉielarko" per senpaga membreco en REU por la jaro 2002.
3. Aprobi la proponon okazigi sekvan festivalon EoLA en Novosibirsk.

Pli frue la Estraro decidis per poŝta voĉdono, ke Vladimir Minin ne plu estu reprezentanto de REU en Usono.



*Andrej Liskov*

## ELSTARAJ AGADOJ 2001

Komence de januaro 2002 en kelkaj internaciaj movadaj retlistoj okazis enketado pri la plej elstaraj E-agadoj de la pasinta jaro. Sume en tiuj retlistoj partoprenas pli ol 500 esperantistoj. El ili voĉdonis 17 personoj, tamen el 14 landoj, i.a. Tajvano, Suda Afriko, Malto, Usono kaj pluraj eŭropaj landoj.

Plej multajn voĉojn ricevis:

1. Projekto Indigenaj Dialogoj – 11 voĉoj. (La projekto antaŭvidas instruadon de Esperanto al reprezentantoj de indigenaj nacioj tutmonde, kiuj rezulte povas interkomuniki pere de Interreto en unu komuna lingvo pri komunaj por ili problemoj. Kadre de la projekto jam okazis kelkaj sukcesaj kursoj en diversaj mondopartoj.)

2-3. La movado de lingvaj festivaloj – 8 voĉoj. (Lingva Festivalo estas aranĝo por ĝenerala publiko, kadre de kiu oni rakontas pri diversaj lingvoj de la mondo kaj ties kulturoj. La origina ideo apartenis al usonano Dennis Keefe, kiu efektivigis ĝin en Tours, Francio. Nun la festivaloj okazas en pluraj landoj, kun la plej grava – en Ĉeboksari, Rusio. La internacian movadon rimarkeble helpis disvastigi pasintjara TEJO-seminario "Lingva Ĉielarko" en Budapeŝto.)

2-3. E-Euroscola – 8 voĉoj. (La projekto de ILEI, kadre de kiu infanoj el diversaj landoj de Eŭropa Unio partoprenis interkulturan kunlaborprogramon, kiu inkluzivis kunvenon en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo.)

4. eLibrejo ĉe <Esperanto.nu> – 7. (La lanĉita la 13-an de junio 2001 eLibrejo enhavas centojn da elektronikaj E-libroj; 18 mil kopioj de tiuj estis elŝutitaj de ĝi dum ses sekvaj monatoj.)

5-7. La agado de Kolombia Esperanto-Ligo – 6 voĉoj. (Pro elstare aktiva agado malgraŭ malfacilega politika kaj ekonomia situacio en la lando.)

5-7. Universala Kongreso de Esperanto – 6 voĉoj. (Pro ĝia daŭra signifo por la monda E-movado.)

5-7. La projekto Interkulturo – 6 voĉoj. (La projekto de ILEI enhavas interkulturan konatigon de lernejoj klasoj de la tuta mondo pere de Interreto kaj Esperanto.)

8. E-ŝildoj en Brazila stacidomo – 4 voĉoj. (Nove konstruita busa stacio en Rondonpolis,

Brazilo, ricevis indikilojn en Esperanto sekve de vasta tutmonda subtenkampanjo – venis pli ol 1000 retmesaĝoj el 70 landoj.)

Ĉi-subaj agadoj ricevis po 3 voĉoj: <Edukado.net>, Reformoj en la CO de UEA, TEJO-seminarioj, Retbutiko ĉe <Esperanto.se>, Ŝtatnivela vizito de Osmo Buller al Litovio.

Kaj tiuj ĉi – po 2: “Zamenhofa enketado” en Rusio, UNESKO-kampanjo, Afrika agado.

(*Gazetaraj Komunikoj de UEA, N° 145*)

## **SOCIA KONKURADO AŬ RANGLISTO DE SUKCESO**

### *Iom pri “agada” temperaturo de rusiaj E-organizaĵoj*

#### 1. Individuoj aŭ organizaĵoj: kiu pli socie aktivas por E-to?

Povas esti senlima diskutado, kio pli valoras por E-movado: ĉu individua aktiveco aŭ grupa aktiveco. Necesas klare kompreni ke “AŬ” tute ne taŭgas, ĉiu aktiveco estas bonvena por fari nian E-komunumon pli vigla, pli kapabla, pli sukcesa. Oni klare konsciu, ke nun en “socia kampo” en nia lando agadas multaj sociaj organizaĵoj kaj ĉiuj havas sian “ekologian niĉon”. Ekzistas eĉ iaspeca konkurenco. Ekzemple, se venas socie aktiva novulo al ni, al niaj E-organizaĵoj, KAJ ne trovas por si agadterenon, la homo simple foriras al alia socia aktiveco. Same, se iu E-organizaĵo fuŝis iun aferon, iun socian projekton, facile povas aperi alia, neesperantista organizaĵo kiu povas bone plenumi bezonatan de homoj “socian mendon”. Ŝajne multe pri tio ne necesas paroli. Vi, kara leganto, mem sufiĉe bone scias.

#### 2. Komercaj kaj nekomercaj organizaĵoj – kriterio de sukceso.

Nu por komercaj organizaĵoj sukceso-malsukceso manifestiĝas en profito; en sociaj organizaĵoj “profito” estas “palpebla” tre malfacile. Tamen oni povas iel-tiel taksii, ĉu iu organizaĵo estas sukcesa aŭ ĝi travivas ne tre bonan periodon de sia vivo, se ĝenerale ne degeneras. Tiam aperas natura intereso KIOM sukcesa estas tiu aŭ alia organizaĵo inter similaj organizaĵoj. En Rusio ankoraŭ ne estas tre evoluinta la tiel nomata “3-a sektoro” – neregistaraj sociaj organizaĵoj (NRO), tamen teorio kaj praktiko de funkciado de NRO pli kaj pli iĝas konata en Rusio. Laŭ tiuj scioj, eblas taksii socian sukceson de organizaĵoj eĉ en kvanta formo.

#### 3. Ĉu kvantaj kriterioj povas esti objektivaj?

Certe, jes kaj ne. Iom paradokse, sed necesas klare kompreni la specifecon de “varoj” de sociaj organizaĵoj, ĝian subjektivecon. Kiel fari pli objektivajn kvantajn taksojn? Por tio ili baziĝu sur:

- malfermiteco kaj klareco de kriterioj;
- akurateco de respondoj de la organizaĵoj mem;
- intereso de la organizaĵoj mem pri “socia konkurado”.

#### 4. Kiu povas esti interesita pri la ranglisto?

Tutcerte la E-organizaĵoj mem. Ankaŭ REU-Estraro. Sed la rolo de REU-Estraro estas aparta. Interesita pri disvolvo de E-aktiveco, REU-Estraro ellaboras kriteriojn laŭ kiuj estas taksataj socia aktiveco de E-kolektivoj. (Cetere, impostoj estas subjektive starigataj – tio estas intereso de la ŝtato subteni interesojn de la ŝtato mem kaj de varproduktantoj. Kompreneble, tio estas rezulto de akra batalo inter interesitaj grupoj.) Ĉefaj direktoj:

- Instruado de Esperanto
- Popularigo de E-to kiel socia fenomeno inter loĝantaro
- Organizado de E-aranĝoj
- Interna vivo de E-organizaĵoj



Plena listo estas publikigita en REGo № 3(5), p.17.

#### 5. Kriteriaro kiel ilo por sukcesigo.

Kompreneble, nura kvanta konkurado donas nenion por vera sukceso de E-organizaĵoj, por alĝo de “agada temperaturo”, sed kiel unu el rimedoj povas esti. Mi, kiel komisiito de REU pri la kluba ranglisto, petas Esperanto-kolektivojn regule sendi la informojn pri sia agado laŭ la retadreso <gecxjo@land.ru> kun la temlinio “kluba ranglisto” kaj paperpoŝte – al la adreso de REU (vidu en la 3-a kovrilpaĝo).

Mi supozas, ke regula informado, ekz. en ĉiu dua numero de REGo kaj fine de jaro, pri agadaktiveco estos interesa por ĉiuj.

*Gennadij Basov (Moskvo)*

### **Projekto**

## **REGULARO DE LA KLUBA RANGLISTO**

### 1. Ĉefaj principoj

- 1.1. Celo de la *Kluba Ranglisto* (plie – *RoKo*) estas objektivigi poresperantan agadon de rusiaj E-klubo.
- 1.2. Kurantaj kaj finaj rezultoj de *RoKo* estas regule kolektataj de la *REU-Komisiito pri RoKo* (plue – la *Komisiito*) kaj regule publikigataj en E-periodaĵoj.
- 1.3. Ĉiu klubo estas mem interesita disponigi akuratan detalan raporton pri sia agado al la *Komisiito*.
- 1.4. La kluba Estraro respondecas pri ĝusteco kaj vereco de ĉiuj donitaĵoj en la raporto.
- 1.5. Ĉiujn diskutajn demandojn solvas REU-Estraro .

### 2. Principoj de la poentado

- 2.1. La laboron de poentado faras la *Komisiito*, kiu mem aktive kolektas informojn pri E-agado de koncernaj kluboj kaj rezulte informas koncernajn klubojn pri la akiritaj informoj kun celo pli objektive kaj plene respeguli ties agadon.
- 2.2. La poentado estas farata laŭ jenaj ĉefaj direktoj:
  - a) organiza aktivado
  - b) instruado diversnivela
  - c) pormovada aktivado
  - ĉ) porekster aktivado
  - d) enkluba laboro(Detala poentaro por 2002 estas en Suplemento.)
- 2.3. REU-Estraro povas difini aliajn direktojn.

### 3. Devoj kaj rajtoj de la *REU-Komisiito pri RoKo*

- 3.1. La *Komisiito* en konsultaj rilatoj kun REU-Estraro estas membro de *REU-Komisiono pri Kluba Ranglisto*. La *Komisiito* estas nomumata de REU-Estraro por kuranta jaro, pri kio aperas informoj en REU-dokumentaroj kaj en E-periodaĵoj.
- 3.2. La *Komisiito* devas regule kontakti kun plej ebla multo de la kluboj, aliĝintaj al REU aŭ ne.
- 3.3. La *Komisiito* devas akurate kalkuli poentojn laŭ disponigitaj kaj akiritaj informoj pri E-aktivado de kluboj;
- 3.4. La *Komisiito* devas plej ofte publikigi kompletigojn al *RoKo* – ne malpli ol 3 fojojn dum jaro.
- 3.5. Decembre la *Komisiito* devas pretigi kompletan definitivan *RoKo-n*, kiu devas esti publike anoncita dum Rusia Esperantista Kongreso (REK), aliaj E-aranĝoj kaj en E-periodaĵoj.

- 3.6. La *Komisiito* rajtas kaj devas rekte komunikadi kun landaj E-kluboĵ.
- 3.7. La *Komisiito* rajtas peti detaligi, precizigi tiun aŭ alian agadunuon de la koncerna klubo.
- 3.8. La *Komisiito* rajtas nuligi tiun aŭ alian dubindan agadunuon kun detala klarigo al la Estraro de la klubo kaj paralele – al REU-Estraro.
- 3.9. Ĉiujn plendojn solvas REU-Estraro.

## SUPLEMENTO: LA BAZA POENTA SISTEMO

### 1. Organiza aktivado

- 1.1. Aliĝinta al REU, REJM – 10
  - 1.1.1. Por ĉiu kotizinta membro de REU, REJM – +1/membro
- 1.2. Por postenigita membro de klubo en landa organizo – +5/m
- 1.3. Por delegito de UEA – +3/m
- 1.4. Por individua membreco en UEA – +2/m
- 1.5. Jure registrita – +10

### 2. Instruado diversnivela de E-o

- 2.1. Por ĉiu E-kurso – 5
  - 2.1.1. Por ĉiu kursfininto – +2/p
- 2.2. Por ĉiu plenuminto de ĈALK-ekzameno:
  - 2.2.1. A – +2/p
  - 2.2.2. B – +10/p
  - 2.2.3. C – +20/p
- 2.3. Havas E-instruiston
  - 2.3.1. neatestitan – 30
  - 2.3.2. atestitan – 25

### 3. Pormovadaj aranĝoj

- 3.1. Organizis E-aranĝon kun partopreno de aliurbanoj
  - 3.1.1. malpli ol 10 – 20  
malpli ol 30 – 30  
malpli ol 50 – 50  
pli ol 50 – 100
- 3.2. Loka seminario/aranĝo – 20

### 4. Porekstera agado

- 4.1. Publikigo de artikolo en / elpaŝo en
  - 4.1.1. centra amaskomunikilo – 50
  - 4.1.2. regiona amaskomunikilo – 30
  - 4.1.3. loka amaskomunikilo – 10
- 4.2. La klubo estas organizanto de
  - 4.2.1. tuturba aranĝo (LF ks) – 100
  - 4.2.2. koncerto, elpaŝo kolektiva – 50
  - 4.2.3. prelegoj, ekspozicio – 20
- 4.3. Partoprenis en urba aranĝo kun mencio pri E-o – 10
- 4.4. Kunlaboras en urbaj instancoj – 20  
(organizaĵoj ce urbestrejo, komisionoj de urbestraj fakoj, same – regionaj instancoj)

### 5. Enkluba laboro

- 5.1. La klubo kunvenas
  - 5.1.1. ĉiusemajne – 20

Laboristo demandas sian estron:  
 – Kio estas kritiko de supre, kaj  
 kio – kritiko de sube?  
 – Pli bone mi demonstros al vi  
 tion per ekzemplo.  
 La estro ekstaris sur la balkono  
 kaj ordonis al la laboristo stari  
 sube.  
 Poste li kraĉis kaj trafis la kapon  
 de la laboristo.  
 – Jen tio estas kritiko de supre,  
 kaj nun vi kraĉu!  
 La laboristo kraĉis kaj trafis  
 sian kapon.  
 La estro:  
 – Kaj jen tio – kritiko de sube!  
*(esperanto-anekdoto)*

- 5.1.2. 2-3-foje monate – 10
- 5.1.3. malpli ofte – 5
- 5.2. Partopreno en E-aranĝoj – 2/membro
- 5.3. Eldonas kluban ĵurnalon – 20
- 5.4. Havas aktualigatan 2-3-foje jare retpaĝon – 15
- 5.5. Kunlaboris por aliurba E-aranĝo – 20
- 5.6. Partoprenis en LONo aŭ BeLego:
  - 5.6.1. 1-a loko – 20
  - 5.6.2. 2-a loko – 10
  - 5.6.3. 3-a loko – 5
  - 5.6.4. partopreno – 1/m
- 5.7. Artikolo de klubano en
  - 5.7.1. landa periodaĵo – 10
  - 5.7.2. internacia periodaĵo – 20
  - 5.7.3. reta informejo – 2
- 5.8. Adreso de klubano en PS – 2
- 5.9. Eksterlanda gasto
  - 5.9.1. akcepto – 5
  - 5.9.2. helpo – 2

Kio estas tutmondiĝo? Ĝi estas ekzemple, kiam angla princino kun sia egipta amoranto en germana aŭto kun belga motoro, stirata de irlanda ŝoforo, ebria pro skota viskio, persekutataj de italaj paparacoj kun japanaj fotiloj, averias en franca tunelo, kaj poste usona kuracisto helpe de brazilaj kaj hindaj kuraciloj provas ŝin savi, tamen ŝi mortas – kaj pri ĉio ĉi rakontas rusa ĵurnalo.

- 6. Aparta aktivado laŭ aparta decido de REU-Estrararo kun vasta diskonigo de motivoj – 1-200

## FOLIUMANTE LA JARLIBRON: UNIO MALREKOMENDAS UNION?

Antaŭnelonge REU-anoj ricevis plaĉaspektan verdan broŝuron – “Jarlibro de REU 2001/2002”. Certe, la Jarlibro ne estas tiom informriĉa kiel tiu de UEA, sed ĝi enhavas plurajn erojn, valorajn kaj bezonatajn al niaj membroj kaj precipe aktivuloj. Iuj el tiuj materialoj estas rutinaj, troveblaj ankaŭ en la antaŭaj Jarlibr(et)oj, sed plimulto aperas unuafoje.

Se kompari kun la Jarlibro-2000, rimarkeblas ke la nuna eldono draste ŝanĝiĝis: de la antaŭa versio restis nur la listo de estraranoj kaj aliaj funkciuloj (certe, kun la nova persona konsisto). Ĉio alia: kopio de la registra atesto, la Statuto kaj la plej gravaj Regularoj, la programoj de ĈALK – estas nun akumulitaj en aparta eldono: “Manlibro de la REU-membro”, en kiu aldoniĝis krome la E-traduko de la Statuto kaj ankoraŭ kelkaj Regularoj. Kial la Estraro disigis la materialojn, supozeble ne por ĉiuj estas klare, ja ambaŭ broŝuroj malhavas eĉ etan antaŭparolon – kaj tio bedaŭrindas, ĉar inter la ricevantoj sendube estas novuloj, por kiuj utilis ioma inico.

Tamen ni daŭrigu la komparadon. Pli amplekse estas prezentitaj la REU-funkciuloj: aldoniĝis regionaj kunordigantoj kaj lokaj reprezentantoj. Laŭdindas la listoj de individuaj membroj (inkluzive la dumvivajn kaj la familiajn) kaj de aliĝintaj kolektivoj de REU, kaj aparte – “Kontaktadreso”. Iom strange impresis min la subtitolo “Eksterestraraj Komisiitoj”: ĝi ja supozigas, ke ekzistas ankaŭ Komisiitoj-estraranoj, sed rekta indiko pri tio en la listo de estraranoj ne troveblas, samkiel ĝenerale distribuo de respondecoj inter la estraranoj – tre grava manko, paŝo malantaŭen kompare kun la pasintjara Jarlibro. Pli konsekvence estus aperigi liston de ĉiuj komisiitoj, sendepende de (ne)aparteno al la Estraro, kaj por estraranoj en ĝi eblus anstataŭ la adreso doni referencon al la Estrara listo. Sed nun nur post kelkaj paĝoj, renkontante ĉe la Libroserva katalogo la adreson de Jurij Karcev, oni konjektas, ke ĝuste li estas Komisiito pri la Libroservo – tamen pri eventualaj aliaj estraranoj-Komisiitoj la Jarlibro silentas...

Sendube, la enhavo de la Jarlibro iĝis multe pli varia. Estas tre utile, ke ni povas trovi en ĝi kronologion de la landa movado, liston de aboneblaj periodaĵoj, bazan informon pri

REJM, materialojn de Irina Gončarova (konkursaj regularoj, informo pri ILEI-sekcio).

Aparte valora estas la kontribuado de Nikolao Gudskov “Ĉu kaj kiel registri vian klubon?”, en kiu li formulis plurajn gravajn ĉi-koncernajn sugestojn, ĉerpitajn el la sperto de REU kaj aliaj sociaj organizaĵoj. Aperigo de tia teksto vere laŭdindas, ja REU dum sia jam pli ol 10-jara ekzisto antaŭe ne atentis la demandojn pri jura stato de siaj kluboj. Do nun la kluboj, interesiĝantaj pri tio, ricevis nemalhaveblan helpilon.

Mi tamen atentigu, ke la subtitolo “Metodikaj rekomendoj” ne kongruas kun la teksto. Ĝenerale “metodikaj rekomendoj” estas certa ĝenro de scienc-instruaj tekstoj, apartenanta al tiel nomata afera prozo, kies ĝenerala stilo pli proksimas al tiu de diversaj reguloj kaj instrukcioj, ol al la neformale-publicistika prezentmaniero de Gudskov, inkluzivanta ekz. rezonadon pri tio, kion fari se oficialuloj “diras stultaĵojn”. La lasta esprimo ne ornamas tekston, prezentatan nome de la Estraro kaj do pretendantan je certa nivelo de oficialeco; ĉe eventuala reeldono eble indus forigi tiaĵojn. Ĉu plene reverki la tekston pli rigorstile? – nu, pri tio mi ne alvokas, sed estus bone ŝanĝi la subtitolon al ekz. “Praktikaj konsiloj”: tio pli konvenus kaj stile kaj enhave.

Ankoraŭ unu tiutekstan eron mi ŝatus analizi pli detale. Estas tre dubinda la frazo: “Nepre ne nomu vian organizon “asocio” aŭ “unio”, ĉar tio kontraŭas al la leĝo: asocioj kaj unioj estas, laŭ la leĝo, nur federacioj de juraj personoj!”. Kredeble, la menciita leĝo estas la Federacia leĝo “Pri sociaj unuiĝoj”. Estas interese, ke en aliaj lokoj, kie N.Gudskov referencas ĝin, li citas koncernajn artikolojn (pri la rajto funkcii sen oficiala registro, pri postuloj al la Statuto), sed ĉi tie – ne. Kaj tio ne estas hazarda, ĉar la asertata de li limigo en la Federacia leĝo ne ekzistas, pri kio ĉiu povas konvinkiĝi, rigardante ties plenan tekston, troveblan en librovendejoj, bibliotekoj kaj laŭ la retadreso <[http://www.smanagement.ru/fz\\_oo.htm](http://www.smanagement.ru/fz_oo.htm)>.

La artikolo de la leĝo, el kiu povus fonto la citita aserto, estas la 13-a\* (aŭ art. 121 de la Civila Kodo, kun simila vortumo), kiun la estimata estrarano bedaŭrinde misinterpretis; la energia krisigno fine de lia frazo ne faras ĝin pli vera. Unue, la artikolo permesas federaciigi al ajnaj sociaj unuiĝoj, ne postulante ke ili nepre estu juraj personoj. Due, kaj ĉefe: *esti* unio (asocio) laŭ kvalifiko de la 13-a artikolo, kaj *nomiĝi* unio aŭ asocio – estas aferoj diversaj, la artikolo ne preskribas ke ili koincidu.

Ke organizaĵo povas ne esti unio (asocio) laŭ la 13-a artikolo, sed havi la vorton “unio” aŭ “asocio” en sia nomo – plej elokvente pravas la ekzemplo de nia organizaĵo mem – Rusia Esperantista *Unio*. Kolego Gudskov scias ne malpli bone ol mi, ĉar siatempе ĝuste ni duope ĉefrolis en la longa epopeo pri la oficialigo de nia Statuto, ke oni tiam prezentis al ni tre diversajn kondiĉojn kaj insistojn flanke de la Ministerio, sed neniu el ties funkciuloj postulis pruvi, ke REU estas federacio de juraj personoj, aŭ proponis ke manke de tia pruvo REU ŝanĝu la nomon. Sed en la Jarlibro li estigas amuzan paradokson: la Estraro de la organizaĵo, mem nomata Unio, rekomendas, ke aliaj tamen evitu tiun vorton en sia nomo.

Laŭ la sperto de traktado kun oficialuloj pri la Statuto mi konkludis, ke ĝenerale ekzistas

---

\* **Статья 13. Союзы (ассоциации) общественных объединений**

Общественные объединения независимо от их организационно-правовой формы вправе создавать союзы (ассоциации) общественных объединений на основе учредительных договоров и (или) уставов, принятых союзами (ассоциациями), образуя новые общественные объединения. Правоспособность союзов (ассоциаций) общественных объединений как юридических лиц возникает с момента их государственной регистрации.

Создание, деятельность, реорганизация и (или) ликвидация союзов (ассоциаций) общественных объединений, в том числе с участием иностранных некоммерческих неправительственных объединений, осуществляются в порядке, предусмотренном настоящим Федеральным законом.

pli-malpli tri tavoloĵ da limigoj kaj pretendoj, kiujn oni devas superi: (1) tio, kio estas skribita en la Federacia leĝo mem; (2) aldonaj ministeriaj instrukcioj: temas pri kondiĉoj, rekte en la leĝo ne menciitaj, sed formulataj de diversaj funkciuloj unuece; (3) arbitraj interpretoj de la leĝo fare de unuopaj oficistoj, kies kapricoj povas de foĵo al foĵo tre vari, depende de tio, al kiu konkrete oni trafas dum la vica vizito. Kaj estas triste, ke al ĉio ĉi aldoniĝis kvara tavolo – malrekomendo, formulita ne en instancoj, sed en nia Estraro.

La vortoj “asocio” kaj “unio” estas vastasencaj, el pure lingva vidpunkto ili povas signifi unuiĝojn ĉu de individuoj, ĉu de organizaĵoj, ĉu miksitajn (kiel REU). Do se via loka E-ista unuiĝo ŝatus havi iun aŭ alian el la du vortoj en sia nomo – ne rezignu tuj, sed provu. Certe estas risko, ke oni al vi rifuzos, rezonante simile al Nikolao Gudskov; eĉ estas tute eble, ke ekzistas negativaj precedentoj. Sed sciui tiukaze, ke la rifuzo estas bazita ne sur la leĝo mem, sed sur ĝia nekorekta interpreto, kaj vi rajtos insisti pri la elektita de vi nomo, eventuale eĉ en juĝejo.

*Viktor Aroloviĉ (Moskvo)*

## **KIEL PETI SUBVENCIOJN DE UEA?**

La Estraro de UEA kaj la Centra Oficejo regule ricevas petojn pri subtenado de diversaj E-projektoj. Ofte tiuj petoj estas subtenindaj kaj subtenataj, sed eĉ pli ofte evidentiĝas, ke la subvencipetantoj ne klare imagas la renkontajn postulojn de UEA. Tial dum la januara kunido de la Estraro estis akceptita regularo “Kriterioj kaj procedo por elekto de finance subtenotaj projektoj”. Ĝi rilatas al ĉiuj projektoj, en kiuj la kontribuo de UEA devus superi 500 eŭrojn.

La unua kriterio por la subteno de iu projekto estas ĝia deklarita utileco por E-movado. Oni krome notas prioritatecon de projektoj, en kiuj la subvencipetantoj mem finance partoprenas. En la procedo elstaras postulo, ke la subvenciotra projekto estu prezentita al UEA ses monatojn antaŭ la komenciĝo. Oni firme anoncas, ke jam komenciĝintaj sen antaŭa interkonsento projektoj ne estos traktataj.

La plena teksto de la regularo troveblas en la parto “Dokumentoj” de la retejo <[www.uea.org](http://www.uea.org)> aŭ estas petebla de Ans Bakker <[ans.bakker@esperanto.org](mailto:ans.bakker@esperanto.org)>, la estrarano de UEA pri financoj.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 145)*

## **EKZAMENOJ DE ĈALK EN 2001**

Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU informas pri la C- kaj B-nivelaj ekzamenoj, okazintaj en 2001. Pri la supera (C-nivela) ekzameno, instrurajtiga por ĉiunivelaj kursoj, sukcesis kun la poento “bone” Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg). Pri la B-nivela ekzameno, instrurajtiga por elementaj kursoj, sukcesis Bronislav Ĉupin (Ijevsk) kun la poento “perfekte”, Oleg Izjumenko (Volgodonsk), Olĵa Kiseljova (Jaroslavlj), Sergej Paĥomov (Kirov), Vladimir Perepelica (Koroljov), Nina Zueva (Jelec) – ĉiuj kun la poento “bone”.

*Nikolao Gudskov, prezidanto de ĈALK (Moskvo)*

## **NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2002**

### **DUMVIVA MEMBRO**

Belov Aleksandr (Tiĥvin)

### **ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ**

Ĉeboksara E-klubo “Ĉielarko” (10 membroj, la listo dume mankas)

Ivanova E-klubo (13 membroj: Brovceva Svetlana, Brovceva Tatjana, Galicina Irina,

Galicin Denis, Kurnosov Aleksandr, Kurnosova Galina, Loskutova Maja, Loskutova Tatjana, Malej Ljubovj, Malej Tatjana, Obrezkov Andrej, Obrezkova Jelena, Vernigora Dmitriij)

Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (13 membroj: Burmisova Jekaterina, Ĥaritonova Ljubovj, Ĥaritonova Nadjeĵda, Ivannikova Olĵga, Ivanova Anastasija, Kapitonov Danil, Korĉagin Pavel, Maksimova Ljudmila, Matveeva Jekaterina, Nosov Viktor, Prokopjeva Marina, Tiĥonov Sergej, Tumaŝkov Andrej)

Moskva E-klubo “MASI-FaRo” (+20 novaj membroj: Basov Gennadij, Bebenina Jekaterina, Beŝastnov Aleksej, Boĉkarjov Igorj, Budinovskaja Jelena, Dadaev Oleg, Gurskaja Julija, Ismailova Ljudmila, Jegorova Marija, Jolkin Vladimir, Kudrjaŝova Alla, Malenko Vitalij, Marutenkov Pavel, Morozova Jelena, Sergejev Vladimir, Sidorova Valentina, Soboleva Olesja, Storoĵenko Olĵga, Terjoĥina Marija, Zatulov Sergej)

Tiĥvina E-klubo (16 membroj: Baraŝkov Vasilij, Belov Aleksandr, Bronŝtejn Mikaelo, Ĵuravljova Jelena, Kaĉalova Zoja, Kaĉalova Marija, Kandalinskaja Vera, Kandalinskij Viktor, Krolus Tamara, Litvinova Julija, Lojkina Jelena, Rajskaĵa Natalja, Rajskij Vladislav, Selivanova Tatjana, Selivanova Larisa, Vlasova Vera)

Vladivostoka E-klubo “Pacifiko” (10 membroj, la listo dume mankas)

Volgograda E-klubo (11 membroj: Bikova Ljudmila, Dumler Vera, Gurileva Dina, Jarmuljŝkaja Irina, Lomovickaja Olĵga, Miĥajlov Aleksandr, Miĥajlova Nadeĵda, Miĥajlova Polina, Sokolov Miĥail, Volkova Anastasija, Vtorova Tatjana)

Aperis tt-t-ejo de Volgograda Esperantista Junulara Centro (VEJC) “Stelaro”! Bonvolu viziti ĝin: <<http://www.stelaro.by.ru>>.

### **INDIVIDUAJ MEMBROJ**

Aristova Jelena (Moskvo), Basov Gennadij (Tomsk-Moskvo), Beznosko Sergej (Ĉeboksari), Blinov Aleksandr (Ĉeboksari), Bronŝtejn Mikaelo (Tiĥvin), Burgar Lilija (Rostova reg.), Ĉupin Bronislav (Iĵevsk), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Dolmatova Darja (Jelec), Edelŝtejn Vladimir (Moskvo), Gajvoronskaja Valentina (Rostova reg.), Galkin Aleksandr (Kazanĵ), Gazizov Gafurĵan (Salavat), Indeev Oleg (Kazanĵ), Jaroŝenko Jelena (Rostova reg.), Jusupova Marina (Dimitrovgrad), Kabanceva Alevtina (Moskvo), Kandalinskij Viktor (Tiĥvin), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Lisova Viktorija (Sankt-Peterburg), Lobanov Ivan (Tula reg.), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Markon Aleksandr (Moskvo), Naumov Ivan (Moskvo), Neĉaev Nikolaj (Irkutsk), Odincov Aleksej (Permĵ), Osokin Aleksandr (Sankt-Peterburg), Privalov Vitalij (Kostroma), Saljkova Galina (Jelec), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg), Vasilenko Lidija (Moskvo)

### **FAMILIAJ MEMBROJ**

Mironova Irina (Moskvo), Privalova Olĵga (Kostroma),

#### **REU-kotizoj por la jaro 2002:**

100 rub. (por eksterrusianoj – 15 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-araĝoj);

2500 rub. – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);

20 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco);

100 rub. + 20 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, la membrokartoj kaj voĉdonrajtoj en REU-Konferenco por la klubanoj).

*La rublaj kotizoj sendendas al **G.Kokolija** (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.*



# REJM-info

*redaktas Vitalij Malenko*

*Saluton, karaj legantoj! Bedaŭrinde ĉi numero de REJM-info estos pli kurta ol mi intencis antaŭe. Por la pasinta EoLA estis planita REJM-konferenco, kiu pro diversaj kialoj ne okazis. La ĉefa kialo laŭ mi estis manko de entuziasmo ĉe junaj aktivaj movadanoj, eĉ manko de tiuj movadanoj entute. Sed por ne perdi junularan E-movadon en Rusio ni devas pensi pri estonteco kaj sekve la situacio nuna estos ŝanĝita. Por majo estas planita trejnseminario por junaj aktivuloj el diversaj turboj. Kiel rezulton de ĉi seminario oni planas kreadon de aktiva teamo de junaj movadanoj, kiu sukcese laboros en la sekva jaro, kaj inter la unuaj paŝoj estos OkSEJT-42, freŝan informon pri kiu vi povas trovi jam en ĉi numero de REGO.*

*Via Vitalik Malenko (REJM-komisiito pri OkSEJT)*

## REJM DUM LA JAROJ 2001-2002

REJM-komitato, kiu funkciis ĝis la marto 2002, estis elektita dum la konferenco en Serovo (REK-EoLA) en marto 2001 kaj konsistis dekomence el 7 komitatanoj: Nataŝa Grigorjevskaĵa, Slavik Ivanov, Julinka Litvinova, Ĵenja Ŝlikanova, Sonĵa Ŝejnina, Ljoŝa Kuznecov, Nataŝa Nazariĉeva. Post kelkaj monatoj N.Nazariĉeva petis demision, kaj ŝian taskon (pri instruado) brile plenumis REJM-volontulo Oleg Izjumenko (geografio de instruado).

Ĉefaj direktoj de la agado por REJM estas aranĝoj, kiel OkSEJT (en Kovrov, Vladimiria regiono) kaj EoLA (Ĉeboksari), trejnaj seminarioj por aktivuloj (ATS). Okazas preparado de OkSEJT en Niĵnij-Novgoroda regiono (28.07-07.08.2002). Krome REJM partoprenis en kunorganizado de REK (decembro 2001, Kostroma), surbendigo de muzikaj KD "Oraj kantoj", produktado de du diskoj kun la kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa, faris propran diskon "Esperanto-XXI". La junularo ĉiam strebis estis aktiva en la reto kaj laboris en kelkaj direktoj: distanca E-instruado, E-lingva informado, aktivigo de novaj retaj projektoj, subteno de la jam ekzistantaj (ruslingva informilo "Novosti Esperanto-dvijenija"). En seminario Esperanto@Interreto (Svedio, oktobro-novembro 2001) partoprenis kelkaj REJM-aktivuloj, dum REK estis organizita simila seminario por rusoj. Estis lanĉita la diskuto "KLUB'?OK!", ĝia celo: interŝanĝi kluban sperton. Kelkaj junularaj kluboj eldiris la deziron iĝi kolektivaj membroj de REJM – sed tion devas decidi REJM-konferenco, kiu ne okazis dum EoLA en Ĉeboksari, kaj sekve nun ne ekzistas iu ajn komitato (laŭ REJM-statuto ĉiuj postenoj validas dum unu jaro). Certe ne ĉio, kion ni esperis fari estis plenumita, sed ĉiukaze mi ŝatus danki ĉiujn, kiuj aktivis dum pasinta jaro kaj volas alvoki aktivaj pli aktive!

Kiun vojon elektos REJM en nova jaro – ni ĉiuj decidu kune! Sukcesojn!

*Natalĵa Grigorjevskaĵa, REJM-prezidanto (Ŝumerlĵa)*

## TEJO-SEMINARIO ESPERANTO@INTERRETO-2002

**La temo "Rete Lingvumi".**

**La datoj: 28.04-5.05.2002**

**Laborlingvoj: Esperanto kaj la angla.**

Esperanto estas facile lernebla lingvo taŭga por internacia komunikado. Interreto estas facile uzebla ilo ankaŭ taŭga por internacia komunikado. Pri ĉi tiuj du interesaj aferoj TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) aranĝas seminariojn. En 2000 kaj 2001 okazis

du inspirigaj E@I-seminarioj kun la partoprenantoj ĉefe el ĉebaltaj landoj. La venonta E@I-seminario okazos en Balkanio. Tiu regiono, ĝis antaŭ nelonge izolita, nun malfermiĝas al la mondo pli kaj pli, kaj la seminario provos helpi tiun procezon utiligante eblojn de kaj Esperanto kaj Interreto. La seminario celos trejni gejunulojn el Balkanio kaj najbaraj landoj pri diversaj interret-teknikoj, kaj aparte traktos eblecojn kaj problemojn de reta lingvolernado kaj instruado. La seminario okazos en la urbo Ĉaĉak, Jugoslavio. La partoprenantoj loĝos en mezlernejana komunloĝejo en la urbocentro kaj uzos komputilejon kun konstanta retaliro, sportejon kaj klasĉambrojn de la urba gimnazio.

En la programo antaŭtagmeze okazos kurso pri Esperanto por komencantoj kaj komencintoj, dum por la aliaj samtempe estos prelegoj kaj diskutoj pri lingvoinstruado ĝenerale kaj speciale pri uzado de komputiloj en lingvoinstruado. Posttagmeze eblos lerni pri interretaj teknikoj kaj kiel utiligi ilin en internaciaj kunlaboroj. Ekzemploj de tiuj programeroj estas: interretaj komunikiloj (ICQ, IRC, MSN, Yahoogroups), helpprogramoj (FTP, ZIP, UniRed) kaj kreado kaj planado de hejmpaĝoj (XHTML, Viki-Viki, aspektigado). Vespere la partoprenantoj povos konatiĝi kun diversaj kulturoj kaj kun la Esperanto-movado.

Spertaj prelegantoj instruos dum la seminario: Bertilo Wennergren (Germanio/Svedio), Clayton Smith (Kanado), Ralf Frolich (Germanio/Svedio), Radojica Petrovic (Jugoslavio), Henning von Rosen (Svedio) kaj la organiza teamo.

Atendatas entute 30 partoprenantoj de espereble ĉiuj balkanaj landoj kaj de kelkaj aliaj eŭropaj landoj. La kotizo estos 20 eŭrojn. Trajnajn kaj busajn vojaĝojn en Balkanio repagiĝos ĝis 100 eŭroj. Flugvojaĝoj por eksterbalkananoj repagiĝas ĝis 300 eŭroj.

Organizantoj: Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Serba Esperanto-Junulara Organizo (SerBEJO), Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Balkana Komisiono de UEA.

La organiza teamo: Sonja Petroviĉ (Jugoslavio) <sonja@tejo.org>, Tomislav Divjak (Kroatio), Lovisa Gustafson (Svedio), Nastja Kojevnikova (Rusio) <nastja@ikso.net> kaj Hohan Lundberg (Svedio) <hokan@ikso.net>.

Ĉe la retadreso <[http://www.tejo.org/seminarioj/echei2002\\_jug.jsp](http://www.tejo.org/seminarioj/echei2002_jug.jsp)> (en Esperanto) kaj <[www.tejo.org/angla/echei](http://www.tejo.org/angla/echei)> (en la angla) vi povas ricevi pliajn informojn pri la seminario kaj aliĝi.

## NOVA INICIATO

Komitatante en REJM pri interkluba agado, mi invitas vin partopreni en unu entrepreno, dediĉita al kluba vivo. Ĝi estos daŭrigo de konata “Kluba forumo” (Oĉjo Dadaev). La celo estas: interŝanĝi sperton, vidi sukcesojn en aliaj E-klubo kaj provi plibonigi, pliinteresiĝi propran kluban vivon.

Mi proponas al vi jenan skemon:

- mi elektas temon (aŭ vi proponu la vian);
- dissendas respektivajn demandojn al certaj spertuloj aŭ klubgvidantoj (nome al vi);
- kolektas la respondojn kaj publikas la rezultojn.

La temoj: • paroligaj ludoj • temoj/kialoj por klub-kunvenoj • inter-kluba kunlaboro • aktiveco por/de novuloj • reklamado de kursoj • klubaj festoj • informado pri Esperanto • instrumetodoj • <VIA TEMO>.

Post prilaboro estas planata eldoni la rezultojn por aktivuloj.

Kruko: “Kial makaronioj havas truon interne?”

Baniko: “Ĉar neniu ĝis nun sukcesis meti la truon ekstere.”  
(esperanto-anekdoto)

*Aleksej Kuznecov* <[ka2pink@iname.com](mailto:ka2pink@iname.com)>  
(156008, Kostroma, 1-j Sosnovij projezd 25 – 51)

## LA LISTO DE REJM-MEMBROJ

*kiuj pagis la kotizon por 2002*

1. Jevgenij Deljcov (Irkutsk)
2. Alla Fridman (Belorusio)
3. Natalja Grigorjevskaja (Ŝumerlja)
4. Oljga Grigorjevskaja (Ĉeboksari)
5. Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburg)
6. Jevgenija Ĵuravljova (Ĉeboksari)
7. Jelena Maslova (Uljanovsk)
8. Aleksandra Sudakova (Dimitrovgrad)
9. Konstantin Viĥrov (Ĉeboksari)

### *patronoj:*

10. Baard Hekland (Norvegio)
11. Georgij Kokolija (Moskvo)

## REJM-KOTIZOJ POR LA JARO 2002

**80 rub. – individua kotizo** (inkluzivas la insignon, REGon, aliajn informojn, eblecon partopreni en REJM-seminarioj, voĉdonrajton dum REJM-konferenco, rabatojn dum E-aranĝoj kaj ĉe uzo de servoj de REJM);

**30 rub. – la samo sen REGo;**

**15 eŭroj – por eksterlandanoj;**

**ne malpli ol 200 rub. – patrona kotizo.**

La rublajn kotizojn sendu poŝte al la financisto de REJM-komitato Ĵuravljova Jevgenija Valerianovna (*str. Algeŝevskaja 25A, 428012 Ĉeboksari*) aŭ transdonu al eventuala REJM-komitatano en via urbo.

La eŭra kotizo pagendas al la konto *kklg-r* ĉe UEA.

Atentu ke rajtas re-aligi la membroj-2001, ĉiuj aliaj devas trapasi REJM-ekzamenon aŭ A-nivelan ekzamenon de ĈALK de REU.

La demandojn bv. sendi al la adresoj de REJM (vidu en la tria kovrilpaĝo).

Kelkaj virinoj feris en fremda urbo kaj foje venis al kvin-etaĝa hotelo kun surskribo: “Nur por virinoj”. Ĉar ili estis sen edzoj aŭ koramikoj, ili eniris. Administranto diris:

– Ni havas 5 etaĝojn. Vi povas supreniri etaĝon post etaĝo, kaj kiam vi vidos tion, kion vi ŝatas, vi povos resti tie, kaj faros tion, kion vi volas. Estas facile decidi, ĉar sur ĉiu etaĝo troviĝas klariga tabuleto.

Do, ili iras al la unua etaĝo. Tie estas tabulo: “Ĉiuj viroj en ĉi etaĝo estas teruraj amorantoj, kvankam sentoplenaj kaj bonkoraj...” La virinoj ridegas, kaj senhezite pluiras al la sekva etaĝo. Tie oni skribis: “Ĉiuj viroj en ĉi etaĝo estas eminentaj amorantoj, sed tre malbone traktas virinojn”. Post mallonga pripenso, ĉiuj virinoj tamen decidis plui.

En la tria etaĝo oni skribis: “Ĉiuj viroj ĉi tie estas bonegaj amorantoj, kaj atentaj al bezonoj kaj deziroj de virinoj”. Tio ŝajnas bona, sed ja restas du pliaj etaĝoj! En la kvara ili legas: “Ĉi-tieaj viroj estas elstaraj amorantoj, riĉaj kaj senedzinaj, zorgege atentis al virinoj, kaj estas tre belaj”. Estas perfekte, la virinoj ŝajne estas kontentaj, sed decidas rigardi kion oni povas proponi al ili en la kvina etaĝo, do kio povas esti pli bona ol en la kvara etaĝo.

Kaj kiam ili finfine atingis la kvinan etaĝon, ili tralegis: “Ĉi tie estas neniu viro. Ĉi etaĝo estis konstruita nur por prui ke NE EBLAS KONTENTIGI VIRINON”.

*(esperanto-anekdot)*

# Eksciu, ke...

## Festl-4 EN IVANOVO: PLI OL 500 VIZITINTOJ

Diversajn aranĝojn de la 4-a Festivalo de Interesoj, okazinta la 16-17-an de februaro en Ivanovo, entute vizitis ĉ. 500 personoj. La festivalon daŭre ĉeforganizis Junulara E-teamo de Ivanovo, ĉeestis ankaŭ E-gastoj de aliaj urboj: de Moskvo, Ĉeboksari, Nijnij Novgorod kaj



Kostroma.

Enkadre de la Festivalo prezentigis multegaj kluboj, teatraj studioj, bardaj laŭreatoj, rok-muzikistoj, psikologoj, sociaj iniciatoj kaj simple interesaj homoj. Ĉeestis kontraŭnarkotistoj, montaraj grimpisto, tuta aro da motorciklistoj en samaspektaj ledaj jakoj, aerobikistoj, rokenrolaj dancistoj, kaktobredistoj, skoltaj, jogoj (nur religiaj kaj politikaj organizoj ne rajtas partopreni la Festivalon)... Certe

neniam estis forgesata Esperanto. Ĝi ne estis altrudata, sed ial tute nature ĝi regule menciigis. Ja Esperanto estas jam vaste konata en la medio de la junularaj organizoj de nia urbo, ĝin aŭ parolas aŭ studis pluraj aktivuloj de tiuj.

Ĉi-jare la Festivalo estis finance kaj organizate subtenita de la junulara komitato de la regiona administracio, kiu krome iniciatis kadre de Festl kunvenon pri plua kunlaboro de junularaj organizoj de la regiono. Estis amuze, ke dum tiu kunveno reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj organizoj, respondante pri ilia rilato al kunlaboro, diris proksimume tiel: “jes, ni volas kunlabori, ni eĉ kunlaboras – kun esperantistoj!”. Iuj, kuntekste de la parolado pri junulara movado erare nomis ĝin “Esperanto-movado”... Kaj tio ne estis plene hazarda misdiro, ĉar en Ivanovo reale la kunlaboro inter junularaj kluboj kaj organizoj dum lastaj jaroj estis ĉefe propagata pere de la aranĝoj, prizorgataj de esperantistoj: Festivalo de Interesoj kaj somera tendaro por aktivuloj de junularaj kluboj – “Inije”. Ekzistas eĉ kiel formo de kunlaboro Asocio de ivanovaj junularaj kluboj (rusa siglo kun speciale elektita E-aspekto: AMIKO).

Pri la Festivalo abunde raportis lokaj televido, radiostacioj kaj gazetaro.

*Andrej Grigorjevskij (Ivanovo-Ŝumerlja)*

## EL DENASKISMA SPERTO

Jes, vere interesa temo estas denaskismo. Multe pli interese estas praktiki E-parolon kun la propra infano. Mi havis tian plezuron dum 15 jaroj. Mi konklude verkis sufiĉe grandan artikolon, kiu aperis en “Literatura Foiro” (n-ro 166, p.93-94).

Valentin Melnikov tute ĝuste ĉion skribis. Necesas paroli ekde la infana veno el la akuŝejo nur E-lingve. Nur konsideru, ke se vi parolos kun eraroj, la infano same uzos erarajn formojn... Se vi planos ekparoli E-te ekzemple ekde la trijara aŭ dujara aĝo, konsideru, ke vi ege malfruos kaj povos fiaski.

Sed premi la klavojn min devigis ne la supredirito. Mi volas averti la estontajn E-gepatrojn. Se vi ne kunprenados vian fil(in)on al E-aranĝoj, vi spertos malsukceson. Tio okazis al mia filo, ĉiam mankis al mi mono kunporti lin al SEJToj. La samo okazis al la

filino de Boris Kolker, la filo de Gena Jaskov k.a. Do, ili ne iĝis spirite ligitaj al Esperantio, kaj post la maturiĝo ekindiferentis al la lingvo.

*Anatolo Gonĉarov (Sankt-Peterburg)*

## DENASK-L

### *Esperanto kiel denaska kaj familia lingvo*

La dissendolisto DENASK-L, fondita en 1995, estas enreta diskutejo por dulingvaj kaj plurlingvaj familioj, en kiuj Esperanto estas unu el la lingvoj uzataj hejme. Povas partopreni ekzemple:

- \* geedzoj aŭ kunvivantoj, kiuj uzas Esperanton inter si;
- \* gepatroj de denaskaj parolantoj de Esperanto;
- \* denaskaj parolantoj mem;
- \* ĉiuj, kiujn interesas la fenomeno “Esperanto en familio”.

La plej grava celo de la listo estas reciproka komunikigo kaj subteno de la familioj, kie oni transdonas Esperanton al la infanoj kiel unu el ties denaskaj lingvoj. Ni volas interŝanĝi niajn edukajn, lingvajn kaj sociajn spertojn, kaj informi unu la aliajn pri libroj, utilaj retrimedoj, porfamiliaj renkontigoj ks.

**Aligo.** Oni aliĝas al la listo sendante personan retleteron al la administranto de la listo Jouko Lindstedt, kies adreso en listaj aferoj estas <jslindst@cc.helsinki.fi>. Se pluraj personoj uzas saman retadreson, ĉiu el ili rajtas legi kaj sendi mesaĝojn, sed la posedanto de la adreso respondecas pri ties uzo, kaj teknike temas pri nur unu aliĝo. Personaj retadresoj estas rekomendindaj ĉie, kie la lokaj cirkonstancoj tion permesas.

**La uzo de la listo.** La listo estas libere uzebla por siaj anoj: iu ajn mesaĝo direktita al la ret-adreso <DENASK-L@helsinki.fi> aŭtomate dissendiĝas al ĉiuj listanoj.

**Sinprezentoj.** La administranto rekomendas, ke antaŭ ol kontribui al la listo, ĉiu nova listano prezentu sin mem per mesaĝo, en kiu ŝi aŭ li priskribas sian rilaton al la fenomeno “Esperanto en familio”. Oni tamen rajtas ankaŭ resti pasiva leganto, kiu ne prezentas sin.

**Juraj kaj etikaj demandoj.** La mesaĝoj, kiujn vi ricevas pere de DENASK-L, ne estas publikaj. Ili egalas ne al artikoloj en gazetoj, sed al personaj leteroj, kiujn vi ricevis. Vi ne rajtas publikigi ilin, kaj vi povas montri ilin al aliaj personoj nur tiom, kiom vi montrus personan leteron kun simila enhavo. Neniam plusendu aŭ montru al eksteruloj mesaĝon, en kiu iu listano rakontas pri siaj personaj vivo kaj cirkonstancoj.

**Interesaj TTT-paĝoj.** Referencojn al utilaj kaj interesaj TTT-paĝoj vi trovos en la hejmpaĝo de DENASK-L <<http://www.helsinki.fi/~jslindst/denask-l.html>>.

*Jouko Lindstedt (Finnlando)*

## NOVA SUKCESO EN KUBO

Sukcese pasis la 4-a Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio, kiu sesiis de la 6-a ĝis la 9-a de marto 2002. Entute partoprenis en ĝi 122 homoj, el ili 6 eksterlandanoj, kalkulante plenrajtajn delegitojn plus vizitantojn. La kvanton de partoprenantoj limigis la sufiĉe altaj kostoj de la servoj.

La ĉeftemo de la Kongreso estis “Esperanto: ĉu nur lingvo?”. La temoj de la prelegoj gamis disde la ĉeftemo ĝis instruado; ankaŭ oni prelegis pri la plej diversaj temoj kaj eĉ montris pladojn de la kuba kuirarto (unu el la pladoj estis aŭkciita!).

La flanko informada estis ege sukcesa: antaŭ, dum kaj fine de la Kongreso oni intervjuis la estraranojn de la asocio kaj por radio kaj por televido. La prezidantino aperis dum elsendo de la ĉefurba televidkanalo CHTV, dum la ceteraj estraranoj estis gastoj de la radiostacioj Radio Rebelde (naciskala), Radio Metropolitana (ĉefurba), Havana Radio (ankaŭ naciskala,

sed ne identa kun Radio Havano; tiu jam elsendas Esperante!). Per tiu lasta radiostacio oni intervjuis du el niaj eksterlandaj delegitoj, nome S-roj Eddy Raats (Belgio) kaj Neven Kovačić (Kroatio). Ĉar la intervjuoj per Radio Rebelde estis longaj, oni prezentis ilin sinsekve dum kelkaj tagoj. Ankaŭ du naciskalaj ĵurnaloj aperigis informojn pri nia Kongreso: Granma (oficiala) kaj Trabajadores, danke al nia aktivulo Alejandro Garcia. Entute 6 ĵurnalistoj partoprenis en la Kongreso.

(landa-agado)

## **NOVAJ FAKTOJ APERAS – HISTORIO PROSPERAS**

*pri la artikolo de Viktoro Arolovič “Rememoroj aperas...”*

*Miaopinie, se la tempo prezentas al ni novajn faktojn pri iu historia evento, ni devas nur ĝoji, ĉar ni ricevas pli da vero, ĉu ne? Do, mi petas la legantojn noti, ke Bronštejn-1976 kulpas pri la informo ne tute ĝusta, kiu iris poste pluen. En BET pasintjara mi renkontis s-inon Biruta Rozenfelde, kiu plendis, ke ŝia rolo en la organizo de BET-1 estas tute forgesita. Mi promesis al ŝi, ke (ĉar ankaŭ mi kulpas pri la forgesigo) mi preparos por publikigo ŝian rakonton pri BET-1. Mi intervjuis ŝin, kaj el ŝiaj respondoj kompilis ĉi-suban rakonton. Bonvolu indulgi Bronštejn'on-1976.*

**Mikaelo Bronštejn-2002**

Ekde 1949 ĝis 1956 mi estis ekzilita kune kun la gepatroj al Blagoveŝĉensk. Mia patro estis esperantisto. Li ne instruis min, sed ofte rakontis pri siaj antaŭmilitaj vojaĝoj tra Eŭropo. Do, mi esperantistiĝis en 1956 post reveno el la ekzilejo al Riga kaj studentigo en Riga pedagogia instituto. Mia unua E-instruisto estis Ervins Mozerts.

En 1957 en Baltio oni lanĉis studentajn kantofestojn. En la sama jaro okazis ankaŭ la unua interrespublika E-renkontigo (Estonio-Latvio), poste – kelkaj aliaj negrandaj renkontigoj. Sed jam dum la kantofesto en 1958 okazis esperantista kunveno, kiun partoprenis homoj el Litovio, Latvio, Estonio kaj Kievo, plejparte gejunuloj. La kunvenintoj decidis, ke Baltaj respublikoj surŝultrigu laŭvican organizon de ĉiujaraj someraj tendaroj esperantistaj, kaj la unua estu Latvio.

La E-kunveno, okazinta aŭtune en Riga, komisiis al mi okupiĝi pri la preparado de la tendaro.

Ni invitis homojn nur pere de la personaj kontaktoj, ĉar neniam adresaro tiam ekzistis. Estis vigla korespondado pri manieroj fari la tendaron – dumjara interŝanĝo de opinioj. Finfine ni decidis aranĝi tion kiel turistan tendaron – en tendoj, starigitaj en konvena loko. La tendarloko estis elektita ĉe la lago Baltezers pro la proksimeco al Riga. Eblis atingi ĝin per tramo kun posta piedumado trikilometra. En la elektita loko funkciis somera turisma bazejo kun elektro kaj aliaj komfortaĵoj.

Unu semajnon antaŭ la tendaro mi iris al la Riga E-klubo por inviti ĉiujn al la tendaro. Estis surprizo por la ĉeestantoj. Ed.Jaunvalks eĉ ektimis tiom ke ne venis al la malfermo. Tamen la enprogramitan venon de la tendaranoj al Riga E- klubo li partoprenis.

Mi mem aĉetis provizon por kuiri manĝaĵojn sur lignofajro. Ni luis sep tendojn kaj mi mem portis kvar el ili al la tendarejo, la reston portis N.Lapinš.

Unu el la partoprenantoj, junulo-ŝoforo alveturigis ujojn por akvo kaj kuirado, bastonon por standardo k.t.p., eĉ memfaritan bieron por la interkona vespero – la unua en historio de E-tendaroj. Per motorciklo venis Ervins Mozerts – li alportis radioaparaton por la tendaro.

La loko estis bonega – sabla bordo de la lago Baltezers, lueblaj boatoj; ankaŭ la vetero estis perfekta.

La tendaranoj kunvenis dum la 31-a de julio. La 1-an de aŭgusto 1959 komenciĝis la Unua BET, kies programo daŭris ĝis la 14-a de aŭgusto. Krom portempaj venantoj en la ten-



daro konstante loĝis 27 personoj, entute estis ĉirkaŭ 50 partoprenintoj. Ekster Baltio venis nur unu malnova esperantisto el Moskvo, mi ne memoras lian nomon.

Ĉiu tendara tago komenciĝis per hisado de E-standardo. Tion faris dum tuta tendaro la 5-jara Aija Strautmane.

Mi ne memoras precize la tutan programon, sed enestis vizito al la fama esperantisto Ints Ĉaĉe, ekskursoj al Jurmala, al la subĉiela etnografia muzeo, al Riga kaj ties muzeoj... La Somera Universitato ne estis ankoraŭ naskita, ĝi aperis nur en la 2-a BET, en Estonio.

Estis tre malagrabla okazo dum la Unua tendaro. Ni havis labortagon en la programo, do, ni laboris en la apuda konstruejo. Post la labortago ni revenis al la tendarejo kaj la knaboj, ŝvitaj postlabore, tuj kuris en la lagon. Mi kriis, ke ili iom atendu, ripozu, sed... Poste ili elakviĝis, sed mankis unu knabo el Kaunas. Ni ne trovis lin tuj, nur post iom da tempo – dronintan... Do, estis por mi ankaŭ la funebraj zorgoj: mi devis informi liajn gepatrojn, organizi transportadon al Kaunas, k.t.p.

Tamen, malgraŭ tiu okazo, la tendaro funkciis ĝis la fino.

Poste mi estis kunorganizinto de multaj BET-oj, i. a. la 4-a, la 7-a (la junulara “Mozer-tujo”) k.a. ...

**Biruta Rozenfelde /Kondrate/ (Latvio)**

*Enskribis M.Bronŝtejn (Tihvin) la 11-an de julio 2001.*

## INTERNACIA LETERVESPERO EN KOSTROMA



Kostroma Esperanto-Teamo (KETo) dum Semajno de Internacia Amikeco invitas vin partopreni en la internacia letervespero, kiu okazos fine de majo 2002. La vesperon ni dediĉas al la 850-a datreveno de fondo de la antikva urbo Kostroma. Viaj bildkartoĵoj, retmesaĝoj, reĉoj konsistigos solenan publikan ekspozicion.

Al 10 hazarde elektitaj adresoj ni sendos bildkartoĵojn pri la 850-jara Kostroma kaj suvenirojn. Estus bonege, se vi skribos al ni, kion laŭ via opinio signifas la vorto “kostroma”, aŭ kun kio vi asocias ĝin. Adreso por la sendaĵoj: **156008, Kostroma, 1-j Sosnovij proezd, 25-51, por KETo (letervespero);** rete: **<ka2pink@iname.com>**, **<keto44@mail.ru>**.

Ni antaŭdankas vin pro via atento kaj partopreno.

***Junaj esperantistoj de la maljuna urbo***



La 13-an de februaro 2002, unu tagon antaŭ sua 93-jariĝo, forpasis Boris Fjodoroviĉ Sokolov, esperantisto de la infanaĝo. Ekde 1957 li gvidis en Ĉelabinsk multajn E-kursojn, organizis E-klubon en la loka agroinĝeniera universitato (tie Sokolov laboris ekde 1931), aktive prelegis, estis peranto de eksterlandaj E-revuoj, aplikis Esperanton en socia kaj profesia sferoj. Ĉelabinskaj esperantistoj kore funebras kaj sincere kondolencas al la parencoj kaj amikoj de nia kara veterano.

# LIBRA REVUO

## LA INFORMOJ PRI E-LITERATURO – EN LA RETO

La tt-ejo <<http://dreamwater.net/esperanto/>> “Originala literaturo Esperanta” estas ampleksa kolekto de informoj pri E-aj verkistoj kaj verkoj originalaj. Interalie tie troviĝas listoj pri “ĉiuj” eldonitaj beletraĵoj, plurcent recenzoj pri tiaj verkoj, kaj listo pri la koncernaj aŭtoroj kun aŭtoraj biografietoj.


Tamen mankas multo. Interalie tute mankas informoj pri aro da nun aŭ ĵus aktivaj aŭtoroj. Ĉu vi povus kontribui per informoj? Eble eĉ iu informos pri si mem? Tute mankas informoj pri: Austin, Dadaev, Eriksson, Gällmo, Gišpling, Gjivoje, Heide, Ilutoviĉ, Karen, Larbar, MacGill, Moirand, Rössler, Salovaara, Ungar (Bottrill) kaj multaj aliaj. Se iu el vi scias ion, ne sekretu sed sendu retmesaĝe al mia persona adreso <[stenjo@angelfire.com](mailto:stenjo@angelfire.com)> kaj mi enretigos la informojn.

Kun antaŭdanko (ankaŭ pri ĉiaj aliaj aldonoj, korektoj aŭ komentoj pri la tt-ejo).

*Sten Johansson (Svedio)*

## GÜNTER GRASS “LA LADA TAMBURETO”

*eldonejo KLEKS, Pollando, 2000; serio Oriento-Okcidento n-ro 33*



La germana verkisto Günter Grass naskiĝis en 1927, kaj havis kutiman biografion por tieepokaj junuloj – en 1944 li estis militservigita, kaj kvankam la milito jam estis pli-malpli finiĝanta, li sukcesis esti vundita kaj eĉ malliberigita (de usona armeo). Post la reveno hejmen, li okupiĝis ĉefe pri diversaj literaturaj provoj – interalie li verkis teatraĵojn en tiam populariĝanta stilo – absurdismo. Krome, li estis aŭtoro de poemplibro kun sufiĉe malordinara titolo: “Avantaĝoj de ventokokoj”. Sed ĉio ĉi estis nur prologo por liaj ĉefaj verkoj (kaj, kalemure dirante, ĉefverkoj). En 1959, la 32-jara Grass publikigis sian unuan (kaj estonte la plej faman) romanon “La lada tambureto”. La romano ŝokis tiaman germanan socion. Per kio kaj kial – ni nepre mencias iom poste. La verko tuj provokis diversajn akuzojn kontraŭ Grass. Oni kulpigis lin pri ĉio ajn – pri malmoraleco, obsceneco, pornografiemo, malsanktigo de dogmoj, malĉastigo de

junularo, pri cinikeco rilate militon kaj multo alia. La senato de la urbo Bremen rifuzis aljuĝi al Grass literaturan premion. En 1962 eĉ sekvis juĝproceso kontraŭ Grass. La prokuroro de la urbo Koblenz ĉesigis la aferon, sed apelacie ĝi venis al la ĝenerala prokuroro, kaj tiam eĉ sekvis verdikto kontraŭ Grass. Li mem post kelkaj jaroj diris: “Por mi la kondamno estis ne la verdikto, sed ke la germania intelekta socio tiom silente akceptis la juĝan decidon. La si-

lento parte signifis, ke nu bone, Grass estis vangofrapita. Kaj nur malmultaj komprenis, ke per la verdikto ĝuste ili estis vangofrapitaj... Ĉi tiu bigota vidpunkto estis disvastiĝinta inter inteligentuloj, same kiel ĉie”. Nur poste, kiel kutime, venis la konscio, ke Grass estas ne simpla por-unu-taga populara verkisto, sed vera klasikulo, kaj “La lada tambureto” estas la plej grava postmilita romano de germana literaturo. Post “Tambureto” sekvis la novelego “Kato kaj muso” (1962) kaj la romano “Hundaj jaroj”, konsistigantaj t.n. “Gdanskian trilogion”, kies tri eroj estas unuigitaj per la sama loko, kie okazas ĉiuj eventoj – urbo Danzig, nun nomata Gdansk. Kun tiu urbo estas ligitaj pluraj infanecaj rememoroj de Grass. En 1999 Günter Grass ricevis literaturan Nobel-premion. Ĉi tiun decidon neniu pridubis.

En “La lada tambureto” ĉio estis nova – kaj la figuro de la rakontanto, kaj groteska vidpunkto pri Germanio en la 20-a jarcento. Grass ne ŝatas mondskalan priskribon de la eventoj. Por li multe pli gravas atento al intimaj esprimoplenaj eroj. Eĉ la milita tragedio foje aperas kiel farso, sed tio ja tute ne pruvus la menciitan kvazaŭan cinikecon de la aŭtoro – ja rememoru, ke Grass mem militservis kaj estis malliberigita! Malgraŭ absurdeco de la militaj epizodoj, ili estas efektive tragikaj – kaj atestas pri profunda doloro de la aŭtoro.

Sed “La lada tambureto” plej ŝokis ĉiujn per la absolute nekutima, genie elpensita figuro de la ĉefa protagonisto – juna Oskaro Matzerath, kiu naskiĝis jam kun neeltenebla abomeno al la mondo, kaj decidinta neniel enmiksiĝi en la ĉirkaŭan vivon. Kiam li iĝis 3-jara, li, proprajnciate kaŭzinte al si fizikan damaĝon, ĉesigis sian kreskadon, kontraŭante la malbongustan vivon de la adoltoj. Kaj nur la donacita de la panjo ĉipa infana tambureto iom pacigis lin kun la vivo, ebligante trovi en la tambura klakado sian destinton, azilon, sian mondon ne interplektiĝantan kun tiu de la adoltoj. Oskaro elfrapas per la tambureto ĉion, kion li aŭdas kaj vidas. Li esprimas sian mondkoncepton ne per vortoj, ne per farboj aŭ melodio, sed per senĉesa klakado sur la glata surfaco de ĉi tiu ne tro muzikeca instrumento. Historio de Germanio en la 20-a jarcento prezentata kiel tambura solo, kaj la protagonisto, observanta la mondon de malsupre, “de sub la tribunoj” – ĉio ĉi estis tute nekutima kaj nova. Oskaro respondas al ĉiuj fiaĵoj de la adoltoj (ja ili mensogas, kokras, perfidas, militas, murdas) per sia malakcepto de ajnaj tabuoj kaj malpermesoj. Li renversas ajnajn aŭtoritatojn – kaj tiel li venkas.

Nepre menciindas, ke erotikaj detaloj en verkoj de Grass, fone de la seksa revolucio dum la 20-a jarcento, kaj ankaŭ apud verkoj de multaj aliaj eŭropaj kaj amerikaj verkistoj, evidentiĝis esti pli verŝajne naive-aludaj, ol pornografiaj. Simple tiuj detaloj estis la integra parto de la priskribata de li mondo.

La tradukon en Esperanton faris Tomasz Chmielik, kaj eldonis la libron la pola eldonejo KLEKS, kie jam aperis pluraj aliaj libroj, inter tiuj – la rakontaro “Mondoj”, recenzita en REGo (№ 4 (6), septembro 2001). En la ĝis nun aperintaj recenzoj oni ĉefe mallaŭdas la tradukon. Ĉu prave? Provu ni kompreni. Unu el la asertoj estas jena: “evidente nur tre malmultaj legantoj unuafoje konatiĝos kun la tamburita historio de Oscar per la Esperanta eldono de KLEKS”. Nu, krom ke tia aserto fortege malgravigas la laboron de la eldonintoj, ĝi ankaŭ estas malvera pro tio, ke preskaŭ ĉiu eminenta verko estas tradukita al plej uzataj naciaj lingvoj – do, ĉu entute ne indas traduki literaturajn verkojn en Esperanton?!

Krome, estas ekzemploj pri kvazaŭa vulgarigo de la originala teksto de Grass. Oni multe plendas, ke Chmielik tro ofte kaj senkiale uzas “fortajn” vortojn, ekz. “fiki” aŭ “piĉo”. Sed ĝuste tian etoson – ampasian, amoroplenan, flamantan – la tradukinto sentis en la originala, densa atmosfero de la prozo de Grass. Sed, laŭ mi, forigo de tiaj vortoj (kiuj, cetere, nenie estas menciitaj kiel vulgaraj aŭ obscenaj) platingus la etoson, kaj la traduko perdus sian fidelecon.

Ĉiu traduko ĉiam estas interpreto. Se vort-post-vorte blinde sekvi la originalon, povas rezultiĝi io tre teda. Supozeble, ankaŭ en la rusa traduko (farita de spertega tradukistino

Sofja Fridljand) troviĝas multaj nekoincidaĵoj, kiujn iu eble opinius “platigo” aŭ “vulgariĝo”. Por certe deklari tion oni devas regi la germanan, sed, malfeliĉe, mi ne posedas ĝin.

Ĉiuj eventoj pasas plejparte en Pollando, en Gdansk. Kelkaj protagonistoj (la avino kaj la patrino de Oskaro k.a.) parolas kaŝub-germanan dialekton. La maniero por transdoni ĝin, elpensita de T.Chmielik, estas tre interesa: “*Vi aŭdit, Oskarĉjo, lo specialan komunikajon. Se ĉjo ankore prosperot tjel...*” Certe, ĝi estas nesimila al la vera kaŝub-germana dialekto. Sed tiu maniero almenaŭ tute bone prezentas al ni kiel diferenciĝas tiu dialekto de la normala parolo (denove atentindas, ke en la rusa traduko la diferenco inter kutima kaj kaŝuba lingvoj senklarige tute forestas).

Bedaŭrinde, por rusiaj legantoj ĉi tiu verko de Grass estis dum longa tempo neatingebla. “La lada tambureto” aperis en gazeta formo komence de la 1990-aj, kaj la menciita traduko de S.Fridljand estis farita nur en 1997. Pro tio por rusia E-movado la apero de Esperantlingva traduko de “La lada tambureto” estas aparte grava – dank’ al ĝi eblas kaj konatiĝi kun ĉi tiu mirindega, monde grava verko, kaj ankaŭ vere pliriĉigi sian posedon de Esperanto. Do, ne timu la dikan libron – ĝi meritas vian atenton!

**Grigorij L. Arosev (Moskvo)**

*Originalaj kaj ruslingvaj titoloj de verkoj de Grass, menciitaj en la recenzo:*

*Die Vorzüge der Windhüner, 1956 (Преимущества воздушных кур)*

*Die Blechtrommel, 1959 (Жестяной барабан)*

*Katz und Maus, 1961 (Кошки-мышки)*

*Hundejahre, 1963 (Собачьи годы)*

## LA PLEJ BONAJ KANTOJ DE ĴOMART KAJ NATAŜA – POR RUSIO



Nur por rusianoj estas eldonita kolekto de la plej bonaj kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa, niaj famaj kaj ŝatataj bardoj. Sur du diskoj lokiĝis 51 kantoj – do, preskaŭ ĉiuj kantoj de la dueto. Multaj kantoj havas novajn plenumversiojn, kiuj neniam ankoraŭ aperis sur kompaktdiskoj aŭ kasedoj.

La unua disko nomiĝas “Frua mateno” kaj plejparte enhavas historie pli fruajn kantojn de la dueto. La dua nomiĝas “Nia trajno” kaj enhavas ĉefe la plej popularajn kantojn de la lasta jardeko, kiam la dueto jam lasis nian landon kaj akiris tut-Esperantujan gloron.

La unuaj, haste finfaritaj ekzempleroj jam estis prezentitaj dum EoLA-14. Nun venos nova eldono – kun kelkaj korektitaj eraroj.

La kosto de la diskoj estas 150 rubloj por ambaŭ. Oni povas peti ilin de la libroservo de REU, persone aĉeti en Moskva E-klubo “Lev Tolstoj” aŭ mendi rekte de la produktanto – Andrej Grigorjevskij, aldonante la sendokoston – 29 rublojn.

La adreso por mendi: Grigorjevskij Andrej Anatoljeviĉ, str.Lenina 40 – 14, 429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝio; rete <andreo@mailru.com>.

## ASTRID LINDGREN KAJ ESPERANTO

La 28-an de januaro amasinformiloj komunikis malĝojan sciigon – mortis Astrid Lindgren. Dum dudeko da jaroj Astrid Lindgren pere de siaj libroj konigis Esperanton en pluraj landoj. Ekzistas tri ŝiaj libroj, tradukitaj en Esperanton – “Fratoj Leonkoro”, “Emilo de Smolando”, tradukitaj de Kerstin Rohdin kaj Harold Brown, kaj “Pepi Ŝtrumpolonga”

tradukita de Sven Alexandersson.

Mi kelkfoje renkontiĝis kun Astrid Lindgren. Ŝi ĉiam interesiĝis pri Esperanto kaj ofte diris al mi ke ŝi deziris esti lerninta Esperanton kiam ŝi estis juna. Tio povintus okazi, ĉar antaŭ sesdek–sepdek jaroj Olle Olsson (Lund) estis energia Esperanto-instruisto en Vimmerby.

Astrid Lindgren kaj la ilustristino Ilon Wikland donis al mi la rajton uzi la tekston kaj la bildojn senpage. Tio ekonomie ebligis la esperantigon de la libroj.

Mi tre interesiĝis pri la verkoj de Astrid Lindgren, kaj krom tradukado de du el ŝiaj libroj mi verkis kajeron pri ŝi kaj ŝiaj verkoj. Mi havis la ĝojon prelegi pri Astrid Lindgren kaj aparte pri la libro “Fratoj Leonkoro” (mia la plej ŝatata libro) en pluraj landoj.

De diversaj landoj mi sendigis kartojn kaj leterojn al ŝi tiel ke ŝi povu sekvi la vojaĝon de siaj libroj en Esperantaj vestoj tra la mondo. Unu fojon ŝi ricevis dank-karton en la japana lingvo. En septembro mi faris prelegon en Danio de kie aŭskultantoj el pluraj landoj subskribis karton al ŝi.

Lastatempe mi ricevis respondleteron de ŝi – certe unu el ŝiaj lastaj leteroj. Mi posedas 12 leterojn de Astrid Lindgren. En la Reĝa Biblioteko oni klasifikos ĉiujn leterojn kiujn ricevis Astrid Lindgren. Miaj leteroj pri la esperantigitaj libroj aperos en tiu klasifikado kiu tiel enhavas referencon pri Esperanto.

En la muzeo “Astrid Lindgrens Värld” (“La mondo de Astrid Lindgren”) en Vimmerby estas ekspoziciataj grandformate la kovriloj de la Esperanto-tradukoj.

Mi ricevis kondolencajn leterojn pri Astrid Lindgren el pluraj landoj.

Ni esperantistoj danku al Astrid Lindgren pro ŝia bonkoreco al ni kaj estu ĝojaj, ke Pepi, Emil, Jonatan kaj Biskoto daŭrigos siajn Esperantajn vojaĝojn tra la mondo ankoraŭ dum multaj jaroj.

*Kerstin Rohdin (Svedio)*

## LITERATURA KONKURSO “EKRA-2002”

Esperantista kulturdomo “D-ro Ivan Kirĉev” – Razgrad (Bulgario), anoncas internacian literaturan konkurson pri poezio kaj humuraĵoj, originale verkita en Esperanto – “EKRA-2002”, je libera temo. La verkoj ne devas esti jam publikigitaj kaj partoprenintaj en aliaj konkursoj.

Verkojn por la konkurso, subskribitajn per pseŭdonimo, oni sendu en tri ekzempleroj al la organizanto (Esperantista kulturdomo “D-ro Ivan Kirĉev”, str. “Sv. Kliment” EK-3, BG-7200 Razgrad, Bulgario; retadreso <esperanto\_razgrad@mail.bg>). La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta koverto surskribita per la sama pseŭdonimo.

La ĵurio kunsidos la 7-an de junio 2002. La premioj estos Esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en la revuo “Literatura Foiro” kaj “Esperantista tribuno” (Razgrad).

La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la Esperanta kultura festo “Abritus-2002” en Razgrad, la 8-9-an de junio 2002, organizota kunlabore kun LF-koop (kiel postkongreso de la 54-a IFEF-kongreso).

## RIGARDEBLA PLENA ZEO-LISTO

Daŭrigante la laboron de Hugo Röllinger, Raymond Boré plu kolektas informojn pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj (ZEO-j). Post la lasta eldono en 1997 de la libro de H.Röllinger “Monumente pri Esperanto”, kiu priskribis 1044 ZEO-jn, la nombro de la objektoj konstante pligrandiĝas. De tiu tempo aperis al la listo jam kvar suplementoj kaj la kvanto de ZEO-j proksimiĝas al 1400. Plena listo troviĝas sur la retpaĝo de Lodza Filio de Pola E-Asocio <<http://www.ikki.com.pl/esperant/>> aŭ <<http://www.ikki.com.pl/esperant/zeo/>>.

*(esper-inform)*

## MENSOGO KURBA DE SPEGUL'

Ĝuste tiel titoliĝas ĵus aperinta kompaktdisko kun la kantoj de Grigorij Arosev en plenumo de la aŭtoro. La disko enhavas 16 E-lingvaj kaj 6 ruslingvaj kantojn. La unuaj estas verkita kaj tradukita ĉefe de Griša mem. Kelkaj kantoj estas komponitaj laŭ la originalaj



tekstoj de Ivan Naumov. Inter la tradukitaj estas la kantoj de ekz. Boris Grebenŝĉikov kaj Tom Waits. La tekstojn de la ruslingvaj kantoj aŭtoras (krom Arosev) Anna Aĥmatova, Osip Mandeljštam kaj Boris Pasternak. Ĝenerale plejparto de la kantoj en la disko estas malgajaj, same kiel plejparto de ĉiuj verkoj, aperantaj el sub plumo de Grigorij Arosev. Jen por la ekzemplo kelkaj linioj:

*Se la viv' abrupte krakis, kaj delir'  
portis vin al la fatala misinspir' –  
pri mensogo kurba de spegul',  
pri enspezoj niaj je la nul'  
ploras ni tutserioze. Ploras, mankas la elir'.*

Stranga percepto de la vivo, nekutima por ordinara

junulo, sed ofta ĉe vere talentaj homoj.

Dezirantoj akiri la diskon bonvolu turni vin al la aŭtoro rete <desperanto@mtu-net.ru> aŭ poŝte: 117071 Moskva, p/k 31.

**Garik Kokolija (Moskvo)**

## PER ESPERANTO – PRI MUZIKO KAJ NE NUR...

Estas kreita la listo “per-esperanto-muziko”, al kiu eblas aliĝi per malplena mesaĝo al <per-esperanto-muziko-subscribe@yahoogroups.com>. Ĝi celas ĉiujn esperantistojn, kiuj volas labori per Esperanto pri muziko (tradukado, eldonado, kantado, ktp).

Mi kaptas la okazon por memori al vi, ke funkcias ankaŭ la jenaj aliaj listoj: *per-esperanto-ghenerale*, *per-esperanto-bazascienco*, *per-esperanto-komerco*, *per-esperanto-literaturo*, *per-esperanto-medicino*, *per-esperanto-politiko*, *per-esperanto-teknologio*, *per-esperanto-turismo*.

Ĉiuj ĉi listoj funkcias ĉe <yahoogroups.com>, aliĝo al ajna el ili okazas laŭ sama proceduro, kiel ĉe la muzika listo. Se vi interesiĝas pri unu el tiuj fakoj, bonvolu aliĝi kaj aktivigi, utiligante Esperanton.

**Renato Corsetti (Italio)**




## KOMPITILA MAMUTIDO

Aperis kompaktdisko kun la komputila kurso de Esperanto, kreita de Dima Ŝevĉenko surbaze de la fama lernolibro “Mamutido Miĉjo”. La disko enhavas komputilan version de la libro kun belaj bildoj kaj sonoj, vortaron kaj kurtan gramatikan priskribon de Esperanto, kaj multon alian. Mendi la diskon eblas ĉe la aŭtoro rete <impeto-moskvo@mtu-net.ru> aŭ poŝte: 119048 Moskva, p/k 428.

## DU LINGVOJ DE BRUNA ŜTONO

Aperis nova libro de Mikaelo Bronŝtejn. Ĝi havas la titolon “Du lingvoj” kaj certe nenium misopiniigos la pseŭdonimo Bruna Ŝtono, staranta anstataŭ la nomo de la aŭtoro. La libro enhavas 192 paĝojn kaj estas la plej bona kolekto de kantoj kaj poemoj, verkitaj de nia ŝatata bardo kaj verkisto dum la jardekoj de lia E-kreado. Eĉ la plej fervoraj ŝatantoj de Brun-Ŝtona arto trovos en la kolekto nekonatajn poemojn (ĉar plejmulto antaŭe ne aperis libroforme), samtempe kun ĝuo relegante la konatajn. Jen estas ekzemplo de tia versaĵo, pri kiu mi neniam antaŭe aŭdis (malgraŭ ke ĝi estis verkita en 1969), sed de kiu estis ravita tuj ĉe la eklego:

Somero – lazura kaj verda  
trumpetas aŭronon.  
Sunero petola kun vento  
penetris la koron.  
Pro ĝi, petolulo, ekflamis  
anima senbrido:  
subite animon ekamis  
somera ebrio.  
Subite aperis aromo  
de rokoj kaj maroj.  
Sopiron forpelis el domo  
alvoko de mapoj.  
Subite tedegis kanapoj,  
malsobraj vizaĝoj –  
kviete knarantaj kanajloj  
aŭ naŭze kuraĝaj.  
Tedegis najbaraj kvereloj  
pri ŝuo en supo...  
Ĉu bone katunaj ombreloj  
vin savas de suno?  
Ĉu savas de tril’ najtingala  
veluraj kurtenoj?  
Ĉu poplan lanugon egalas  
lanugaj kusenoj?  
– Forkuru! – min vokas radioj.  
– Forkuru! – folia susuro.  
– Al verda kaj blua hodiaŭ  
forkuru, forkuru, forkuru!  
Ekamu la sunan odoron  
post sola ekflaro.  
Antaŭen! Ne perdu l’ aŭronon  
dum neĝas poplaro.



La libron eldonis la moskva eldonejo “Impeto”. Aĉeti ĝin eblas en la Libroservo de REU (vidu la adreson en la tria kovrilpaĝo).

*Garik Kokolija (Moskvo)*



# maltaŭgaj pensoj:

## RETPOŝTAJ TORTUROJ

La homoj dividiĝas je du partoj. La unuan konsistigas homoj, havantaj eblon uzi retroŝton, la duan – ne havantaj. Nia kara smeraldeca kolektivo estas la sama. Pluraj el ni (sci)povas uzi interreton. Kelkiuj eĉ – uzas. Kaj ĉiu el ni, almenaŭ unu fojon en la vivo, iun belan momenton estis kunpuŝiganta kun tre grava malfacilaĵo: kiun nomon elekti por sia retroŝta adreso. Ĉi tiu problemo povas fariĝi ne malpli embarasa, ol elekto de nomo por infano.

Iuj elektas plej simplan vojon, kaj registras retadresojn laŭ sia nomo/familinomo/kromonomo (ni mencias nur la adres-nomojn, sen konkretaj serviloj): <jelena>, <garik>, <oleg>, <mitijaj>, <belov>, <povorin>, <pavel\_br>, <agouliaev>, <yuka>. Ĉi maniero estas eble la plej ĝusta, sed certe – la plej enua. Aliaj iras alian vojon, jam pli interesan, farante retadresojn laŭ E-formo de sia nomo: <mikaelo>, <nikolao>, <kvecxjo> (ĉu samnomulo de Kventin Tarantino?), <sanjeto>, <enjo>, <onjo>, <ronjo>, <sonjo>, <tanjo>. Aprezinde.

Sed kelkiuj esperantistoj elektas alian metodon, prenante iujn ruslingvajn vortojn: <iv-anchaj>, <krysa2001> (evidente, la antaŭaj du mil krysa-j estis jam okupitaj), <irga67> (senkomente), <virus41082> (eĉ pli senkomente), <general> (malsprituloj asertas, ke temas pri la angla vorto kun la signifo “ĝenerala”, sed ni ja scias, ke temas ĝuste pri “generalo”). Nepre atentindas, ke nur tre malmultaj esperantistoj prenas tiucele anglajn vortojn (“А потому, что патриотки.” © Aleksandr S. Gribojedov).

Sed la menciita patriotismo fojfoje superas limojn. Ĉar la plej ofte renkontebla retroŝta titolo estas iu Esperanta vorto. Eblas renkonti kion ajn! Diversaj animaloj: <testudo>, <vesperto>, <heliko>, <salamandro>, <erinaco>, <mevo>, <katido>, <urso>. Ĉu ni situas en menaĝerio?! Kreskaĵoj: <floro>, <leontodo>, <lavendo>. Jen vera verda ĝarden’. Diversaj objektoj, ligitaj kun la naturo: <pluvo>, <suneto>, <sezonoj>, <oriento>. Kaj sennombraj neklasifikeblaj aĵoj: <elfo-5a>, <gxoj>, <spegulo>, <amikeco>, <estro>, <adepto>, <rigoro>, <centro>, <biero> (!), <amoro> (!!!). Sanktuloj! Kaj pli: <benita>, <mateno>, <naskoj>, kaj eĉ <oni> (aŭ eble estas la ruslingva “они”?!). Ĉi alineon digne kronas du retadresoj: <bonvenu> kaj <saluton>. Uf, jen la fino. La kapo efektive povas ekŝanceliĝi.

Do, unue – *bonvenu*, poste *saluton*, kaj tie *erinaco* al vi proponos *amoron* kun *testudo* en iu *mateno*, kaj ĉi tion *oni* akceptos kun *gxoj*. Poste okazos *naskoj*, kaj rezulte naskiĝos *amikeco*, kaj al via *benita estro* vi, *adepto*, donacos *floron*, kaj li regalos vin per *biero*. La okuloj ne kredas la vidatan, la oreloj ne fidas la aŭdatan. I’m going slightly mad\*, kiel kantis “Queen”.

Interese, kial neniuj el la samideanoj ĝis nun konjektis registri jenan retadreson: <per\_esperanto\_por\_mondpaco\_kaj\_amikeco\_gxis\_revido@retposxto.ru>? Kiom ideoza estas Esperanto!

Cetere, pri Esperanto. Ĉi tiu povra vorto estas amase priuzata kaj okupas la unuan lokon en la ranglisto. Oni povas renkonti ĉi-sekvajn variaĵojn: <esperanto@online.ru>, <esperanto@beep.ru>, <esperanto@mail.ru>, <esperanto@newmail.ru>, <esperanto@mail2000.ru> sed ne nur! Iu tre volis iĝi <esperanto>, sed kovarda retprovizanto ne

\* Mi poiome freneziga (angle)



permesis havi tiom longajn titolojn, kaj rezulte fariĝis <esperant>. Fidela Kastro! Krome ekzistas <esperanta>, kaj iu malgaja petolulo eĉ kreis <desperanto>-n.


Ankaŭ ekzistas retadresoj kun malfacile kompreneblaj titoloj: <ka2pink>, <ples>, <ko-nobraz>, <neonros!>, <vmel>, <imea>, kaj eĉ mistera <zrez>! Ankaŭ ciferoj ne estis forge-sitaj: <serp20002000>, <oleg326756> (oni povas imagi, kiom da fojoj la povra posedanto provis registri diversajn <oleg>-ojn, ĝis li atingis sian rezulton! Natura logiko sufloras, ke ne mapli ol 326 755 fojojn!).

La fama E-eldonejo “Impeto” longan tempon havis retadreson <impeto-provizora>. Oni jam antaŭĝuis ekscii ties veran retadreson, kaj jen la momento venis: <impeto-moskvo>. Tre longan tempon postulis la kompreno, ke “Impeto” troviĝas en Moskvo.

La konkludo, farebla post tiom da ekzemploj, povas esti nur ke ni, rusiaj esperantistoj, havas treege riĉan fantazion. Kaj, vi povas demandi, kiun retadresan titolon ni opinias la plej trafa? Bedaŭrinde, tiu ĝis nun ne ekzistas – sed eble nia sugesto plaĉos al iu. Do, faru retadreson kun simpla nomo: <retadreso>. Vi superos ĉiujn!

*Virtuale viaj Ludovikoj Lazaroj Zamenhofoj  
<zamenhofoj@mail.ru> – jes, tiom neinterese*

*P.S. Cetere! Antaŭ kelkaj semajnoj ni eksciis, ke en franca urbo Erquy okazis iu renkontiĝo pri ekologio, sen-perforta vivmaniero, feminismo ktp. Kial ni citas tion? Ĉar la retadreso, ĉe kiu haveblis ĉiuj informoj, estas jena: <kacujo@yahoo.fr>.*



KOMENCANTO estas simpatia gazeto por ĉiu, kiu lernas, scias aŭ instruas Esperanton.

16 paĝoj en ĉiu kajero  
6 numeroj jare  
regule aperas ekde 1998

Nur en KOMENCANTO:  
kiel tutmonde famaj esperantistoj estis komencantoj.

Historio de E-literaturo,  
gramatiko serioze,  
lokaj popolaj tradicioj, amuzaj rakontoj,  
poezio, proverboj, aforismoj, anekdotoj,

ŝercoj, enigmoj, spritaj humuraj desegnaĵoj kaj fajnaj bildoj – ĉio estas **nur** de niaj legantoj el la tuta mondo.

Nun oni legas Komencanton en pli ol  
30 landoj de la mondo  
Abonkosto por 2002 – 120 rubloj  
sendendaj poŝtmandate al  
Kudrjavcev Viktor Vasiljeviĉ  
620041, Jekaterinburg, p/k 132

# CERBE KAJ KORE

redaktas Valentin Melnikov



## TRADUKITA POEZIO

*Erudiciuloj probable scias la nomon de la ukraina filozofo Hrihorij Skovoroda (1722–1794), sed certe nemultaj el vi legis liajn verkojn. Kaj li estis ne nur filozofo, sed ankaŭ poeto.*

*Hr. Skovoroda*

el “ĜARDENO DE DIAJ KANTOJ”

### Kanto 10-a

Leĝoj kaj moroj – ĉe ĉiu vilaĝ’,  
En ĉiu kap’ – sia kvanto da saĝ’,  
Al ĉiu buŝ’ plaĉas sia postgust’,  
Kaj sia am’ estas en ĉiu brust’.  
Min tamen regas nur unu intenc’:  
Vivon travivi ne sen kelka senc’.

Petr’ serviliĝas por mastra favor’,  
False pesadas vendist’ Teodor’.  
Tiu konstruas la domon laŭ mod’,  
Skuas ĉi tiun la tim’ pri bankrot’.  
Min tamen regas nur unu intenc’:  
Vivon travivi ne sen kelka senc’.

Logas ĉi tiun parcel-akapar’,  
Tiun – akir’ de fremdlanda brutar’.  
Tiuj bredadas hundarojn por ĉas’,  
Tie ĉi bru’ estas pro gast-amas’.  
Min tamen regas nur unu intenc’:  
Vivon travivi ne sen kelka senc’.

Agas laŭ propraj bontrovoj cenzor’,  
Jen ĉe student’ pro disput’ kapdolor’.  
Multajn altiras Venus’ kaj Kupid’,  
En ĉiu kap’ estas kelka stupid’.  
Sed en la mia ĉiamas la pens’:  
Se mi nur mortus ne sen sana mens’!

Morto, vi estas svingata falĉil’,  
Ĉiujn ekstermas kun lert’ kaj facil’.

Ne distingante: ĉu reĝ', ĉu kampul',  
Vivo do – kvazaŭ de pajl' kurta brul'.  
Kiu ne timas falĉilon el ŝtal'?  
Homo kun pura anim' el kristal'!

### **Kanto 23-a**

Kiel ni vin ne domaĝas,  
Kara tempo de la viv'!  
Kvazaŭ vi nin troe ŝarĝas,  
Emas ni disĵeti vin.  
Kvazaŭ povus reveni pasinta somer',  
Kvazaŭ povus ni jarojn al vivo aldoni,  
Kvazaŭ povus al fonto reflui river',  
Kvazaŭ povus ni tagojn sennombrajn disponi.

Kial do vivadi volas  
Ni ĝis jaroj eĉ okcent,  
Se ni ilin transpetolas,  
Disipante sen prudent'?  
Hor' honesta plibonas ol tago kun pek',  
Tago sankta plibonas ol jaro sendia,  
Jaro pura plibonas ol aĉa jardek',  
Jardek' lukta plibonas ol viv' apatia.

Nenifaron finu, kara,  
Tuj al io metu vin!  
Viv' sen far' estas erara,  
Kaj al ĝi ja estos fin'!  
Jam ne nia nun estas pasinta vivhor',  
Kaj ankoraŭ ne nia – venonta cetero,  
Nia – tag' nur vivata, sed ne plu aŭror',  
Kaj ĉu scias ni, kion alportos vespero?!

Se vi ne scipovas vivi,  
Lernu tion ĉi kun pen'!  
Ja ne grandas lerto – drivi  
Sen la ĝusta vojkompren'.  
Scias mi, ke la viv' plenas je vantaĵar',  
Scias mi, ke la homo – malsaĝa estulo,  
Scias mi, ke li povas fariĝi barbar',  
Scias mi, ofte blindas ja liaj okuloj!

*El la malnova ukraina lingvo  
tradukis Gennadij Turkov (Ĥabarovsk)*

## *Nikolaj Gumiljov (1886–1921)*

### LA ĜIRAFO

Hodiaŭ mi vidas angoron en via rigard',  
La brakoj subtilaj senmove min petas pri sav'...  
Aŭskultu, jen fore, tre fore, ĉe lago de Ĉad'  
Vagadas gracia ĝiraf'.

Langvoran gracilon kaj svelton li havas ĝis nun,  
Sur felo de li estas rava mirakl'-arabesk'  
Simila al tiu, per kiu ornamas la lun'  
Surfacon de lagoj, brilantaj pro la fosforesk'.

Imitas li ŝipon kun veloj de bunta kolor',  
Kaj lia kurado similas al flugo de bird',  
Kantanta plenĝoje. Kaj kiam ekkuras li for,  
La sun' estingiĝas, kliniĝas kaj velkas la mirt'.

Mi scias la gajajn fabelojn de fora landar'  
Pri l' nigra reĝino, pri amo de l' arda junul'...  
Sed vi tro delonge suferis en morna malklar',  
Ne volas vi kredi al io krom pluv' kaj nebul'.

Nu kiel priskribu mi sudan ĝardenon sen pad',  
Odoron de l' herboj, la palmojn, belecon de l' pav'...  
Vi ploras... Aŭskultu, jen fore, ĉe lago de Ĉad'  
Vagadas gracia ĝiraf'.

*El la rusa tradukis Tatjana Auderskaja (Odeso)*

*Rimarko de la tradukistino:*

*Mi ne povas diri "ĝi" pri bestoj; des pli ke tio sonas malbele.*

### EN AMIKA RONDO

## *Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)*

### KROKODILOJ

Minace la verdan riveron invadas  
Danĝeraj rampuloj sen tim', krokodiloj,  
Kaj plu Esperanton malkaŝe rompadas  
Per siaj obstine ruslingvaj babiloj.

Ni ade subtenas kaj gardas ĝin viva,  
Dum krokodilar' kontraŭ tio rezistas.

La frazo nomeblas ridinde naiva,  
Sed nur parolate la lingvo ekzistas.

Parolu do sen ies trud' kaj persvado,  
Parolu pli multe, kuraĝe kaj ĝuste!  
Ĉu lerni la lingvon sen ties uzado?  
Kaj uzi ĝin estas ja tiel bonguste!

Se iu paroli verdlingve ne volas,  
Ĉu iom valoras fervoraj insistoj?  
En lingvo nacia ni ĉiuj parolas,  
Kaj en Esperanto – nur esperantistoj.

Parolu kun haltoj, ne timu erari,  
Parolu penege, sed en Esperanto!  
Kaj se vi ne volas... Nu, kion do fari...  
Prefere silentu. Ne lamu la kanto.

Dum nia kuniĝ' en la lingva libero  
Krokodilemuloj bonvole sin bridu.  
Fluadu plu pura la verda rivero,  
Kaj esperantistoj sin mem ne perfidu!

## NIA DEKAMERONO

*La sube prezentita novelo gajnis en la anoncita antaŭ EoLA-14 proza konkurso je la nomo de Ĝovani Bokaĉo “Verda Dekamerono”. Ĉiujn venintajn al la konkurso novelojn eblas legi en la retpaĝaro <[www.eola-14.by.ru](http://www.eola-14.by.ru)>.*

*Dmitrij Cibulevskij (Ukrainio)*

### TURISTA MARŜO

Kelkfoje oni petis min rakonti ion erotikan. Ŝajnas, al publiko ĉiam estas plaĉaj la tiustilaĵoj. Sed mi konstante rifuzadis, opiniante, ke rakonti ion tiuspecan pri la eventoj, okazintaj al mi kaj iu ino, ne estas dece. Tamen, se ŝanĝi nomojn, iom ŝanĝi la situacion, ion elpensi...

Por la rakonto mi povus elekti iun pecon el la romano de Eduard Topolj “Rusio enlite”, kiu plenplenas de erotikaj momentoj, ĉiam allogaj por aŭskultantoj.

Povus rakonti mi ankaŭ pri eventoj, kiuj okazis dum mia vojaĝo tra Finnlando. Certe, ne pri la tuta vojaĝo, kiu sendube similis al ajna turista vojaĝo. Sed pri unu vespero, la lasta vespero en hotelo de la finna urbo Tampere. Dum tiu vespero estis organizita komuna adiaŭa vespero de niaj grupanoj kaj samtempe ankaŭ festado de naskiĝdato de unu el niaj junulinaj. Dum ĝi kaj poste okazis io, eble rakontinda...

Sed rakontos mi pri ordinara turista marŝo tra Kaŭkazaj montoj, kiuj tiuperiode apartenis ne al teritorio de nune sendependa ŝtato, sed al nia lando – Sovetio. Ni povis libere veturi tien sen timo trafi en, kiel oni nun nomas, “danĝerajn lokojn”.

Mi ŝatas turismi. Estas ĉiam agrable marŝadi tra pitoreskaj lokoj de nia vasta lando, ĉu montoj, ĉu ebenaj, plenaj de diversaj riveroj, riveretoj, lagoj; vidi belan naturon, novajn urbojn kaj vilaĝojn, vizitadi lokojn, ne ĉiam facile atingeblajn por ceteraj homoj, ne ŝatantaj marŝi tra iom komplikaj vojoj; konatiĝi kun novaj homoj.

Ankaŭ tiu ĉi turisma marŝo estis kiel la multaj aliaj, kiujn mi partoprenis. Nur la grupo estis ia miksitaj, kompilita el diversaj homoj, kiuj komence de la marŝo eĉ ne konis aŭ preskaŭ ne konis unu la alian.

Ni estis okope – 5 junuloj kaj 3 junulinoj. Ĉiuj proksimume samaĝaj kaj preskaŭ ĉiuj – studentoj el diversaj institutoj de nia urbo. La itinero de la marŝado estis elektita ne tre komplika. Eblus eĉ diri, ke la vojo estis preskaŭ facila. Tamen, ŝajnas, ne ĉiuj grupanoj estis egale preparitaj al ĝi.

En la grupo estis gaja, tre babilema junulo, sufiĉe forte aspektanta. Li ne povis, ŝajnas, eĉ horon esti sen babili pri io. Ĉefe, kompreneble, li rakontadis iujn historiojn, kiuj prezentis lin kiel veran Superhomon. Kaj memkompreneble, li strebis marŝi apude de iu el niaj junulinoj. Dum vesperoj ĉe lignofajro li ĉiam estis sidanta proksime al tiuj, kvazaŭ la junulinoj estis lia propraĵo, lia riĉeco. Mi ne scias kiel rilatis la junulinoj mem al tiu babilulo, kaj tio ne tre interesis min.

Nia grupgvidanto – same juna, sed multe pli saĝa (kompreneble ĉi tie mi menciados nur miajn subjektivajn pensojn, opiniojn kaj sentojn) – kelkfoje provis iom “trankviligi” la junan “heroon”, sed ne sukcesis pri tio kaj fin-fine lasis tiun senperspektivan laboron...

La aliaj junuloj estis, se eblas sin tiel esprimi, tute normalaj homoj: ili ne estis silentemaj, nek babilemaj, ĉe lignofajro ili povis ion rakonti, anekdotumi, kanti. Kantis ili ĉiuj belege (denove mia subjektiva opinio, opinio de persono, kiu nenion komprenas pri muziko kaj kantplenumado). Estis agrable post laciga tago sidi vespere ĉelignofajre kaj aŭskulti ĉarmajn kantojn de gejunuloj, ja ankaŭ la junulinoj estis ne mutaj...

Estis la sepa tago de nia marŝado. La antaŭlasta. Ni devis trairi ne tiom longan distancon kaj ne tiom komplikan. Fakte ĉio komplika jam restis malantaŭ ni. Tamen, ankaŭ tiuj ne malfacilaj kilometroj kaŝis siajn obstaklojn, siajn sekretojn. La grupanoj evidente jam pensis, ke ĉiuj komplikaj vojepecoj ne plu estos, kaj iom malstreĉiĝis. Kaj tuj estis “punitaj”. Ie mezutage, kiam restis marŝi tute negrandan distancon, unu el la junulinoj, hastante trapasi iun kavon, glite paŝis kaj vundis sian dekstran piedon. La vundo ne estis tre serioza, sed ŝi ne plu povis memstare daŭrigi la vojon. Aperis do problemoj, kion fari. Ja ni devis ĝis la loko de nia noktumado pasi ankoraŭ kelkiojn da kilometroj. Nu, la aĵoj de nia kompatinda sammarŝantino ni ĉiuj prenis poparte. Sed ja ankaŭ Marina, tiel nomiĝis nia samgrupanino, devis tiujn kilometrojn trairi. Tamen memstare ŝi tion ne povis. Iu devis ŝin porti.

– Nu, karulo, – diris iu el niaj junuloj al la “babilulo”, – nun venis tempo montri viajn kapablojn. Bonvolu helpi al Marina. Ŝi ege esperas pri via helpo.

Mi ne povas esprimi per vortoj la sentojn, kiujn mi ekvidis surviŝaĝe de nia “babilulo”. Kaj timo, kaj necerteco, kaj konfuziĝo. Li preskaŭ svenis.

Ne atendente la sekvon kaj por ne perdi vane la tempon, mi okulsignis al troviĝanta apude Fjodor, unu el niaj grupanoj, kutime sufiĉe silentema persono, kaj ni duope aliris al Marina de ambaŭ flankoj kaj prenis ŝin subbrake por porti la restintajn kilometrojn. La grupo denove ekmoviĝis, ne plu atentante la “babilulon”, kiu restis iranta la lasta.

Mi ne povas diri, ke tiu helpo al nia kompatinda junulino postulis troajn fortostreĉojn. Sed certe ni al la voĵfino iom elĉerpiĝis. Kaj ĉi-foje mi decidis ne sidi ĉe la lignofajro, kion mi ege ŝatas fari, sed pli frue entendiĝi kaj provi ripozi tie. Jes, ĝuste provi ripozi, ĉar tutege la ceteraj daŭre sidis, rigardos la fajron, denove anekdotumos kaj kantos. Mi tamen estis certa, ke tiu jam nokta bruo al mi ne malhelpos ripozi – mi scipovas dormi (aŭ dormeti) ĉe ajna bruo.

Mi ne menciis, kio estas grava, ke ni por la grupo havis sufiĉan kvanton de tendoj, kaj mi estis posedanto de “persona” tendo, en kiu mi noktumis sola. Mi rapide aranĝis la dorm-lokon, kaj jam post iom da tempo estis kuŝanta kaj aŭskultanta ĉarmajn ĉelignofajrajn kan-tojn. La okuloj estis fermitaj, la korpo etendiĝis laŭ la blovmatraco. Estis varme, kaj mi sen-vestiĝis, estante preskaŭ nuda. La dormosako estis nezipita, kutime mi ĝin zipas jam multe pli proksime al mateno, kiam sentebas freŝeco. Do, mi estis jam preskaŭ dormanta, kiam mi eksentis – jes ĝuste eksentis, sed ne ekaŭdis, ke en la tendo mi ne plu estas sola. Kaj post iom da tempo mi eksentis sur mia brusto ies karesman manon. Ne plu mi devis heziti, ĉu viro venis en la tendon por dormi (eble al li io malhelpis dormi en sia tendo) aŭ junulino, kiu bezonis trankvilon for de la ceteraj grupanoj. En la grupo mi estis konsiderata la plej “sen-danĝera” persono.

Sed kiu el la junulinoj venis? Kaj por kiu celo? Fakte la respondo al la dua demando mi ricevis preskaŭ tuje – la mano sur la brusto kaj la proksimiĝinta junulina kapo, ĉu ne taŭga respondo? Min komencis turmenti la alia demando, kiu el la junulinoj venis? Ĉu estas Ma-rina, kiu tiamaniere pretas reĉi al la helpo dum la marŝado post la akcidento kaj vundigo de la piedo? Aŭ Katja, aŭ Zoja – tiel nomiĝis la aliaj junulinoj de nia grupo?

Malgraŭ ĉio mi certe ne povis ne respondi la senpaciencajn manojn, karesado kaj kisado. Dum iomaj paŭzoj mi provis solvi la demandon:

– Ĉu Marina?

Sed responde estis nur apenaŭ aŭdebla:

– Ts-s-s...

Kaj nenio plu.

Bedaŭrinde, kiel mi rimarkis dum la marŝado, ĉiuj tri junulinoj estis ege similaj unu al la alia – kaj la alto, kaj la korp-figuroj, kaj la hararangĝo; eĉ, ŝajnas, la voĉoj kaj parolma-nieroj... Nu, kvazaŭ ili estis fratinoj.

Ankoraŭ kelkfoje mi provis ekparoli kun mia nekonatino, sed tutege la respondo estis la sama:


– Ts-s-s...

La bruo ĉelignofajra daŭris, sed por mi ĝi jam tute ne gravis. Ĉiuj miaj pensoj kaj certe agoj estis koncentritaj en la tendo. Mi ne plu volis ekscii, kiu estas mia gastino kaj por kiu celo ŝi venis. Viro ĉiam restas viro, kaj mi ĉi-nokte provis tion pruvi. Ŝajnas, sukcese.

Sekvatage dum la restaj kilometroj mi provis perrigarde solvi, kiu el la junulinoj estis ĉe mi. Nenio estis eksterordinara. Neniu el ili kaŝjetis al mi iajn strangajn aŭ signifoplenajn ri-gardojn, neniu marŝis iel malsame al la antaŭa marŝad-maniero...

Kaj jen pasis tiom da jaroj, sed por mi restis tiu enigmo: kun kiu mi pasigis la nokton?..

Vi eble atendis iom pli erotikan rakonton kun iuj detaloj pri tiu nokto. Sed unue, mi ne estas majstro pri la rakontado, due mi opinias, ke vi ĉiuj povas imagi, kio okazadis en la tendo. Kaj finfine mi estas viro, kiu ne ŝatas fanfaroni pri siaj “venkoj”. Dankon pro via at-ento.



**Alla FRIDMAN**  
**(Gomel, Belorusio)**

*Saluton! Ĉi tiu serioza  
“mezepokeca” sinjorino surfote  
kaj aŭtoro-“filozofo” de ĉi  
poeziaĵo, infankuracistino kaj  
mem infano en la animo, kaj tiel  
plu – ĉio estas mi. Ankaŭ  
esperantistino dum sufiĉe longa*

*tempo, kvankam ne ofte aktiva – estas mi. Amike, bondezire kaj ĝis  
– mi ankoraŭ esperas – baldaŭ.*



La vivo al homoj donacas kvar vojojn –  
Sur ĉiu sukcesoj, sur ĉiu malĝojoj.  
Al amo kaj zorgoj, al pano kaj scio...  
Al stela ĉielo nin gvidas Alia.

\*\*\*

Ripetas sin ĉiutageco,  
Senĉesas taga karusel’  
Afer’ de plej diversa speco  
Delogas koron de ĉiel’.

Forprenas tempon por angoro,  
Por meditado pri la Ver’,  
Por ĝoj’ kaj ĝuo, kiam koro  
Jam pretas flugi super Ter’.  
Atendas ĉiam koro amon –  
Jen, ŝajne, venis kun feliĉ’,  
Tuj poste – jen – ĵaluzo, dramo,  
Kaj malaperis vivoriĉ’.

Jen zorgoj kaptis serioze  
Nin, kaj ekmutis arda kor’.  
Parolo sonas nure proze,  
Kaj pensojn – for, kaj sentojn – for...

Aferoj multas kaj laboro  
Por havi monon plu kaj plu –  
Por pano, vesto, domo, oro...  
Jen – forte tenas koron glu’.  
Jen: intelekto venki penas  
Kaj serĉas sciojn ie ajn.



Subiĝas koro. Ĉu subtenas...  
Animo mutas. Cerba gajn'...

Kaj songo venas, malrapidas:  
Animo flugas al stelar',  
Ĝi ĉion aŭdas, ĉion vidas –  
Jen – dancas en brilanta mar'.

Jen ĝi vizitas mondojn plurajn,  
Fabelan flamon trovis – jen!  
Danc' ne lacigas, mankas spuroj  
Survoje. Guo! Jam maten'.

Saluton, nova tag', aferoj –  
Mi kun esper' salutas vin!  
Mi flugis foje super Tero,  
Kaj ĝi ne plu katenas min.

Mi dankas ĝin pro ĉiu sperto,  
Kiun dum viv' renkontis jam,  
Pro ĉiu trovo, ĉiu perdo,  
Pro scio, mono, zorgo, am'.

Kaj dankas pli pro flamo stela,  
Ĝi ĉiam plu subtenos min.  
Kiu tuŝetis nur ĉielon –  
Flam' ĉiam restos en anim'.

---

## Nikki McKENNA

### (Atlanta, Usono)

*Studento pri antropologio kaj sociologio en La Universitato de Nov-Jorko. Revas esti unu el la unuaj koloniantoj de Luno aŭ Marso, kaj interalie instrui tie Esperanton, por eble efektivi la finan venkon sur la tuta planedo.*

## FACETOJ DE L' REALO

*laŭreato de la konkurso “Saliko”, branĉo “Originala prozo”*

Li mem ne sciis kial li eniris ĉi tiun – vican el pluraj – babilejon. Ja noveco de reta bablado malaperis antaŭ kelkaj semajnoj. Interreto ankoraŭ restis raraĵo en lia lando, kaj pro tio li preskaŭ la tutan liberan tempon dum la unua semestro pasigis en biblioteko de la Universitato de Istanbul, ekipita de la plej modernaj “teknikmirakloj”. Kaj kvankam li ĉiam miris pri enormeco de sia nova ludilo, la raviĝo pri ebleco de senpera interkomunikado kun la tuta mondo jam komencis forviŝiĝi. Nun ĉio ŝajnis la sama: kutimaj enuaj paroloj pri vetero, demandoj “De kie vi venas? Kiom da jaroj vi havas?” kaj similaj nun ŝajnis bagatelaj kaj sen-sencaj. Tamen li ial daŭrigis serĉi... kion?

Kiam ŝi eniris kvazaŭan ĉambron, al li ŝajnis ke el lia ekrano briletis la sunlumo. Tion ne eblis eksplicite racie, ĉar li nek konis ŝin antaŭe, nek esperis renkonti ion specialan en ŝajne ordinara babilejo. Sed io – eble ŝia reta pseŭdonomo, aŭ gaja maniero saluti la babilantojn –

atentigis lin, kaj liaj manoj ekkuris super la klavaro (la lastan duonhoron li apenaŭ sekvis la diskuton, replikante nenion).

“Bonan vesperon, Stelo Matena!”, salutis ŝin li. “Ĉu nun estas ĝusta tempo por vi?”

“Fakte ĉi tie l’ aŭroro pentros la horizonton jam post kelkaj horoj”, ŝi metis “rideton” tuj post la tajpita frazo.

“Ho, kaj kie estas tiu “ĉi tie”?”, kvazaŭ ŝerceme demandis li, kvankam ial li ĵus eksentis ke ĉiu ŝia repliko vekas en li ian ankoraŭ nekonatan intereson.

“Kawerau, Nov-Zelando, kaj kio pri vi?”, sed eĉ ĉi tiu banala interŝanĝo de informoj pri la lokoj ne povis detrui senton de unikeco de l’ renkontiĝo.

\* \* \*

Atendante ŝin en malvarmeta halo de flughaveno li rimarkis ke neniam antaŭe en sia vivo li tiel nervozis. Jes, ambaŭ ili sentis ion vere specialan unu pri la alia, povis paroladi dum horoj, neniam sentante mankon de l’ temoj, interŝanĝis dekojn da fotoj, sed... Ĉio tio okazis en la reĝlando kvazaŭa, kaj nun li staris fronte al la realo. Du semajnojn post tiu renkontiĝo ili interkonsentis pasigi la ferion en Sud-Afriko, partoprenante laborbrigadon, kies tasko estis instrui la anglan al la infanoj de ŝanti-urbetoj. Kaj nun li la centan fojon demandis sin: “Kiel pasos ĉi tiu afero? Ĉu ŝi ŝatos min “vivan”? Kaj ĉu miaj propraj sentoj restos senŝanĝaj post la semajno, dum kiu ni preskaŭ la tutan tempon estos kune – laborante kaj ripozante, tage kaj nokte?..”

Oni anoncis ke la flugo numero 568 malfruiĝas je unu horo, kaj li decidis lasi la halon kaj iom promeni sur la tero de ankoraŭ ne malfermita de li kontinento. “Nur por ne freneziĝi dum la restanta eterno”, esplikis li al si sian decidon. Ondo de varma aero frapis lin ĉe la elirejo, kaj li eksentis la diferencon inter la artefarita speciale por turistoj klimato de l’ flughaveno kaj la vera – reala – afrika vetero. En la ĉielo ekbriletis la unuaj steloj, kaj li tuj ekmemoris tiun, pri kiu li fakte pensis preskaŭ konstante. Unu plian fojon li pensis pri la mirinda tradicio de ŝia popolo doni belajn kaj signifplenajn nomojn al infanoj. Li denove ridetis, memorinte kiel li opiniis ŝian efektivan nomon esti elpensita por la Reto vortkombino. Lia nervozeco lasis lin, nun li estis alvokanta en sia menso ĉiujn epizodojn de iliaj ne tro longaj kaj ne tre tradiciaj rilatoj. Per ĉiu rememorita frazo, per ĉiu mense relegita letero (li memoris ilin ĉiujn parkere) li estis certiganta pri l’ vereco de sia sento pri ŝi.

Io igis lin turniĝi, kaj li tuj ekvidis ŝin elirantan el la halo, iomete kliniĝintan sub pezo de la grandega dorsosako. Je tiu momento li ekkonsciis ke ĝis nun li neniam konis veran belon.

\* \* \*

Estis la lasta tago de ilia feriado, kaj ili ĵus surgrimpis tiun monton por resti duope almenaŭ por ioma tempo – la amo de nigraj geknaboj al siaj strangaj transmaraj instruistoj tre plaĉis al ili ambaŭ, kaj kompanio de aliaj brigadanoj estis vere agrabla, sed io multe pli grava igis ilin lasi ĉiujn tie, malsupre, kaj supreniĝi por esti pli proksimaj al la mirindaj grandegaj steloj de l’ nokta afrika ĉielo.

“Mi ne povas imagi mian vivon fore de vi”, diris iu, kaj li nur post kelkaj momentoj komprenis ke la vortoj apartenis al li mem, irante kvazaŭ el la profundo de lia animo.

“Ni devas tuj pripensi nian sekvontan renkontiĝon. Kaj ĝi okazu ne pli malfrue ol post kelkaj semajnoj, ĉu vi aŭdas?”, ŝi ridetis, sed subite la esprimo sur ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis kaj ŝi frotetis la frunton. “Ĉi tiuj kapdoloroj min mortigos”, plendis ŝi.

“Verŝajne tio estas efiko de maldensa aero”, supozis li. “Estos pli bone se ni malsupreniĝos.”

“Ne, nur ne nun, kara, mi petas!”, kaj ŝi alpreniĝis al li kvazaŭ serĉante azilon de ĉiuj

malagrablaĵoj kaj doloroj en la mondo.

\* \* \*

Li ne povis dormi dum la tuta tempo de la flugado ĝis Auckland. Kaj nun, dum la veturo al ŝia domo en Kawerau per taksio, ĉio, kion li deziris, estis vekigo. Sed li ja ne songis. La spirprezinta beleco de Nov-Zelanda naturo nun ŝajnis al li nereala – tuŝu, kaj ĝi malaperos. La suno gaje brilis en ultrablua ĉielo, ekzotikaj birdoj kantadis siajn amserenadojn, ĉio floris sub varmaj sunradioj, dum lia animo silente ploris.

La aŭto haltis. Li pagis al la taksiisto, eliris kaj direktis sin laŭ vojeto al blanka domo staranta meze de pomarba ĝardeno. Paŝinte kelkajn metrojn li ekvidis ŝian patrinon ĉe la sojlo – li rekonis ŝin, ĉar ŝi estis sur kelkaj fotoj senditaj al li de Stelo Matena. En ĉiuj aliaj cirkonstancoj ŝi prezentigis kiel belega maoria virino, sed nun ŝi aspektis pli kiel ombro ol la viva homo. Ŝi rigardis lin kaj ne vidis, kvazaŭ mortigita de l' malfeliĉo. Li tuj komprenis. Estis jam tro malfrue, Stelo ne travivis la operacion. Li subite ekvidis sin kvazaŭ de flanko: jen li turniĝas kaj iras for de la domo. Jen iras laŭ la strato – kvazaŭ sencele, sed en tia malgranda urbeto kiel Kawerau oni povas trovi bezonatan domon aŭ oficejon sufiĉe facile. Jen eniras apotekon kaj prenas du skatoletojn da dormigiloj. Nun li estas trovonta iun hotelon, iun ajn, ne gravas...

\* \* \*

“Stelo Matena!” vokis li.

Ŝi turniĝis:

“Mi ne volis lasi vin, amo mia, sed mi ne povis resti...”

“Mi scias, kara, sed tio jam ne gravas”, li ridetis sentante absolutan feliĉon. “Rigardu tien, jen nova mondo por ni, pli bela kaj bona ol tiu, kiun ni lasis. Estas nun la tempo por ke ni eniru nian novan hejmon!”

“Mi iomete timas”, flustris ŝi.

“Ne timu, ĉar ni estas kune – nun kaj por ĉiam: neni malbono povas nin disigi.”

Ili prenis la manojn unu de la alia – kvazaŭ infanoj trafintaj nekonatan ĉirkaŭaĵon – kaj paŝis en la novan realon, realon de sia feliĉo.

---

## SATIRO

### STULTAJ LEĜOJ DE LA MONDO

La neforgesebla O.Bender ofte diris: “Mi respektas la Kriminalan Kodon”. Tio signifis, ke por la leĝoj ĉiuj estas egalaj kaj samrajtaj – kaj Prezidento de Rusio, kaj Ĉefreĝisoro de la Bolŝoj teatro, kaj (mi eĉ timas diri) Prezidanto de REU. Sed, spite al la jam senduba veno de 21-a jarcento, en pluraj ŝtatoj daŭre ekzistas amaseto da strangaj, kuriozaj kaj eĉ absurdaj leĝoj. Ĉi-sube vi trovos superrigardeton pri ĉi tio.

#### *Ameriko*

En Usono, en Teksaso, oni ne rajtas fari pli ol tri glutojn starante, kaj pafi bubalojn el dua etaĝo de hotelo. Se oni volas marŝi nudpiede – bonvolu, sed akiru specialan permeson, kiu kostas 5 dolarojn. Antaŭ nelonge, laŭ la sugesto de tiama guberniestro G.Bush (la nuna prezidento de Usono) oni enkondukis leĝon, sekvante kiun, krimulo devas parole aŭ skribe averti sian viktimon pri sia atenco ne malpli ol 24 horojn antaŭ la krimo. Malobeo de ĉi tiu leĝo pliigas la kulpon de la krimulo. En Florido ne edziniĝintaj virinoj ne rajtas paraŝuti en

dimanĉoj. Estas severe malpermesita kantado se oni estas vestita per naĝkostumo. Se oni estas nuda – oni ne rajtas duŝi sin. En Florido ne licas frakasi pli ol 3 telerojn en unu tago. En la urbo Pensakola virino, pereinta pro mallerta uzo de elektraj iloj en banĉambro, devas esti monpunita je 100 dolaroj. En Arkanzaso, en la tagoj de baloto kaj nombrado de voĉoj, oni ne rajtas proksimiĝi al balotejo pli proksime, ol je 15 metroj – tiamaniere ĉiuj balotantoj fariĝas krimuloj. En Ĉikago krimo estas manĝi en brulanta domo. En Sent-Luis fajrobriĝadoj ne rajtas savi nudajn virinojn, kaj ankaŭ virinojn, kiuj estas vestitaj nur per negliĝo aŭ nokta ĉemizeto. En Kentukio neniu virino rajtas aperi en naĝkostumo survoje, krom se ŝi estas akompanata de du policistoj, aŭ tenas en la manoj fosilon. En Karmel (la ŝtato Nov-Jorko) ĉiu viro, vestinta malsamkolorajn pantalonon kaj jakon, estas monpunata je 500 dolaroj. En Kalifornio ekzistas limo por rapido de aŭtoj sen stiristoj: 60 mejloj hore, kaj estas tabua plori dum parolado en juĝejo. En Indiano oni malpermesas sin lavi en bankuvo inter oktobro kaj marto kaj kreskigi lipharojn se la homo ŝatas kisojn. Fine, Indiano posedas leĝon, laŭ kiu la nombro “ $\pi$ ” egalas ne al 3,1415..., sed al 4.

En Kanado oni ne rajtas per 1-cendaj moneroj pripagi varon, se ties prezo estas pli ol 50 cendoj. En Meksiko barabaj virinoj ne facile povas marŝi laŭ stratoj – tio povas finiĝi per publika razado. En Paragvajo oni malpermesas duelojn, sed kun unu escepto: rajtas dueli tiuj, kiuj postlasas siajn korpopartojn al medicinaj aŭ sciencaj institucioj.

### ***Eŭropo, Israelo***

En Britio leĝoj kaj reguloj malofte ŝanĝiĝas, kaj neniam nuliĝas. Ekzemple, en 1313 ekvalidis leĝo, laŭ kiu oni, vestita en kavaliran panoplion, ne rajtas eniri parlamentejon. Ĉi leĝo neniam estis nuligita. En Londono validas tabuo por bati edzinojn post 21:00, ĉar “la krioj de batatino povas ĝeni la urbanojn”. Same en Londono ekzistas severa malpermeso “ŝajnigi sin pensiulo el Ĉelsi”. La kaŭzo ne plu ekscieblas, sed la leĝo validas. Londonajn taksistojn oni ne rajtas alvoki per krioj “Taksio!” (sub la risko de altega monpuno!). La taksistoj mem rajtas rifuzi siajn servojn al “pestaj aŭ ĥoleraj malsanuloj”, kaj rajtas publike pisi, “starante ĉe malantaŭa rado, kaj metinte dekstran manon sur ĝin”.

En Andoro estas malpermesitaj advokatoj. “Apero de kleraj juristoj, kiuj povas nigran fari blanko, estas tabua por niaj juĝejoj”, – tiel tekstas la leĝo de 1864.

Severaj leĝoj ekzistas ankaŭ en Israelo. Krom ĉio cetera, sabate oni ne rajtas purigi la nazon. Por bicikli, oni havu stirpermesilon. En la urbo Hajfa oni ne rajtas veni al urbaj plaĝoj kun ursoj.

### ***Rusio***

Kaj en Rusio daŭre validas kelkaj leĝoj ekde sovetaĵ tempoj. Ekzemple: laŭ Regularo de 5-a de marto 1969, akceptita de Ministra Konsilio de RSFSR, apud aŭtaj vojoj kaj ŝoseoj oni ne rajtas starigi reklamajn ŝildojn kaj sloganojn, se tiuj ne rilatas al sekurigo de la veturo.

Laŭ la Kodo pri administraj deliktoj (1984), artikolo 164-3, oni ne rajtas sin trudi al eksterlandanoj, cele vendi al tiuj aĵojn. Artikolo 152 malpermesas aĉeti en vendejoj panbultojn por manĝigi tiujn al brutoj kaj birdoj.

Kaj la plej interesa estas leĝo, akceptita en RSFSR la 28-an de marto 1927. Ĝi permesas konfiski havaĵon de homoj, kiuj eskapis el la Respubliko pro politika malkonsento kaj ne revenis je la tempo de konfiskado.

*NB! La teksto estas prenita el Interreto, “Pado Sunen” ne respondecas pri la ĝusteco de ĉi-supraj informoj!*



## Vladimir NABOKOV

### SIGNOJ KAJ SIMBOLOJ

#### I

La kvaran fojon dum samtioĉ da jaroj ili alfrontis la problemon: kion alporti kiel naskiĝtagan donacon al junulo, kies menso estis nekuraceble difektita. Li ne havis dezirojn. Artefaritaj objektoj estis por li aŭ abelujoj de malbono, pulsantaj pro malica aktiveco, kiun li sola povis percepti, aŭ vulgara oportunaĵo, por

kiu ne eblis trovi utilon en lia abstrakta mondo. Ekskludinte plurajn objektojn, kiuj povus ofendi aŭ timigi lin (ĉiuj teknikaj iloj, ekzemple, estis tabuaj), liaj gepatroj elektis delikatan kaj maldanĝeran bagatelon: korbeton kun dek diversaj fruktaj jeleoj en dek etaj ujoj.

Kiam li naskiĝis, ili estis geedziĝintaj jam delonge. Pasis dudeko da jaroj, kaj nun ili estis tute maljunaj. Ŝiaj palbrune-grizaj haroj estis kombitaj fuŝe. Ŝi portis ĉipajn nigrajn robojn. Malkiel aliaj virinoj de ŝia aĝo (tiaj, kiel sinjorino Sol, ilia apuda najbarino, kies tuta vizaĝo estis rozkolore lila pro la ŝminko kaj kies ĉapelo estis fasko da ĉerrojaj floroj), ŝi prezentis al la lumo de printempaj tagoj, rivelanta difektojn, sian nudan blankan vizaĝon. Ŝia edzo, kiu antaŭe en la patrujo estis sufiĉe prospera komercisto, nun plene dependis de sia frato Isaak, vera usonano kun preskaŭ kvardekjara restado tiulande. Ili vidis lin malofte kaj kromnomis lin “la Princo”.

Tiuvendrede ĉio iris malbone. La metroa trajno perdis sian vivkurenton inter du stacioj, kaj dum kvaronhoro oni povis aŭdi nenion krom diligenta korbato kaj susurado de ĵurnaloj. La buson, kiun oni devis uzi poste, ili atendis eterne, kaj, kiam ĝi finfine venis, ĝi estis plenshopita de babilemaj lerneĵanoj. Kiam ili supreniris laŭ la bruna pado, kondukanta al la sanatorio, pluvegis. Tie oni denove atendigis ilin, kaj anstataŭ ilia knabo, laŭkutime ŝancele eniranta la ĉambron (pala vizaĝo kovrita de aknoj, malbone razita, moroza, konfuzita), finfine aperis konata flegistino, kiu ne plaĉis al ili, kaj vigle klarigis, ke li denove provis suiciidi. “Li fartas bone”, – diris ŝi, – “sed vizito povus maltrankviligi lin”. La sanatoriaj laborantoj estis tiom mizere nesufiĉaj, kaj tiom facile oni povis perdi aŭ mismeti aĵojn, ke ili decidis ne lasi la donacon en la oficejo, sed alporti ĝin, kiam ili venos sekvan fojon.

Ŝi atendis, dum la edzo malfermis la ombrelon, kaj poste prenis lian brakon. Li purigadis la gorĝon per specifa resona maniero, kiel li kutimis, kiam estis ĉagrenita. Ili atingis la ŝirmitan bushaltejon aliflanke de la strato, kaj li fermis la ombrelon. Kelkajn metrojn fore, sub ŝanceliĝanta kaj gutanta arbo senhelpe baraktis en flako senpluma eta duonmortinta birdido.

Dum la longa vojaĝo al la metrostacio ŝi kaj la edzo ne interŝanĝis eĉ vorton. Ĉiufoje, rigardante liajn oldajn manojn (ŝvelintaj vejnoj kaj brunmakula haŭto), kunpremitajn kaj spasme moviĝantajn sur la ombrela tenilo, ŝi sentis fortiĝantan premon de larmoj. Ŝi ĉirkaŭrigardis, penante kroĉi sian konscion je io, kaj kun ioma konsterniĝo, miksaĵo de kompato kaj miro, ŝi rimarkis, ke unu el la pasaĝeroj, nigrhara knabino kun malpuraj ruĝaj piedungoj, ploris sur la ŝultro de pli aĝa virino. Al kiu similis tiu virino? Ŝi similis al Revekka Borisovna, kies filino edziniĝis al iu el la familio Soloveĉik – en Minsk, antaŭ jaroj.

Lastfoje, kiam li provis fari tion, lia metodo estis, laŭ la vortoj de la doktoro, ĉefverko

de inventemo. Li sukcesus, se envianta kunulo-paciento ne pensus, ke li volas lerni flugi – kaj ne haltigus lin. Kion li efektive volis fari, estis ŝiri truon en sia mondo kaj eskapi.

La sistemo de liaj iluzioj estis objekto de detala verko en scienca monata revuo, sed ŝi kaj la edzo longe antaŭ tio solvis tiun puzlon memstare. Herman Brink nomis ĝin “remencia manio”. En tiuj tre raraj kazoj la paciento imagas, ke ĉio okazanta ĉirkaŭ li vualite referencas al lia personeco kaj ekzisto. Realajn homojn li ekskludas el la komploto – ĉar li opinias sin esti multege pli inteligenta ol aliaj. Kien ajn li iras, lin ombras naturaj fenomenoj. Nuboj en la fiksrigardanta ĉielo transdonas unu al alia per malrapidaj signoj neimageble detalajn informojn pri li. En krepusko arboj per obskuraj movoj pridiskutas gestlingve liajn plej intimajn pensojn.

Rulŝtonetoj, aŭ makuloj, aŭ lentugoj formas kodojn, iel malice reprezentante mesaĝojn, kiujn li devas kapti Ĉio estas ĉifro, kaj ĉie temas pri li. Kelkaj el la spionoj, ekzemple, vitro-surfacoj kaj trankvilaj akvujoj, estas senemociaj observantoj; aliaj, ekzemple, jakoj en vendejvitrinoj, estas neobjektivaj atestantoj, animprofunde linĉemuloj; ankoraŭ iuj (fluanta akvo, ŝtormoj) estas historiaj ĝis frenezo, havas kriptigitan opinion pri li kaj groteske misinterpretas liajn agojn. Li ĉiam devas esti tre atentema, dediĉi ĉiun minuton kaj peceton de sia vivo por deĉifri la vibradon de objektoj. Eĉ la aero, kiun li elspiras, estas numerata kaj arkivigata. Se nur la intereso, kiun li provokas, estus limigita per lia proksima ĉirkaŭaĵo – sed ve, ne estas tiel! Kun distanco la torentoj de sovaĝaj klaĉoj pli ampleksiĝas kaj pli laŭtiĝas. La siluetoj de liaj sangokorpuskloj, pli grandigitaj milionoble, flugas super vastaj ebenoj. Kaj pli malproksime enormaj montoj, netolereble solidaj kaj altaj, per granito kaj ĝemantaj abioj resumas la definitivan veron de lia esto.

## II

Kiam ili malmergiĝis el la ŝtormo kaj fetora aero de la metroo, la lastaj forĵetaĵoj de la tago estis miksitaj kun la strataj lumoj. Ŝi volis aĉeti iom da fiŝaĵo por vespermanĝo, do ŝi enmanigis al li la korbon kun la ĵeleujoj kaj diris, ke li iru hejmen. Li ascendis la trian ŝtuparplaceton kaj tiam rememoris, ke li donis al ŝi siajn ŝlosilojn pli frue samtage.

En silento li sidiĝis sur la ŝtuparon kaj en silento leviĝis, kiam proksimume post dek minutoj ŝi venis, peze kaj lace trenante sin supren. Ŝi lace ridetis, kapskue malaprobante sian stultecon. Ili eniris sian duĉambran loĝejon, kaj li tuj iris al la spegulo. Li streĉis per la dikfingroj la randojn de sia buŝo, kun terura maskosimila grimaco li eligis la novan senespere malkomfortan falsdentaron kaj disigis la longajn salivajn kojnodentojn, kiuj ligis lin al ĝi. Li legis sian ruslingvan ĵurnalon, dum ŝi surtabligis manĝon. Ankoraŭ legante, li manĝis la mangran manĝon, kiu ne postulis dentojn. Ŝi sciis lian humoron kaj ankaŭ silentis.

Kiam li enlitiĝis, ŝi restis en la loĝoĉambro kun sia stako da malpuraj ludkartoj kaj malnovaj albumoj. Trans la malvasta korto, kie la pluvo tintis en la mallumo kontraŭ trivitaj rubuoj, milde lumis fenestroj. En unu el ili videblis viro en nigra pantalone, kun levitaj nudaj kubutoj, dorse kuŝanta sur neordigita lito. Ŝi tiris la ĵaluzion suben kaj atente rigardis la fotojn. Kiam li estis bebo, li aspektis pli surprizita ol la aliaj. El faldo de la albumo elfalis foto de germana servistino, kiu laboris ĉe ili en Leipzig\*, kun ŝia dikvizaĝa fianĉo. Minsk, la revolucio, Leipzig, Berlin, Leipzig, oblikva fasado de domo, tre malbone fokusita. Kvarjara, en parko: malbonhumora, sinĝena, sulkafrunta, rigardanta for de vigla sciuro, kiel li rigardus for de ajna alia nekonato. Onklino Roza, tumultema, plumpa maljuna virino kun frenezaj okuloj, kiu vivis en tremanta mondo de malbonaj novaĵoj, bankrotoj, trajnacidantoj, kresko de kancero – ĝis kiam la germanoj murdis ŝin – kun ĉiuj homoj, pro kiuj ŝi maltrankvilis.

---

\* Leipzig – Lepsiko, Лейпциг (G.A.)

Sesjara – tio estis, kiam li desegnis mirindajn birdojn kun homaj manoj kaj piedoj kaj suferis pro sendormeco, simile al plenaĝulo. Lia kuzo, nun fama ŝakisto. Denove li, proksimume okjara, jam malfacile komprenebla, timanta la tapeton en la antaŭĉambro, timanta bildon en libro, kiu simple montris idilian pejzaĝon kun rokoj sur monteta deklivo kaj malnovan ĉaran radon, pendantan sur la branĉo de senfolia arbo. Dekjara: la jaro, kiam ili forveturis el Eŭropo. La honto, la kompatato, la humiligaj malfacilaĵoj, la hidaj, malicaj, mense postrestintaj infanoj, kun kiuj li estis en tiu speciala lernejo. Kaj poste en lia vivo venis tempo, koincidanta kun longa resaniĝo post pneŭmonito. Liaj etaj fobioj, kiujn liaj gepatroj obstine opiniis strangaj, de mirinde naturdotita infano, hardiĝis, kvazaŭ ili estus en densa volvaĵo de logike interagantaj iluzioj, farantaj lin tute neatingebla por normalaj homoj.

Tion, kaj multon plian, ŝi akceptis, ĉar finfine vivi ja signifis akcepti la perdon de unu ĝojo post alia, eĉ ne ĝojoj en ŝia kazo – simple ebloj de pliboniĝo. Ŝi pensis pri la senfinaj ondoj de doloro, kiujn pro tiu aŭ alia kaŭzo ŝi kaj ŝia edzo devis elteni; pri la nevideblaj gigantoj, kiuj neimageble dolorigis ŝian knabon; pri la nemezurebla kvanto de tenero, kiun enhavis la mondo; pri la sorto de tiu tenero, kiun oni aŭ dispremas, aŭ disipas, aŭ transformas en frenezon; pri neglektataj infanoj, zumkantantaj por si mem en nebalaitaj anguloj; pri belaj sarkendaj herboj, kiuj ne povas kaŝiĝi de la farmisto kaj devas senhelpe observi, kiel la ombro de lia simieca kurba dorso postlasas survoje kripligitajn florojn, dum la monstra malhelajlo proksimiĝas.

### III

Estis post la noktomezo, kiam ŝi aŭdis el la loĝoĉambro, ke la edzo ĝemas. Kaj baldaŭ li ŝancele eniris, vestita super ŝia nokta mantelo per la malnova palto kun astrakana kolumo, kiun li preferis multe pli ol la belan bluan banmantelon.

“Mi ne povas dormi”, – li kriis.

“Kial”, – ŝi demandis, – “kial vi ne povas dormi? Vi estis tre laca”.

“Mi ne povas dormi, ĉar mi mortas”, – li diris kaj kuŝiĝis sur la divanon.

“Ĉu la stomako? Ĉu vi volas, ke mi telefonu al doktoro Solov?”

“Neniujn doktorojn, neniujn doktorojn”, – li ĝemis, – “Al diablo doktorojn! Ni devas rapide preni lin el tie. Alie ni respondecos. Respondecos!” – li ripetis kaj impete sidiĝis, metinte ambaŭ piedojn sur la plankon kaj batante la frunton per la kunpremita pugno.

“Bone,” – ŝi diris trankvile, – “ni portos lin hejmen morgaŭ matene”.

“Mi volas teon”, – la edzo diris kaj foriris en la banejon.

Pene kliniĝinte, ŝi trovis kelkajn ludkartojn kaj foton, kiuj falis de la divano sur la plankon: kera fanto, pika naŭo, pika aso, Elza kaj ŝia bruta amindumanto. Li revenis bonhumora kaj diris laŭte:

“Mi ĉion pripensis. Ni donos al li la dormoĉambron. Ĉiu el ni pasigos parton de la nokto apud li, kaj la alian parton sur ĉi tiu divano. Laŭvice. Almenaŭ dufoje semajne ni montros lin al la doktoro. Ne gravas, kion diros la Princo. Ĉiukaze li havos ne multon por diri, ĉar tiel kostos malpli”.

La telefono tintis. Estis nekutima horo, por ke ilia telefono tintu. Lia maldekstra pantoflo defalis, kaj li palpe serĉis ĝin per la kalkano kaj dika piedfingro, starante meze de la ĉambro, kaj infanece, sendente gapis al la edzino. Ĉar ŝi sciis la anglan pli bone ol li, estis ŝi, kiu respondis telefonvokojn.

“Ĉu mi povas paroli kun Ĉarli?” – demandis malserena knabina voĉeto.

“Kiun numeron vi bezonas? Ne. Ĉi tiu numero ne estas la korekta”.

Ŝi milde remetis la aŭskultilon. Ŝia mano direktiĝis al la maljuna laca koro.

Li rapide ridetis kaj tuj daŭrigis sian ekscititan monologon. Ili venigos lin jam tage.

Tranĉilojn necesos teni en ŝlosita tirkesto. Eĉ en la plej malbona stato li ne estis danĝera por aliaj homoj.

La telefono tintis la duan fojon. La sama sentona angora juna voĉo demandis pri Ĉarli.

“Vi havas nekorektan numeron. Mi diros al vi, kion vi faras: vi fingrumas la literon “O” anstataŭ la nulo”.

Ili sidiĝis por sia neatendita festa noktomeza teumado. La naskiĝtaga donaco staris sur la tablo. Li brue trinkis. Lia vizaĝo ruĝiĝis. De tempo al tempo li cirkle movis sian levitan glason, kvazaŭ por igi la sukeron dissolviĝi pli bone. La vejno sur la flanko de lia kalva kapo, kie estis granda naskmakulo, rimarkeble ŝvelis, kaj, kvankam li matene razis sin, sur la mentono montriĝis arĝentaj haretoj. Dum ŝi verŝis al li ankoraŭ unu glason da teo, li surmetis la okulvitrojn kaj plezure reekzamenis la brilantajn flavajn, verdajn kaj ruĝajn etajn ujojn. Liaj mallertaj humidaj lipoj silabis la elokventajn etiketojn: abrikotoj, vinberoj, prunoj, cidonioj. Li atingis sovaĝajn pomojn, kiam la telefono tintis denove.

Boston, 1948

*El la angla tradukis Miĥail Povorin (Moskvo)*



# "Saliko": La rezultoj

## *Sendependa Arta Literatura Konkurso*

Dum EoLA estis anoncigitaj la rezultoj de la unua literatura konkurso "Saliko". Kvankam ne estis tre multaj kontribuoj, la konkurso sendube okazis, kaj espereble la dua estos pli fruktodona. Bedaŭrinde, du partoprenintoj estas jam pli-malpli spertaj verkistoj, kaj tial iliaj verkoj ne estis konsideritaj.

Grandan laŭdon al la partoprenintoj, kiuj sendis bonajn konkursaĵojn, sed ĉi-foje ne gajnis: **Aleksandr MOREV** (Sankt-Peterburg), **Sofja ŜEJNINA** (Ivanovo), **Boris KONDRATJEV** (Sankt-Peterburg) kaj mistera partopreninto sub la pseŭdonimo "**Amanito**" (anoncu vin ĉe la organizantoj). Do, nepre partoprenu sekvan fojon, kaj vi, espereble, jam estos senduba gajninto!

Ĉu-sube sekvas la listo de la laŭreatoj.

### Originala poezio:

**Tatjana MUĤAMEDŜINA** (Ĥarkov, Ukrainio) pro "Giordano Bruno"

### Originala prozo:

**Nikki McKENNA** (Atlanta, Usono) pro "Facetoj de l' realo"

### Tradukita prozo el la rusa en Esperanton:

**Vjaĉeslav IVANOV** (Vladikavkaz – Sankt-Peterburg) pro "Rinocera tamburo"

### Tradukita poezio el la rusa en Esperanton:

la 1-a loko ne aljuĝita


la 2-a loko: **Sergej TIĤONOV** (Ĉeboksari) pro la tradukoj el "Gariki" de Igor Guberman

### Tradukita poezio el Esperanto en la rusan:

neniu loko aljuĝita,

speciala mencio: **Sergej TIĤONOV** (Ĉeboksari) pro la traduko de "Mi memoras..." de V.Samodaj

La laŭreataj verkoj aperos ĉe la retadreso <<http://konkurso.port5.com>> kaj en REGo (kadre de "Pado Sunen"). Koran dankon al ĉiuj!



anonco de la laŭreatoj de "Saliko" dum EoLA-14

Viro aĉetis ĉokoladajn bombonojn, venis hejmen kaj diris al siaj kvar infanoj:

– Kiu ĉiam obeas la paŭlon, kiu neniam kontraŭdiras ŝin, kiu ĉiam plenumas ĉion, kion ŝi petas, kaj kiu neniam plendas pri ŝiaj agoj, do ĝuste tiu ricevos la bombonojn. Kiu ricevos la bombonojn?

La infanoj ĥore respondas:

– Vi, paĉjo.

*(esperanto-anekdoto)*

### LA MIKROSOFTA AŬTO

Ĉe okazinta komputila eksponejo (COMDEX) Bill Gates onidire komparis la komputilan industrion kun la aŭta industrio, dirante: “Se General Motors teknike progresus same kiel la komputila industrio, ni ĉiuj uzus dudek-kvin-dolaran aŭton, kiu veturus 1000 mejlojn per unu galono.” Rebate al la komentoj de Vilĉjo, General Motors eldonis gazetan komunikon kun jena teksto:

#### *La Mikrosofta aŭto.*

Se General Motors evoluigis teknikon same kiel Mikrosoft, ni ĉiuj veturus en aŭto kun la sekvantaj karakterizaĵoj:

- Sen videbla kaŭzo la aŭto kraŝus dufoje ĉiun tagon.
- Ĉiun fojon, kiam oni refarbus la stratajn gvidliniojn, necesus aĉeti novan aŭton.
- Iam kaj iam, via aŭto simple senfunkciigos meze de la aŭtovojo kaj vi akceptus tion, restartigus kaj plu veturus.
- Iam kaj iam, la plenumado de manovro, ekzemple “turni maldekstren”, igus la aŭton fini sian funkcion kaj rifuzi restarti. Post tio oni devus reinstali la motoron.
- Nur po unu persono povus samtempe veturi en la aŭto, se oni ne estus aĉetinta “Aŭto 95” aŭ “Aŭto NT”. Sed ĉi-kaze oni devus aĉeti ankaŭ pli da sidlokoj.
- Makintoŝo konstruus aŭton sunenergian, pli fidindan, 5-oble pli rapidan, 2-oble pli facile direkteblan, kiu tamen moviĝus nur sur 5 elcentoj de la stratoj.
- Avertlampetoj pri la oleo, akva temperaturo kaj generatoro estus anstataŭigitaj per unusola avertlampeto “ĝenerala aŭta difektiĝo”.
- Novaj sidlokoj devigus ĉiun havi same larĝan postajo.
- La aersaka sistemo demandus “Ĉu vi estas certa?”, antaŭ ol pufiĝi.
- Iam kaj iam, pro neniu videbla kaŭzo, via aŭto elŝlosus vin, rifuzante permesi al vi eniri, ĝis vi samtempe levus la pordotenilon, turnus la startigan ŝlosilon kaj manĉaptus la radian antenon.
- GM postulus de ĉiuj aĉetantoj de aŭtoj, ke ili aĉetu luksan maparon de Rand McNally (nun filio de GM), malgraŭ tio, ke ili nek bezonas nek deziras ĝin. Klopodo forigi tiun specialaĵon tuj malbonigus la rendimenton de la aŭto je 50 elcentoj. Kulmine, GM fariĝus celo de esploro fare de la Justica Ministrejo.
- Ĉiun fojon, kiam GM enkondukus novan modelon, la aĉetantoj devus plene relerni veturigi, ĉar neniu el la novaj direktiloj funkcius sammaniere kiel en la malnova aŭto.
- Oni devus premi la butonon “startigu” por malstartigi la motoron.

*(esperanto-anekdoto)*

**Avertu: tiu ĉi numero de REGo estas la lasta, kiun ricevos ĉiuj abonantoj-2001. La sekva numero estos sendita nur al tiuj, kiuj pagis sian membrokotizon en REU aŭ REJM por 2002 aŭ la ĉi-jaran REGo-abonkoston.**

# DIVERSAĴOJ

Gennadij Vladimiroviĉ Gluĥov el Jelec okaze de la Novjara festo sendis gratulojn al la prezidento de Rusio V.V.Putin, demandinte samtempe pri lia rilato al Esperanto, kaj ricevis jenan respondon de la Eksperta departamento de la prezidenta Administracio: "... Президент Российской Федерации В.В.Путин приветствует и поддерживает любые начинания и движения, направленные на повышение уровня взаимопонимания между различными народами и государствами и дающие в этом плане практические результаты. В этом контексте и следует рассматривать отношение Президента Российской Федерации В.В.Путина к языку эсперанто и международному эсперанто-движению. Одновременно повседневной заботой Президента Российской Федерации В.В.Путина является развитие национальных языков и культур народов и народностей, населяющих Российскую Федерацию."

## **REGo dankas la personojn, kiuj faris mondonacojn al ĝi en 2001:**

*Valerija Cvetkova (Sankt-Peterburg)*

*Natalja Dementjeva (Ĉusovoj)*

*Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)*

*Rimma Roganova (Ĉusovoj)*

**Andrej kaj Nataŝa Grigorjevskije** informas, ke ili ŝanĝis la loĝlokon kaj ekde nun ne plu troveblas en Ivanovo. La nova adreso estas: **429120, Ĉuvaŝio, Ŝumerlja, str.Lenina 40 – 14; tel. (83536) 59856**; la retadresoj restas samaj. Tiu ĉi adreso ekde nun validas ankaŭ por mendo de la diskoj, produktataj de Andrej Grigorjevskij kaj REJM: "Esperanto XXI" kaj la diskoj de Ĵomart kaj Nataŝa.

## **UTILAJ ADRESOJ**

### **REU:**

p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>;  
ttt-ejo <http://reu.da.ru>.

### **Libroservo de REU:**

p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@chat.ru>;  
plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

### **REJM:**

str.Lenina 40 – 14, 429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝio;  
retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

### **UEA:**

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando;  
retadreso <uea@inter.nl.net>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

**ENIGMOJ.** Odesa E-klubo anoncas konkurson pri solvado de enigmoj. Tiu, kiu solvos ĈIUJN taskojn dum 2002 (aperontajn en REGo ekde tiu ĉi numero), gajnos la rajton partopreni senpage en iu el Odesaj renkontiĝoj en 2003, laŭ la propra elekto: Kristnaska Birdokalkulo, Aprilaj Ridetoj, Ekspedicio "Dnestro" (1 semajno), Zamenhofaj Tagoj. La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>) aŭ poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71).

1. KOMPRENU, pri kio temas, kaj tiel solvu la ekvacion:  $L + M + M + \hat{J} + V + S + D = S$ .

2. Tute originala Esperanta ludo - MALŜARADOJ. Oni prenas normalan (ne kunmetitan) E-an vorton, kaj dispecigas ĝin je kelkaj signifaj partoj, kiel en kutima ŝarado. Sed poste ĉiun vorteron oni anstataŭigas per ĝia antonimo. En E-o, certe, oni ne povas skribi senpere mal-vortojn; do, la anstataŭigo estas iom arbitra, por sprituloj. Se estas malfacile tuj solvi la taskon, estas aldonata normala priskribo de la celita vorto. Ekz., SUKERO = (SUK-ERO) = BRANDA ARO, aŭ blanka morto.

PUNKTA EZOKO, aŭ konspiro  
DRELIKA OBLO, aŭ herbejo  
KAVA KRAĈO, aŭ bluverda juvelŝtono  
SOLA SATANO, aŭ moko  
ACERA POMO, aŭ nia nacia kaĉo

*Respondo al la enigmo en antaŭa numero de REGo: rezulte de la solvo devis aperi la vorto LEONTODO.*

3. ENMETU LA VORTON. Vi vidas du vortostumpojn. Enmetu anstataŭ la punktoj radikojn, kiuj kompletigas la unuan vorton kaj komencas la duan. Ekz., PAN(...)POM = PAN(TER)POM.

NEK (...) IF  
MUS (...) EDR

LAK (...) TANG  
TE (....) ENT

CIM (...) KON  
AVEN (...) KIS

4. ALDONU LA VOKALOJN! Vi vidas nur la konsonantojn, kaj enkrampe estas la plena nombro de literoj en la vorto. Por plifaciligi la aferon, post ĉiu cifero troviĝas klarigo de la vorto. Ekz., MNKN (8) = homsimilaĵo; respondo: MANEKENO. Bv trovi kaj skribi la plenajn vortojn.

DL (6) = neatingeblaĵo

HLNT (8) = fonto de oleo

RD (5) = posedanto de belegaj plumoj

LN (5) = fama afrikano

KSKK (8) = tio, kion A.Dumas (A.Djuma) nomis grandega arbo; aŭ la bero, prikantita de M.Bronŝtejn.

*preparis Tatjana Auderskaja (Odeso)*

## **REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) № 2 (9) marto 2002**

**komuna eldono de REU kaj REJM**

redaktas Garik Kokolija

retadreso <gazeto@mail.ru>

poŝta adreso: Pjatickoje ŝosse 45 – 105, 123310 Moskvo, Rusio

por tiu ĉi numero kunlaboris Viktor Aroloviĉ

la gazeto estas produktita en la presejo "Policvet" (Klin)

**abontarifoj por 2002:**

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ – 100 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 123310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA